Liberia	2,50	6 386	2	126 070 Dol.	649 260
Litova	2,34	19 415	8	56 000 000 Lit.	28 868 000
Luksemburga	0,29	358	1	8 978 000 Fr.	1 292 280
Meksika	15,20	81 547	6	95 987 000 Pes.	239 482 600
Mararmeo	—	—	—	1 761 000 „	—
Nederlanda	7,80	4 689	—	58 530 000 Guld.	—
Mararmeo	—	8 136	—	40 545 000 „	205 531 090
Ned. Hindio	53,00	35 107	—	—	—
Nikaragva	0,75	1 165	2	327 704 Kor.	1 687 670
Norveĝa	2,84	3 740	2	27 778 000 Kron.	55 110 790
Mararmeo	—	1 050	—	12 114 000 „	—
Nov-Zelanda	1,48	574	1	484 287 Funttoj	24 823 500
Mararmeo	—	1 144	—	504 697 Sterl.	—
Panama	0,48	755	2	1 221 080 Balb.	6 288 560
Paragvaja	0,90	2 915	3	67 891 000 Pesoj	74 680 100
Persa	9,00	40 000	4	123 700 000 Kran.	111 330 000
Perua	6,20	8 371	2	1 683 000 Libr.	44 821 000
Mararmeo	—	—	—	676 000 „	—
Pola	30,71	265 871	—	814 307 000 Zlot.	462 929 550
Mararmeo	—	—	—	—	—
Limarmeo	—	6 059	—	—	—
Portugala	6,32	35 465	7	321 042 000 Eskud.	107 781 550
Mararmeo	—	5 170	—	144 336 000 „	—
Rumana	18,00	227 419	13	7 930 500 000 Lei	237 915 000
Salvadora	1,74	3 000	2	4 391 200 Kol.	109 780 000
Siama	10,47	25 000	2	21 171 000 Tik.	46 152 780
Soveta	155,00	565 000	4	919 900 000 Rub.	2 419 337 000
Sud-afrika	7,88	9 378	1	1 192 100 F. Sterl.	29 921 710

Regno	Loĝantoj en miltonoj	Numero de militistoj	Militistoj po 1000 loĝ.	Budĝeto Elspezoj por la defendo	Fr. sviz
Sveda	6,17	23 686	5	88 100 000 Kron.	184 598 100
Mararmeo	—	5 400	—	44 800 000 „	—
Svislanda	4,06	7 796	2	91 200 000 Frk.	91 200 000
Turka	13,65	170 000	12	69 295 100 F. turka	169 080 040
Urugvaja	1,82	8 132	4	8 638 000 Pes.	38 007 200
Usona	122,00	428 304	—	—	—
Mararmeo	—	—	—	—	—
Bordarmeo	—	11 321	4	1 346 357 000 Dol.	6 933 738 550
Herarmeo	—	12 893	—	—	—
Venezuela	3,18	6 070	2	29 732 000 Boliv.	28 245 400
Sume:	1 721 95	9 377 726	5.4	—	22 316 205 330

La supra statistiko entenas 60 regnojn, kun suma loĝantaro de 1 721 950 000 da homoj. La sumo de la konstante servantaj militistoj estas 6 377 726, kaj la jara elspezo 22 316 205 330 Frankoj svizaj, rondcifere. Por koni la sumon proksimuman en dolaroj dividi per 5, germanaj markoj deprenu 1/4 onon, francaj fr. multobligu per 5, anglaj funtoj dividi per 25.

La Enciklopedioj

La koncepto de enciklopedio, t. e. de verko entenanta la tuton de la homaj scioj, ne estas moderna.

Jam la antikvaj Grekoj kaj Romanoj havis tiajn verkojn. Kelkaj perdiĝis, kaj ni konas nur iliajn nomojn; kelkaj verkoj formas vere enciklopediojn, kvankam ilia aŭtoro ne intencis kompili tian verkon: ekzemple, la verkaro de Aristotelo (384—322 a. K.).

La unua verko, ankoraŭ nun ekzistanta, kiu intencis ampleksi la tutan konaron sisteman, estas *Historia Naturalis* („Natura Historio“) de C. Plinius Secundus, la pliaĝa. La aŭtoro ĝin starigis kolektante sisteme sciigojn el pli ol 2000 verkoj kaj ĝin publikigis ĉ. 77 p. K. La verko estas aranĝita laŭmaterie kaj pritraktas sinsekve: matematikan-fizikan priskribon de la universo, geografion kaj etnografion, antropologion kaj homan fiziologion kune kun institucioj kaj ĉefaj inventoj, zoologion, botanikon, medikamentojn, mineralogion, metalojn kaj ŝtonojn, kolorilojn, pentrarton. Estas superflue insisti pri la graveco de tiu verko por ni: ĝi ege influis ankaŭ la mezaĝan kulturon, kaj la mezaĝaj kleruloj ofte ĉerpis el ĝi siajn konojn.

Oni devas atendi pli ol tri jarcentojn por renkonti alian enciklopedion: la kartaga advokato Martianus Capella,

kiu vivis dum la unua parto de la V. jc., verkis *de Nuptiis Philologiae et Mercurii* („la Geedziĝo de Filologio kaj Merkuro“), parte proze kaj parte verse. Li imagas, ke Merkuro, dio de elokventeco, edziĝas je Filologio en la Lakta Vojo: la feston ĉeestas la sep liberaj Artoj: Grammatiko, Dialektiko, Retoriko, Geometrio, Aritmetiko, Astronomio kaj Muziko, kiuj profitas la okazon por pritrakti siajn doktrinojn. Eble tio estis taŭga rimedo por amuzi la ĉeestantojn tiam; nun oni mortus de enuo! Tamen, la verko — kiu ĉefe utiligas la nun perditan samsubjektan verkon *Disciplinae* („Sciarioj“) de M. Terentius Varro, — ĝuis grandan ŝaton dum la mezaĝo, kaj la lernantoj par-kere lernis ĝiajn versojn.

Izidoro, episkopo de Sevilla (Isidorus Hispalensis) verkis (VI—VII jc.) la unuan kristanan enciklopedion, nomatan *Etymologiae*. La verko celas doni resuman informon pri la homaj scioj de lingvistika vidpunkto; tial la aŭtoro penas doni pri ĉiu koncepto difinon kaj pri ĉiu vorto etimologion.

Tiu ĉi verkon rearanĝis kaj modifis Hrabanus Maurus, abato de Fulda, sub titolo de *Rerum naturis* („pri la originoj de la aĵoj“) aŭ *de Universo*. Hrabanus preterlasis ĉion ne rilatantan al la Biblio aŭ eklezia kulturo, sed, kompense, donis grandan lokon al la alegoria interpretado.

Sed la plej grava mezaĝa enciklopedio, tiu kiu havis la plej grandan efikon ĝis la fino de tiu epoko, estas la *Bibliotheca Mundi* („monda libraro“) aŭ *Speculum majus* (la granda spegulo“), kiun kompilis kaj publikigis la franca dominikano Vincent de Beauvais (*Vincentius Bellovacensis*) dum la unua duono de l' XIII. jc. La grandioza verko konsistas el kvar partoj: 1. *Speculum naturale*, en kiu oni preparolas la natursciencojn, laŭ la ordo de la Geneza septaga kreado; 2. *Speculum morale*, kiu ne estas de Vincent, sed aldonita de nekonata aŭtoro dum la komencaj jaroj de l' XIV. jc.; 3. *Speculum doctrinale*, kiu enhavas plenan resumon de ĉiuj sciencoj kaj de la ĉefaj artoj kaj metioj; 4. *Speculum historiale*, kiu preparolas la historion, de la kreado ĝis la 6a Kruca militiro (de l' franca reĝo Sankta Louis IX, 1250). En tiu ĉi lasta parto, Vincent citas longajn lokojn de la diversaj aŭtoroj, ĉu ekleziaj ĉu ne, kiam li devas paroli pri ili; nature, la historio estas plenplena de mirakloj kaj legendoj. La verko estis mone subtenata de l' reĝo de Francujo, sankta Louis IX kaj de ties edzino, filo kaj bofilo Thibaud V, duko de Cham-

pagne. Tiu ĉi enciklopedio estis unuafoje presata en Strasbourg 1473, en sep foliegaj volumoj. Ankoraŭ en la XIX. jc., Heidelberg-a profesoro Fr. Chr. Schlosser tradukis kaj presigis 51 ĉapitrojn de la 6a libro de la *Speculum doctrinale*, sub la titolo *Hand- und Lehrbuch für königliche Prinzen und ihre Lehrer*, Frankfurt a. M., 1819.

Estas nun neeble eĉ nur citi la enciklopediojn poste aperintajn; sufiĉu nur mencii, inter la aŭtoroj, Brunetto Latini (ĉ. 1265), kiu instruis Dante Alighieri, la anglan franciskanon Bartholomew de Granville (ĉ. 1360), la germanan kartuzianon Georg Reisch (ĉ. 1496), la italojn Giorgio Valla (1501), Raffaele Maffei, kiu multe priatentis geografion kaj biografiojn (1506), Antonio Zara (1615), la germanan teologon J. H. Alsted (1630), la francon L. Moréri, kies *Grand Dictionnaire historique* (1674) estis ofte reeldonata (la 20a eldono aperis en Paris 1759, dek fol. vol.) kaj ankoraŭ nun estas tre utila, la svisgermanon J. J. Hofmann (1677), la francan akademianon Th. Cornelle (1694), la faman Pierre Bayle (*Dictionnaire historique et critique*, Rotterdam 1697, ofte reeldona kaj kompilitiga), la italan landkartoverkiston, estron de la Dominikanoj V. M. Coronelli, kiu ekverkis, sed ne povis fini la unuan enciklopedion laŭ moderna vidpunkto, kun laŭalfabeta arango (1701—1706), la anglan pastron John Harris (1704), la germanon J. Hübner, kies enciklopediaj vortaroj (1704, 1712) estis longe popularaj, la Danzig-anon J. T. Jablonski (1721), la anglon Dennis de Coetlogon (1745), la italon Gianfrancesco Pivati (1746—1751), ktp.

*

Ĉirkaŭ la duono de la XVIII. jc. aperis kelkaj epokfarantaj verkoj, kiuj meritas apartan atentigon.

La unua el tiuj ĉi verkoj estas: *Cyclopaedia, or an universal Dictionary of Art and Sciences* (Londono 1728, du fol. vol.), kompilita de Ephraim Chambers. Ĝi estis tre bona kaj merite trafis grandan sukceson; kaj oni ĝin kompletigis, reldonis kaj tradukis plurfoje. Preskaŭ samtempe ekaperis unu el la plej grandaj kaj multenhavaj enciklopedioj: la *Grosses vollständiges Universal-Lexikon aller Wissenschaften und Künste*. Ĝin iniciatis la librovendisto J. H. Zedler el Breslau kun la financa helpo de la komercisto J. H. Wolff el Leipzig. La verko konsistas el 64 fol. vol., krom kvarvoluma suplemento kaj aperis en Halle kaj Leipzig de 1732 ĝis 1754. La verko estas tre

zorge kompilita kaj ankoraŭ nun tre valora, ĉar ĝi liveras informojn aliloke ne troveblajn.

Enciklopedio estas ankaŭ la verko, kiu havis la plej grandan efikon en tuta Eŭropo. Ĝi estas la franca *Encyclopédie, ou dictionnaire raisonné des sciences, des arts et des métiers*, verkita sub la direktado de Diderot kaj D'Alembert kaj publikigata de 1751 ĝis 1771. Komence oni intencis eldoni nur kompletigitan francan tradukon de la *Cyclopaedia* de Chambers; sed iom post iom oni ŝanĝis la planon, kaj fine oni entreprenis la verkadon de tute originala vortaro. Jam post la apero de la dua volumo, la entrepreno renkontis malfacilaĵojn kaj barojn, precipe flanke de la registaro kaj de la Jezuitoj; sed ĝi estis favorata de la cenzuristo Malesherbes, de la ministro Choiseul kaj de markizino de Pompadour. En 1765 jam estis aperintaj la 17 volumoj da teksto, kune kun kvar volumoj da gravurabeloj; poste oni aperigis sep aliajn volumojn da gravuraĵoj. L'*Encyclopédie* estis ofte represata kaj tradukata; suplementon oni aperigis en Amsterdam 1776—1777 (kvin fol. vol.). Ĝi estis vera batalilo kaj sendube ĝi preparis la animstatojn por la Franca Revolucio, atakante la eklezion kaj la absolutismon.

Ne malpli grava, sed laŭ malsama vidpunkto estas la *Encyclopaedia Britannica*, kiu disfloris de malgranda burĝono. La unua eldono aperis en Edinburgh de 1768—1771 kaj konsistis el tri kv. vol. Ĝia originala trajto estas la monografia karaktero de la artikoloj, cetere ordigitaj laŭalfabete: anstataŭ dis-erigi la sciencojn, penante pri-rakti ilin sub granda nombro da teknikaj terminoj, oni penis doni sisteman bildon de ĉiu scienco. La *Encyclopaedia* pligrandigis kaj pligravigis kun ĉiu eldono, sed ĝia fundamento ne ŝanĝigis. Precipe de post la 9a eldono (1875—1889, 24 kv. vol.) ĝi akiris grandan famon pro la scienca valoro de siaj artikoloj, ofte fariĝintaj klasikaj. Kaj tian famon ĝi konservis per la sekvantaj eldonoj, ĝis la 13a. La 14a eldono, publikigita per unu fojo en 1929, ŝajnas iom malsupera je l' antaŭaj, ĉar oni rimark-eble malplilongigis multajn traktaĵojn kaj la altan scienca nivelon ne ĉiam oni atingis.

Apartan mencion meritas ankaŭ la Brockhaus-a *Konversations-Lexikon*, tial, ke ĝi fariĝis de granda serio da enciklopediaj verkoj, pro la bonega arango kaj la facil-eco de konsultado. Ĝi estis iniciatita de G. R. Löbel kaj la unuaj kvar oktavaj volumoj aperis de 1796 ĝis 1800,

volumo kvina aperis en 1806. Tiam akiris la proprecon de la verko J. A. Brockhaus, kiu publikigis ĝis 1811 la lastan kaj du suplementajn volumojn. Por pravi la sukceson de la verko sufiĉas diri, ke la 12 000 ekzempleroj de la kvina eldono elĉerpe vendiĝis antaŭ la fino de la presado kaj tial estis necese pretigi sinsekve du aliajn pres-seriojn kun 20 000 ekzempleroj dum nur du jaroj. La triumfa irado de tiu verko ankoraŭ daŭras kaj nuntempe oni publikigas la 15an eldonon. Krom la multaj fremdaj S-ta Louis IX, ĉ. 1250). En tiu ĉi lasta parto, Vincent imitajoj, estu citataj la germanaj konversaciaj leksikonoj de Meyer, kiu bone konkuras kun la modelo, de Herder laŭ katolika vidpunkto), de Pierer.

Du kolosaj enciklopedioj, kiuj restis nekompletaj, estas la *Encyclopédie méthodique, ou par ordre de matière*, publikigita de la Paris-aj eldonistoj Pancoucke kaj Agasse de 1782 ĝis 1832 (337 partoj da teksto kaj 51 da gravuraĵoj); kaj la *Allgemeine Encyclopädie der Wissenschaften und Künste*, iniciatita de J. S. Ersch, kaj poste de J. G. Gruber, en 1813, kies publikigon oni interrompis en 1890, post la apero de 167 volumoj.

Sed eĉ pli grandaj estas du finaj enciklopedioj: *Yung Lo Ta Tien*, kompilita laŭ ordono de la imperiestro Yung Lo (1403—1425), kiu konsistis el 11 995 volumoj, sed estis neniam presata; ekzistis, krom la originalo, du kopioj de ĝi; sed unu kopio kaj la originalo, garditaj en Nanking, pereis ĉe la falo de la dinastio Ming, dum la alia kopio estis detruita, kiam la eŭropaj soldataroj okupis la imperiestran palacon de Pekino en 1900.

La alia fina enciklopedio nomigas *T'u shu chi chêng*, estis kompilita laŭ ordono kaj instrukcioj de la imperiestroj K'ang Hsi kaj Yung Chêng (1661—1725) kaj konsistas el 5020 volumoj. Unu kompleta ekzemplero ekzistas ĉe la British Museum en Londono, dum aliaj ekzempleroj de la eldono presita en Shanghai en 1889 kaj ampleksantaj 1628 volumojn estas gardataj en germanaj bibliotekoj.

Listo de nunaj enciklopedioj:

La jena listo ne estas kompleta: ĝi registras nur la ĉefajn enciklopediojn ĝeneralajn, kaj nur la plej modernajn. La enciklopedioj en publikigado estas signitaj per steleto. La enciklopediaj verkoj estas klasigeblaj laŭ tri tipoj:

- A) enciklopedioj, kun alta scienca nivelo, detalaj traktadoj per monografiaj artikoloj; ekz.: „Encyclopaedia Britannica“;
- B) konversaciaj leksikonoj; multaj kaj koncizaj artikoloj por mezkleraj personoj, kun precizaj informoj facile superrigardeblaj; ekz.: „Brockhaus Konversations-Lexikon“
- C) enciklopediaj vortaroj, kiuj klarigas ankaŭ la komunajn vortojn de la lingvo, kun koncizaj sciencaj klarigoj, multe da anekdotoj, kuriozaĵoj, praktikaj informoj; ekz.: „Dictionnaire universel“ de P. Larousse.

Respondaj literoj montras la tipon de la enciklopedioj.

Anglaj:

(A) „The Encyclopaedia Britannica“, 14a eldono, 24 kvartaj volumoj, London kaj New York 1929. — La 24a volumo konsistas el atlaso kaj indekso; direktoro estis J. L. Garvin, anglo; vicdirektoro Franklin H. Hooper, usonano. La verko havas ĉ. 45 000 artikolojn, multaj estas tre ampleksaj. Ankoraŭ konsultindaj estas la eldonoj 9a (London 1875—1889, 24 kvartaj volumoj kaj indekso), 10a (la antaŭa kaj 11 suplementaj volumoj, London 1902), 11a (London 1910—1911, 29 volumoj) kun la 3 suplementaj volumoj de 1922 (12a eldono) kaj la 3 suplementaj volumoj de 1926 (13a eldono). La unua eldono, 3 kvartaj volumoj, aperis en Edinburgh 1768—1771, sub direktado de Colin Macfarquhar kaj William Sweet.

(B) „The new international Encyclopaedia“, 2a eldono, 25 oktavaj volumoj, New York 1914—1924. — Mallongaj artikoloj, usona vidpunkto, multaj usonaj biografioj.

Ĉeĥaj:

(B) „Ottův Slovník Naučný.“ Ilustrovaná encyklopaedie obecných vědomostí: 28 oktavaj vol., Praha. Eldonis J. Otto 1888—1909. — Sufiĉe ampleksaj artikoloj.

(B) * „Masarykův Slovník Naučný: lidová encyklopedie všeobecných vědomostí“, Praha, 1925—. — Populara verko kun mallongaj artikoloj.

Dana:

(B) „Salmonsens Konversations-Leksikon“, 2a eldono, redaktita de Chr. Blangstrup, 25 oktavaj volumoj, København, 1915—1928. Unua eldono: København 1893—1911.

Francaj:

(C) * „Larousse du XXe siècle“, Paris, 1928. — Multegaj mallongaj artikoloj; populara, ankaŭ vortaro de la lingvo. Ankoraŭ utilaj la antaŭaj eldonoj:

(C) P. Larousse. „Grand dictionnaire universel du 19e siècle“, 17 kvartaj volumoj, Paris 1864—1890. — Ĝi enhavas ankaŭ leksikografian parton, sufiĉe longajn artikolojn kun multaj anekdotoj kaj kuriozaj sciigoj, kaj resumojn de multaj verkoj sub iliaj titoloj.

(C) C. Augé, „Nouveau Larousse illustré: dictionnaire universel encyclopédique“, 7 kvartaj volumoj, Paris 1897—1907. — Ĝi estas resumo de la antaŭa, kompletigita kaj aktualigita. Por kompletigi ĝin, la eldonejo publikigas „Larousse mensuel illustré“, de post 1907.

(A) „La grande Encyclopédie: inventaire raisonné des sciences, des lettres et des arts“, 31 kvartaj volumoj, Paris 1885—1901. — Multe pli scienca kaj detala de la antaŭirantaj: la unua parto (vol. 1—22: A—Manzoni) enhavas ampleksajn altvalorajn artikolojn; poste, la eldonisto bankrotis kaj oni ege mallongigis la traktatojn, tiel ke la dua parto de la verko plenigas nur 9 volumojn.

Germanaj:

(B) * „Der grosse Brockhaus: Handbuch des Wissens“, 15a eldono, Leipzig, 1928—. — Tiu ĉi eldono ampleksos 20 volumojn oktavajn. La unua eldono aperis, en 8 volumoj, de 1796—1811, kaj tuj la verko estis multe imitata. La artikoloj estas koncizaj, sed kompletaj kaj tre praktikaj kaj tuj respondas al la demandoj de la leganto. La 14a eldono, en 17 volumoj, aperis de 1893 ĝis 1897; kaj, revizite, ĝi estis represata, kiel jubilea eldono, de 1901—1904.

(B) „Meyers Lexikon“, 7a eldono, 12 oktavaj volumoj, Leipzig 1924—1930. — La unua eldono aperis de 1840—1852, kun la titolo „Meyers Grosses Konversations-Lexikon“, 52 oktavaj volumoj. La 6a eldono aperis de 1902—1908 kaj havis 21 volumojn; 3 suplementajn volumojn oni publikigis 1909—1916. — Menciinda estas ankaŭ:

(B) „Pierers Konversations-Lexikon“, 7a eldono, prizorgita de Joseph Kürschner; 12 oktavaj volumoj, Berlin kaj Stuttgart, 1888—1893. — La unua eldono konsistis el 26 volumoj kaj estis publikigita de 1826—1836; 14 suplementaj volumoj aperis de 1840—1856. La 7a eldono donas ĉe ĉiu germana vorto la tradukojn ĉeĥan, danan,

anglan, francan, malnov-grekan, holandan, italan, latinan, rusan, svedan, hispanan, hungaran; kaj ĉe la eksteraj marginoj de la paĝoj estas presita la plena listo de la fremdlingvaj vortoj kun la germana traduko: ĝis la 10a volumo, laŭ unu alfabeto, la vortoj apartenantaj al lingvoj, kiuj estas skribitaj per latina alfabeto, en la 11a volumo la grekaj vortoj kaj en la 12a la rusaj.

Greka:

(C) * „Enyklopaïdikòn Lexikòn“, Ateno, 1927—, kvartaj volumoj.

Hispana:

(C) „Enciclopedia universal ilustrada europeo-americana“ („Enciclopedia Espasa“), 72 oktavaj volumoj, Barcelona (1908—1930. — Tiu ĉi estas eble la plej granda enciklopedio nuntempe ekzistanta; ĝi tradukas la ĉefajn vortojn en la lingvoj franca, itala, angla, germana, portugala, kataluna kaj Esperanto. La vastega kompilaĵo havas tre malegalaĵon valoron. Pli frue oni uzis la verkon titolitan

(C) „Diccionario enciclopédico hispano-americano de literatura, ciencias, artes etc.“, 28 kvartaj volumoj, Barcelona (1887—1910). — Ĝi estas represata en London 1912.

Holanda:

(B) * „Oesthoek's geïllustreerde Encyclopaedie“, 2a eldono, Utrecht 1925—. — Ĝi konsistas el 12 volumoj oktavaj. La unua eldono, en 12 volumoj, aperis 1916—1923.

Italaj:

(A) „Nuova Enciclopedia Italiana, ovvero Dizionario generale di scienze, lettere, industrie ecc.“, 6a eldono, 26 kvartaj volumoj, Torino 1875—1888. — La unua eldono, el 13 volumoj, aperis en Torino kiel „Nuova Enciclopedia popolare“ de 1841—1848; menciinda estas ankaŭ la 4a ĝis 5a eldono, el 25 volumoj, krom 3 da suplemento, aperinta de 1857—1869. La 6a eldono estis kompletigata per 6-voluma suplemento aperinta de 1888—1899. La verko estas entute tre bona.

(B) „Lexicon Vallardi: Enciclopedia universale illustrata“, 11 oktavaj volumoj, Milano 1887—1899.

(C) * „Grande Enciclopedia popolare Sonzogno“, Milano, 1913—, kvartaj volumoj. — Kompilaĵoj por mezklera personoj. La dua estas pli populara.

(A) * „Enciclopedia Italiana di scienze, lettere ed arti“, Roma, 1929—. — Grava scienca verko, plene originala, publikigata de tiucele fondita Istituto Giovanni Treccani. Ĝi ampleksos 36 kvartajn volumojn kaj aperos ĝis Decembro 1937.

* „Enciclopedia delle Enciclopedie“, Roma 1930—. — Ĝi konsistas el 18 oktavaj volumoj, el kiuj ĉiu pritraktos apartan sciencan aŭ sciencogrupon.

Jugoslava:

(B) „St. Stanojevič. Narodna enciklopedija srpsko-hrvatsko-slovenačka“, 4 oktavaj volumoj, Zagreb 1925—1929.

Polaj:

(B) „S. Orgelbranda Encyklopedja powszechna“, 18 oktavaj volumoj, Warszawa 1898—1912. — La unua eldono, 28 volumoj, aperis 1859—1868.

(B) „Podreczna encyklopedya kościelna“, 22 oktavaj volumoj, Warszawa 1904—1916 (katolika-eklezia).

(B) „Ilustrowana Encyklopedja Trzaski, Everta i Michalskiego“, 5 oktavaj volumoj, Warszawa 1928.

Rusaj:

(A) „Enciklopedičeskij slovarj“, 43 oktavaj volumoj, S.-Peterburg 1890—1906. — Unue intencita kiel traduko de la Konversacia Leksikono de Brockhaus, ĝi fariĝis tute sendependa verko, kun tre valoraj artikoloj originalaj, ankoraŭ nun utilaj.

(A) * „Boljšaja sovjetskaja enciklopedija“, Moskva, 1926—.

(B) * „Malaja sovjetskaja enciklopedija“, Moskva 1928—. — Male je preskaŭ ĉiuj enciklopedioj, kiuj penas senpartie pritrakti la diversajn subjektojn, la du lastaj estas verkitaj laŭ marksisma vidpunkto. La artikoloj pri la ekzaktaj sciencoj estas bonegaj, klaraj, sed ne suprajaj. Grandan atenton kaj lokon oni donas al la teknologiaj artikoloj. La dua estas resumo, celanta la popolklerigon.

Sveda:

(B) * „Nordisk Familjebok: Encyklopedi och Konversationslexikon“, Stockholm 1923—. — La unua eldono, 18 volumoj, aperis 1874—1894, sub la direkto de N. Linder, J. Rosén kaj Th. Westrin. La suprenomita estas la 3a eldono.

Lingvaj malplimultoĵoj

(Minoritatoĵoj)

Unuafoje estis formulita la jura bazo postmilita de la minoritatoĵoj en letero de Clémenceau al Paderewski, en 1919. Prezidanto Wilson en unu el siaj unuaj projektoj skribis: „La Ligo de Nacioj postulos, ke ĉiuj novaj ŝtatoĵoj estos rekonitaj kiel sendependaj kaj aŭtonomaj, kondiĉe, se ili sindevigas doni al ĉiuj etnikaj aŭ naciaj minoritatoĵoj, sin trovantaj sub ilia aŭtoritato, ekzakte la saman protektaĵon kaj sekurecon, juran kaj faktan, kian ili donas al la etnika aŭ nacia plimulto de sia propra loĝantaro.“

En la kontrakto de la Ligo de Nacioj la problemoj de minoritatoĵoj ne estas tuŝita. Sed inter 1919 kaj 1924 estis subskribitaj apartaj kontraktoj inter la Ligo kaj 14 apartaj ŝtatoĵoj, en kiuj la situacio de minoritatoĵoj estis leĝigita. En 1927 jenaj landoj sankciigis la subskribitajn traktatojn pri la protekto de minoritatoĵoj: Albanujo, Aŭstrio, Bulgaraĵo, Ĉeĥoslovakaĵo, Estonujo, Finnlando, Greklando, Hungaraĵo, Jugoslavaĵo, Latvolando, Litovaĵo, Polujo, Rumanujo, Turkujo. Ekzistas du kategorioj da traktatoĵoj, kiuj devigas la subskribintajn ŝtatojn. Unue, tiuj, kiuj devigas al ĝenerala protektaĵo. Ĉefaj punktoj: *Nacieco* (regnaneco) estas akirata per la fakto de konstanta loĝado aŭ de naskiĝo en la koncerna ŝtato. Estas egaleco de ĉiuj ŝtatanoj antaŭ la leĝo, egaleco de civilaj kaj politikaj rajtoj, egaleco de traktado kaj garantio juraj kaj faktaj. Diferenco de raso, lingvo, religio ne malhelpu al la okupo de postenoj, oficoj, funkcioj, kaj al la akiro de gradoj, honorigoj, titoloj, aŭ al plenumado de profesioj, industrioj. Minoritatoĵoj rajtas fondi, subvencii, estri, kontroli diversajn instituciojn kun la celoj bonfaraj, religiaj, sociaj, instruaj, edukaj, kaj alispecaj. En tio ili rajtas uzi sian patrinlingvon kaj libere praktiki sian religion. Rilate al minoritata lingvo la ŝtato neniel ĝin limigu, lasante plenan liberecon por ĝia uzado en komerco, industrio, privataj rilatoĵoj, korespondado, gazetaro kaj publikaj kunvenoj; ĉe tribunaloj, minoritata lingvo estu uzata oficiale — skribe kaj parole. En lokoj kun sufiĉa nombro da minoritanatoĵoj ilia lingvo estu uzata en elementaj lernejoj kiel oficiala instru lingvo, sed tio ne malhelpos, ke la regna lingvo estos ankaŭ instruata kiel deviga branĉo. Tiaj ŝtataj lernejoj havu sian parton da budĝeto, kaj normalajn kontribuojn el la regna, urba aŭ komunuma kasoj. Ankaŭ re-

ligiaj, bonfaraj kaj edukaj institucioj de minoritatoĵoj havu saman rajton el la budĝeto de la lando.

Atentinda diferenco ekzistas en la lingvoj angla kaj franca unuflanke, germana kaj slava aliflanke: la vorto *nacieco* signifas por la unuaj nur ŝtatan apartenecon (regnanecojn), kaj por la duaj — etnikan popolon kun aparta lingvo. Antaŭ la milito la internacia juro konfidis la protekton de minoritatoĵoj al Grandaj Potencoj. Post la milito la Pac-traktatoĵoj inaŭguris novan sistemon: la Konsilantaro de la Ligo de Nacioj kaj la Konstanta Kortumo de Internacia Justeco en Hago — estas du oficialaj organoj, kiuj devas plenumi la taskon de la garantiita protektaĵo de minoritatoĵoj.

Funkciaj sekve de tio speciala „Departemento de Minoritatoĵoj“, kiu konsistas el ses membroj sekciaj, du membroj de intermeza klaso, tri sekretarioj-stenografoj. La budĝeto de la Departemento kreskis de 175 000 svis. Fr. en 1921 ĝis 333 718 svis. Fr. en 1929.

Peticioj, postuloj, demandoj kaj informoj povas esti adresataj de ĉiu ajn persono aŭ grupo, societo aŭ institucio, privata organizo aŭ regno, nur sub jenaj kondiĉoj:

- a) Esti konformaj al la traktatoĵoj;
- b) ne havi la formon de rompo de politikaj rilatoj inter minoritato kaj koncerna regno;
- c) ne esti anonimaj, aŭ neklare devenantaj;
- d) esti verkitaĵoj en trankvila stilo, sen incitigaj esprimoj;
- e) enhavi sciigojn aŭ noti faktojn, kiuj ne estis jam ekzamenataj en ordinara proceduro antaŭ nelonge.

Krom la du nomitaj organoj, la ĝenerala kunsido de la Ligo de Nacioj povas diskuti problemojn kaj demandojn pri minoritatoĵoj.

Estas starigita jena ordo en la proceduro: Kiam alvenas iu peticio, la sekretario de la Minoritata Departemento ĝin akceptas, se ĝi plenumas la kvin suprenomitaĵojn kondiĉojn, kaj li sendas ricevatoston, kiu informas la adresinton pri la ricevo, kiu tute ne signifas, ke la peticio estas jure aprobita aŭ oficiale akceptita laŭ la enhavo. La Departemento transdonas la enhavon de la peticio unuflanke al la Membroj de la Konsilantaro de la Ligo de Nacioj, aliflanke al la koncerna regno, por ke ĝi komuniku siajn rimarkojn. Poste la Komitato de Trio ekzamenas la peticion kun la eventualaj alvenintaj rimarkoj. Fine, la respondo estas sendata al la plendinto.

Lingvoj en Eŭropo.

La sekvanta tabelo rezultas el la lingvistika verko de Prof. A. Meillet, *Les Langues dans l'Europe Nouvelle*, dua eldono 1928, el kiu ni uzis detalan liston, kompilitan de Prof. L. Tesnière (Strasburgo), kiu unuigis diversdatajn dokumentojn, kalkulinte ilin ĝis la 1a de Januaro 1927. Ni sekvis lian metodon, daŭrigante la kalkulon ĝis la 1a de Januaro 1931, utiligante lastajn oficialajn statistikojn kaj sciencajn studojn, aperintajn post la supra verko. Jam oficialaj nombroj, kiel tion montris L. Tesnière, ne estas korektaj, pro cirkonstancoj aŭ pro taktika tendenco. La ĝisdata kalkulo aldonas pluan neprecizecon, ĉar la popolkresko varias de jaro al jaro, sed ne restas tia, kian supozas la kalkulanto. Tamen, en fina rezulto, plimulto da nombroj estas precizaj je 2 aŭ 3%, anstataŭ diferenci de la realaĵo je 10 aŭ 15%, kio estus, se ni simple adoptus la oficialajn nombrojn. Kelkaj gravaj mankoj ĉe Tesnière devigis nin aldoni novajn nombrojn, kaj pliajn lingvojn por kelkaj landoj. Ekzemple, laŭ Tesnière ne ekzistas judhispanoj en Greklando, nek ciganoj en Rumanujo. Tamen ĉiu geografo scias, ke nur en la urbo Saloniki judhispanoj formas du trionojn da loĝantaro, kaj en Rumanujo ciganoj estas proporcie pli nombraj ol en ĉiuj najbaraj landoj. Por Hungarujo Tesnière modeste donas la nombron de 7310, dum Guido Coras indikas 170 000 da ciganoj. Pli ol 200 000 judgermanoj en Hungarujo malaperis en la tabelo de Tesnière, kaŝitaj sub rubriko de „germanoj“. Tiajn kombinojn ni kontrolis kaj korektis laŭbezone. Tamen, la respondeco pro tiaj aliigoj restas sur la oficialaj statistikoj, kaj ankoraŭ pli sur la konscienco de civitanoj, kiuj neĝuste deklaris sian naciecon (etnografian apartenon al iu lingvo, raso aŭ religio).

Ŝtatoj kaj lingvoj

Resumo:

Landoj: loĝantaro. Proc.: 1) lingva plimulto, 2) malplimulto. Divido de l' lingvaj malplimultoĵoj. Nombro en miloj. Sume = la sumo de l' lingvaj malplimultoĵoj en miloj. Enhavas la ŝtatojn kaj eksterlandanoj daŭre loĝantaj en tiu lando.

Albanujo 872 000 — 94% 6%
macedo-slava kaj serba 32, cigana 12, greka 5, judhispana 5, ceteraj 1, sume: 55.

Aŭstrio 6 400 000 — 91% 9%
jud-germana 300, slovena 95, ĉeĥa 78, serbo-kroata 45, hungara 12, itala 9, pola 2,7, rusa 2, slovaka 1,4, rutena 1,4, ceteraj 6, sume: 552,5.

Belglando 8 100 000 (dulingva)
flandra 4100, franca 3564, germana 96, ceteraj 340, sume: 436.

Britujo 49 000 000 — 96% 4%
kimra 1100, irlanda 400, jud-germana 300, skota 150, franca 50, manksa 0,6, ceteraj ?, sume: 2000,6 (?).

Bulgarujo 5 330 000 — 80% 20%
turka 600, macedo-slava 200, cigana 80, rumana kaj cincara 80, greka 50, jud-hispana 45, armena 12, rusa 10, tataara 4,5, germana 3,6, ĉeĥa 1,9, albana 1,6, slovaka 1,5, serba 1,3, ceteraj 4, sume: 1095,4.

Ĉeĥoslovakujo 14 800 000 — ĉeĥa kaj slovaka 66%,
ceteraj 34%.
ĉeĥa 7575, germana 3350, slovaka 2200, hungara 830, rutena 530, jud-germana 200, pola 87, rumana 13, cigana 11, ceteraj 4, sume: 7225.

Danlando 3 600 000 — 98,7% 1,3%
germana 43, ceteraj 2, sume: 45.

Danzig 380 000 — 92% 8%
pola 14, jud-germana 10, rusa 3, ceteraj 3, sume: 30.

Estonio 1 150 000 — 86% 14%
rusa 102, germana 21, sveda 8, latva 5,6, jud-germana 5, ceteraj 15, sume: 156,6.

Finlando 3 700 000 — 89% 11%
sveda 400, jud-germana 10, rusa 6, germana 3, lapona 2, ceteraj 1, sume: 422.

Franclujo 41 500 000 — 87% 13%
germana 1416, itala 1200, bretona 1000, hispana 320, flandra 460, pola 315, kataluna 300, baska 120, rusa 100, jud-germana 90, galica 46, cigana 2, ceteraj 100, sume: 5469.

Germanujo 65 000 000 — 96% 4%
pola 1200, vened-soraba 130, jud-germana 400 (?), rusa 90, ĉeĥa kaj slovaka 60, frisa 30, litova 29, holanda 26, franca 13, dana 12, ceteraj 600, sume: 2590 (?).

Gibraltaro 22 000 — 77% 23% — hisp. 17, angla 5.
 Greklando 6 800 000 — 90% 10%
 bulgara 200, macedo-slava 200, jud-hispana 130, albana 100, cincara 22, itala 12, turka 3, armena 2, cigana 2, ceteraj 10, sume: 681.

Hispanujo 24 000 000 — 66% 34%
 kataluna 5000, galica (portugala dialekto) 2300, baska 630, cigana 40, ceteraj 60, sume: 8030.

Hungarujo 8 700 000 — 87% 13%
 germana 330, judgermana 400, cigana 170, slovaka 150, serbo-kroata 82, rumana 26, ĉeĥa 7, slovena 7, rusa 5, rutena 2, ceteraj 15, sume: 1194.

Islando 105 000 — 100% — islanda 105.

Italujo 42 000 000 — 96% 4%
 friula 390, slovena kaj reziana 385, germana 300, serbo-kroata 195, albana 100, franca 100, greka 35, ladina 17, kataluna 13, cigana 12, hungara 7, istromana 1, ceteraj 100, sume: 1655.

Jugoslavujo 13 850 000 — serbokroata kaj slovena 78.4%, ceteraj 21.6%.
 macedo-slava 650, germana 580, hungara 530, albana 480, rumana kaj zincara 260, turka 170, bulgara 76, cigana 60, jud-hispana 30, jud-germana 20, rusa 20, itala 15, ceteraj 100, sume: 2991.

Latvolando 1 950 000 — 70% 30%
 rusa 230, germana 84, jud-germana 82, pola 48, blank-rusa 35, litova 13, estona 5, liva 1,3, ceteraj 60, sume: 558,3.

Liĥtenstejno 13 000 — 100% — germana 13.

Litovujo 2 130 000 — 84% 16%
 jud-germana 160, pola 70, rusa 57, germana 31, latva 16, blank-rusa 5, tataara 1, sveda 1, ceteraj 8, sume: 349.

Luksemburgo 280 000 — 86% 14% (dulingva)
 germana 240, franca 40.

Malto 250 000 — (Angla) 11% 89%
 araba 190, itala 32.

Memelo 147 000
 litova 71, germana 50, jud-germana 25, ceteraj 1, sume: 147.

Monako 25 000 — 100% — franca 25, ceteraj ?.

Nederlando 7 600 000 — 94% 6%
 frisa 330, jud-germana 100, ceteraj 20, sume: 450.

Norvegujo 2 900 000 — 99% 1%
 lapona 18, finna 5, ceteraj 6, sume: 29.

Polujo 31 400 000 — 66% 34%
 ukraina 4600, jud-germana 2400, blank-rusa 1700, germana 1000, rusa 665, kaŝuba 160, litova 80, ĉeĥa 35, cigana 30, latva 15, ceteraj 40, sume: 10725.

Portugalujo 6 000 000 — 99.5% 0.5%
 fremduloj 30.

Rumanujo 18 000 000 — 72% 28%
 hungara 1400, jud-germana 900, germana 600, ukraina 600, rusa 500, bulgara 400, cigana 300, turka 180, jud-hispana 72, tataara 50, armena 40, greka 30, serba 30, macedo-slava 10, ceteraj 40, sume: 5152.

Saarteritorio 800 000 — 99% 1% (Germana)
 fremduloj 5.

San Marino 14 000 — itala 100%

Sovetunio 125 000 000 — 56% 44%
 ukraina 30000, blank-rusa 5000, jud-germana 3500, volga-tatara 1800, azerbeĝan-tatara 1600, armena 1600, baskira 1500, mordova 1100, ĉuvaŝa 1080, georgia (kartvela) 900, germana 900, pola 860, votiaka 480, ĉeremisa 400, ĉeĉena 320, mingrela 250, greka 240, oseta 230, aŭara 220, krime-tatara 200, ziriana 180, moldava 170, turk-osmana 150, kurina 140, dargva 135, perma 130, latva 128, tata 126, estona 122, finna 120, kabarda 118, kumika 112, karela 108, kalmuka 104, kurda 102, taliŝa 92, laka 91, ĉerkesa 64, abhaza 62, nogaj-tatara 60, kirgiza 59, karapapaĥa 40, karaĉa 30, tabasarana 28, kabard-tatara 26, svana 24, laza 21, oloneca 20, persa 17, turkmena 16, vepsa 16, cigana 14 (?), rutula 12, uda 10, sveda 9, ingra 8, agula 8, samojeda 4, lapona 2, kaj multaj aliaj, sume: 55 000.

Svedlando 6 300 000 — 99% 1%
 finna 32, lapona 8, ceteraj 40, sume: 80.

Svislando 4 100 000 (tri-lingva)
 germana kaj svis-germana 2900, franca 870, itala 252, romanĉa 45, ceteraj 33, sume: 4100.

Turkujo 1 530 000 — 62% 38% (Eŭropa parto)
 greka 290, bulgara 80, armena 60, ĉerkesa 50, jud-hispana 40, itala 20, cigana 20, albana 12, rusa 6, ceteraj 12, sume: 590.

Vatikano 600 — 100% — itala 0.6.

Resuma tabelo pri lingvoj, dispartigitaj en pluraj regionoj
(la ciferoj indikas milojn)

Albana: 817 en Albanujo, 480 en Jugoslavujo, 100 en Greklando, 100 en Italujo, 12 en Turkujo, 1,6 en Bulgarujo, sume: 1510,6.

Armena: 1600 en Sovetunio, 60 en Turkujo, 40 en Rumanujo, 12 en Bulgarujo, 2 en Greklando, 10 aliloke, sume: 1724.

Baska: 630 en Hispanujo, 120 en Francujo, sume: 750.

Blank-rusa: 5000 en Sovetunio, 1700 en Polujo, 35 en Latvolando, 5 en Litovujo, sume: 6740.

Bulgara: 4237,6 en Bulgarujo, 400 en Rumanujo, 200 en Greklando, 80 en Turkujo, 76 en Jugoslavujo, sume: 4993,6.

Cigana: 300 en Rumanujo, 170 en Hungarujo, 80 en Bulgarujo, 60 en Jugoslavujo, 40 en Hispanujo, 30 en Polujo, 20 en Turkujo, 14 en Sovetunio, 12 en Italujo, 12 en Albanujo, 11 en Ĉeĥoslovakujo, 2 en Greklando, 2 en Francujo, 10 aliloke, sume: 763.

Ĉeĥa kaj morava: 7575 en Ĉeĥoslovakujo, 78 en Aŭstrio, 58 en Germanujo, 35 en Polujo, 7 en Hungarujo, 1,9 en Bulgarujo, sume: 7754,9.

Ĉerkesa: 64 en Sovetunio, 50 en Turkujo, sume: 114.

Dana: 3555 en Danlando, 12 en Germanujo, sume: 3567.

Estona: 993,4 en Estonio, 122 en Sovetunio, 5 en Latvolando, sume: 1120,4.

Finna: 3278 en Finnlando, 120 en Sovetunio, 32 en Svedlando, 5 en Norvegujo, sume: 3435.

Franca: 36031 en Francujo, 3564 en Belglando, 870 en Svislando, 100 en Italujo, 50 en Britujo, 25 en Monako, 13 en Germanujo, 2 en Besarabio, sume: 40655.

Frisa: 330 en Nederlando, 30 en Germanujo, sume: 360.

Germana: 62410 en Germanujo, 5847,9 en Aŭstrio, 3350 en Ĉeĥoslovakujo, 2900 en Svislando, 1416 en Francujo, 1000 en Polujo, 900 en Sovetunio, 795 en Saartitorio, 600 en Rumanujo, 580 en Jugoslavujo, 350 en Danzig, 330 en Hungarujo, 300 en Italujo, 240 en Luksemburgo, 96 en Belgio, 84 en Latvolando, 50 en Memelo, 43 en Danlando, 31 en Litovujo, 21 en Estonio, 13 en Liĥtenstejno, 3,6 en Bulgarujo, 3 en Finnlando, sume: 81363.

Greka: 6129 en Greklando, 290 en Turkujo, 240 en Sovetunio, 50 en Bulgarujo, 35 en Italujo, 30 en Rumanujo, 10 en Jugoslavujo, 5 en Albanujo, sume: 6779.

Hispana: 15970 en Hispanujo, 320 en Francujo, 17 en Gibraltaro, sume: 16307.

Holanda kaj flandra: 7150 en Nederlando, 4100 en Belglando, 460 en Francujo, 26 en Germanujo, sume: 11736.

Hungara: 7506 en Hungarujo, 1400 en Rumanujo, 830 en Ĉeĥoslovakujo, 530 en Jugoslavujo, 12 en Aŭstrio, 7 en Italujo, sume: 10285.

Itala: 40345 en Italujo, 1200 en Francujo, 252 en Svislando, 32 en Malto, 20 en Turkujo, 15 en Jugoslavujo, 14 en San Marino, 12 en Greklando, 9 en Aŭstrio, 6 en Belglando, sume: 41905.

Jud-germana: 3500 en Sovetunio, 2400 en Polujo, 900 en Rumanujo, 400 en Hungarujo, 400 en Germanujo, 300 en Aŭstrio, 300 en Britujo, 200 en Ĉeĥoslovakujo, 160 en Litovujo, 100 en Nederlando, 90 en Francujo, 82 en Latvolando, 25 en Memelo, 20 en Jugoslavujo, 10 en Finnlando, 10 en Danzig, 5 en Estonio, sume: 8807 (? en aliaj landoj 1000?).

Jud-hispana: 130 en Greklando, 72 en Rumanujo, 45 en Bulgarujo, 40 en Turkujo, 30 en Jugoslavujo, 5 en Albanujo, sume: 322.

Kataluna: 5000 en Hispanujo, 300 en Francujo, 13 en Italujo, 6 en Andoro, sume: 5319.

Lapona: 18 en Norvegujo, 8 en Svedujo, 2 en Finnlando, 2 en Sovetunio, sume: 30.

Latva: 1391,7 en Latvolando, 128 en Sovetunio, 16 en Litovujo, 15 en Polujo, 5,6 en Estonio, sume: 1556,3.

Litova: 1781 en Litovujo, 80 en Polujo, 71 en Memelo, 29 en Germanujo, 13 en Latvolando, sume: 1974.

Macedo-slava: 650 en Jugoslavujo, 200 en Greklando, 200 en Bulgarujo, 10 en Rumanujo, 27 en Albanujo, sume: 1067.

Pola: 21675 en Polujo, 1200 en Germanujo, 860 en Sovetunio, 315 en Francujo, 87 en Ĉeĥoslovakujo, 70 en Litovujo, 48 en Latvolando, 14 en Danzig, 2,7 en Aŭstrio, sume: 24271,7.

Portugala: 5970 en Portugalujo, 2300 en Hispana Galicio, 46 en Francujo, sume: 8316.

Rumana kaj cincara, moldava, istra: 12848 en Rumanujo, 260 en Jugoslavujo, 170 en Sovetunio, 80 en Bulgarujo, 26 en Hungarujo, 22 en Greklando, 13 en Ĉeĥoslovakujo, 1 en Italujo, sume: 13420.

Rusa (grand-rusa): 70000 en Sovetunio, 665 en Polujo, 500 en Rumanujo, 230 en Latvolando, 102 en Estonio, 100 en Francujo, 90 en Germanujo, 57 en Litovujo, 20 en Jugoslavujo, 10 en Bulgarujo, 6 en Finnlando, 6 en Turkujo, 5 en Hungarujo, 3 en Danzig, 2 en Aŭstrio, (200 ne registritaj), sume: 71996 (?).

Rutena kaj ukraina: 30000 en Sovetunio, 4600 en Polujo, 600 en Rumanujo, 530 en Ĉeĥoslovakujo, 2 en Hungarujo, 1,4 en Aŭstrio, sume: 35733,4.

Serbo-kroata: 9659 en Jugoslavujo, 195 en Italujo, 82 en Hungarujo, 45 en Aŭstrio, 30 en Rumanujo, 5 en Albanujo, 1,3 en Bulgarujo, sume: 10017,3.

Slovaka: 2200 en Ĉeĥoslovakujo, 150 en Hungarujo, 2 en Germanujo, 1,4 en Aŭstrio, sume 2353,4.

Slovena (vinda): 1200 en Jugoslavujo, 385 en Italujo, 95 en Aŭstrio, 7 en Hungarujo, 1,5 en Bulgarujo, sume: 1688,5.

Sveda: 6220 en Svedlando, 400 en Finnlando, 9 en Sovetunio, 8 en Estonio, 1 en Litovujo, sume: 6638.

Tatara: 3686 en Sovetunio, 50 en Rumanujo, 4,5 en Bulgarujo, 1 en Litovujo, sume: 3741,5.

Turka (osmana): 940 en eŭropa Turkujo, 600 en Bulgarujo, 180 en Rumanujo, 170 en Jugoslavujo, 150 en Sovetunio, 3 en Greklando, sume: 2043.

(La redakcio invitas la legantojn ekzameni tiujn ciferojn kaj atentigi nin per taŭgaj pruvoj pri neĝustajtoj.)

23a Kongreso de Esperanto en Kraków 1931

Anoncu vian partoprenon ĉe la sekretarioj,
34 Lubicz, Kraków

Gramofon-diskoj en Esperanto

Orda n-ro	Firmo produktinta	N-ro de la disko	Diametro en cm	Titolo	
1.	Linguaphone, London	Es. Es. 1	30	Zamenhof: Pri Homaro	1
	"	Es. Es. 2	—	" " "	2
2.	"	Es. Es. 3	30	Zamenhof: Poezio	1
	"	Es. Es. 4	—	" "	2
3.	"	Es. Es. 5	30	Zamenhof: Pri Elparolado	1
	"	Es. Es. 6	—	Zamenhof: Pri Stilo	2
4.	"	Es. Es. 7	30	Privat: Prozo	1
	"	Es. Es. 8	—	" Parolado	2
5.	"	Es. Es. 9	30	Privat: Poezio	1
	"	Es. Es. 10	—	" "	2
(Sume 5 diskoj duflankaj, parolitaj de D-ro Edm. Privat)					
6.	Esperanto-Institute Welwyn Garden City		25	La Espero. Orkestro	1
	"		—	La Espero. Kanto de F-ino Cosmetto	2
7.	"		25	Kanto unuvoĉa; La Tagiĝo	1
	"		—	Al la fratoj (Maurits Boeren)	2
8.	Tri-Ergon, Berlin			Klarigoj pri la elparolado	1
	"			Privat: Parolado	2
9.	"			Zamenhof: Unua kongreso en Boulogne s. M.	1
10.	"			Flatauer: Prologo	1
	"			Herrnstadt: Parolado pri inventaĵo Tri-Ergon	2
11.	Gregg Publishing Co. London	ST. 662	30	Samideana Trinkkanto	1
	"	ST. 663	—	Muziko de Schubert	1
	"			Pri la deveno de la Greka muziko	2
12.	"	ST. 719	30	La Ieterportisto	1
	"		—	Struvelpetro	2
(Ambaŭ diskoj aranĝitaj de Prof. Findlay)					
13.	His Masters Voice	AM 2152	25	En la drinkejo	1
	"		—	En la drinkejo	2
(Hungaraj popolkantoj. De K. Kalocsay kaj Baghy. Kantita de Mich. Sarossy. Cigana muziko)					
14.	Polydor		25	Esperanto-serba Trinkkanto. M. Nešić	1
	"		—	Fruškogorski marŝo	2
15.	Ultraphon, Praha	15776-78-A 12036	25	Espero. Himno	

La Young-Plano

La packonkludo en Versailles 1919 devigis Germanujon ripari ĉiujn damaĝojn kaŭzitajn per la milito. Apud teritoriaj cedoj, konfiskado de havaĵoj germanaj en la landoj militintaj kontraŭ Germanujo, tiu ĉi akceptis pagi la sumon de 132 miliardoj da or-markoj dum fiksita periodo. (132 miloj da milionoj: 132 000 000 000.) Tiun sumon oni fiksas en la Konferenco en Londono (1922) kaj la tasko enkasigi, administradi kaj dividi estis donita al *Riparada Komisiono* kun sidloko en Berlino. La manieroj „monigi“ tiun sumon estis komplikaj: Pagoj de aĉetantoj en landoj militintaj kontraŭ Germanujo, la tielnomata „ekspordepreno“, liveroj de materialoj por la rekonstruo en detruitaj regionoj, kaj rektaj pagoj de la registaro. La provo kolekti 1 miliardon da or-markoj estis unu el la multaj kaŭzoj de l' disfalo de la germana valuto, kondukinta ĝis senvalorigo de 1—1 000 000 000 000, t. e. 1 ora marko valoris dum aŭtuno 1923 1 bilionon da papermarkoj. Evidentiĝis, ke tiel oni ne atingas justan dividon de la militŝarĝoj. Venis la Komisiono Dawes, kies du raportoj, la *Dawes-Plano* komencigis pli realecan prijuĝon de l' problemo (1924). La germana ekonomio restariĝis, la rentomarko kiel transira valuto preparis la vojon al la nova Reichsmark, pagilo protektita per specialaj leĝoj, inter ili la sendependigo de la eldona institucio, la Reichsbank. La sumoj, kiuj devis pagiĝi jare — ĉirkaŭ 2 miliardoj — venis el doganoj, industria debetigo, fervoja profito, rektaj pagoj. Koncernajn leĝojn akceptis la germana parlamento (1924). La kontrolon de l' pagoj kaj en certa grado de l' germana financa konduto prizorgis *riparada agento*, usona financisto Gilbert Parker.

La Dawes-Plano estis konsiderita kiel transira solvo. Pri multaj problemoj mankis spertoj kaj restis ankoraŭ tro multe da sento de vengemo. Fako ne forigebla estas, ke por pagi la riparadon, Germanujo devas kreskigi sian produkto-kapablon tiagrade, ke rezultas danĝero de inundo en ĉiuj landoj per germanaj varoj. Financ teknikaj problemoj, ekzemple la pago de gigantaj sumoj de unu lando al alia, ekster la kutima pagintersaĝo, necesigis jam la kreon de speciala klaŭzo, la tielnomata „Transferprotektio“. Ĝi celis eviti perturbojn en la regula funkciado de l' kapitalisma ekonomio, en rilatoj de unu lando al alia. Sed

ĉio tio ne povis forigi la fakton de suvereneca limigo de l' germana regno. La ekonomiaj problemoj ligitis kun politikaj: riparado — senarmigo — sekureco. Daŭra ciklo de deziroj kaj postuloj, ĉiu kun certa pravigebleco. Sinsekve la politikistoj klopodis krei interŝtatan „konfidon“: la interkonsento en Locarno (1925), aliĝo de l' Germana Respubliko al la Ligo de Nacioj (1927) estas fruktoj de tiuj klopodoj. La fina punkto devas esti la „senpolitikigo“ de la riparŝuldo, la forigo de kontrolo humiliga por la nacia sento, kaj la ĉesigo de l' okupacio en Rejnlando. Kaj tio estas la celo de l' plano Young.

La konferenco okazis en Parizo, Februaro ĝis Junio 1929. La ĉefaj punktoj estas:

Jarpagoj (Annuités): De 1. Septembro 1929 ĝis 31. Marto 1930, por sep monatoj: 742,8 Milionoj.

1930 (de 1. Aprilo 1930 ĝis 31. Marto 1931): 1700 Milionoj. De 1931/32 kreskanta ĝis 2400 Milionoj dum 35 jaroj. La meza sumo pagota estas 1988,8 Milionoj jare plus rentumo de 90 Milionoj el la Dawes-prunto, finigota en la jaro 1949. Tiam la sumo pagota atingos meze 2050,8 Milionoj. La Dawes-plano fiksas normalan jarpagon de 2500 Milionoj.

Sed post 37 jaroj la pagado ne finos. Venos ankoraŭ 22 jaroj, dum kiuj Germanujo devos pagi inter 1600 ĝis 1700 Milionojn jare, kio malaltigos en la lastaj tri jaroj ĝis 900 Milionoj. Estas antaŭvidate, ke tiuj pagoj tute ne efektiviĝos. Ili prezentas nenion alian ol la pagoj por militŝuldoj de l' Aliancanoj al Usono dum tiu ĉi epoko.

Protektklaŭzoj: Por protekti la germanajn ekonomion kaj valuton estas fiksate, ke sumo de 660 Milionoj jare ĉiuokaze devas esti pagataj. Pri la resto (ĉirkaŭ 1300 Milionoj) ekzistas faciligo rilate la transformo en fremda valuto. Prokrastitaj pagoj devos esti poste plenumotaj. La protektklaŭzo similas al tiu, kiun stipulis Usono por la pagoj de l' militŝuldoj de l' Aliancanoj. Revizio estas antaŭvidata per klaŭzo fiksanta la kompetentecon de Komisiono de l' Internacia Banko ekzameni la pago-kapablon de Germanujo.

Garantioj kaj kontroloj: Ĉiuj antaŭe ekzistintaj garantiaĵoj kaj kontroloj estas forigataj. Ankaŭ

la apartaj ŝarĝoj, ekzemple la hipoteke sur la Regna Fervojo Germana (11 Miliardoj) kaj la industriaj obligacioj de 5 Miliardoj. La fervojo tamen portas dum 37 jaroj imposton, kies jara valoro reprezentas 660 Milionojn kaj respondas al la sumo nepre pagota sen protekto. Restas ankoraŭ kiel garantiaĵoj la enspezoj el dogano, el biero, tabako, sukero kaj brando.

Internacia Banko: Plej interesa punkto en la plano estas la kreo de intervenanto, afera instanco, kiu estas inter ŝuldanto kaj kreditanto. Tio estas la Banko por Internaciaj Pagoj (Banque des Paiements internationaux — Bank für Internationale Zahlungen). Ĝia rolo estas:

Anstataŭ la agenton por riparado. Akcepti la pagojn de Germanujo, prizorgi la dividon. Anstataŭ ĉiujn politikajn kontrolojn.

Interveni per bankmaniera procedo, se okaze Germanujo ne povas pagi, dume la kreditantoj devas disponi pri la mono.

Priatenti la liveradon de materialoj kaj varoj, daŭranta ankoraŭ 10 jarojn.

Okupiĝi pri depono aŭ investigado de prokrastitaj pagoj en Germanujo mem.

Gvidi la komercialigon de l' movebla parto de l' jarpagoj.

Funkcii per speciala komisiono internacia kiel revizia instanco, esplori la staton de l' germana ekonomio, ankaŭ laŭ alvoko de l' registaro germana.

Subteni per ĝia banka laborado la eŭropan ekonomion. Parto el interez-gajno restas por helpi la pagon de Germanujo dum la lastaj 22 jaroj (1966 ĝis 1988).

Kunhelpi financi entreprenojn en landoj ekonomie ne evoluigintaj kaj per tio helpi samtempe la germanan eksporton kaj la tutmondan komercon.

Fariĝi decida faktoro por la stabiliĝo de l' valutokurzoj.

Akceli la kunlaboradon de l' naciaj bankoj per la regulaj kunvenoj de l' Banka Konsilantaro konsistanta el la prezidantoj de l' ĉefaj naciaj bankoj.

La jarpagoj, en Milionoj:
(de Aprilo ĝis Marto)


1929/30	742.8		23740.0		50887.0
1930/31	1707.9	1942/43	2198.0	1954/55	2364.6
1931/32	1685.0	1943/44	2194.3	1955/56	2359.8
1932/33	1738.2	1944/45	2207.5	1956/57	2354.2
1933/34	1804.3	1945/46	2203.8	1957/58	2361.8
1934/35	1866.9	1946/47	2199.5	1958/59	2393.8
1935/36	1892.9	1947/48	2215.2	1959/60	2370.6
1936/37	1939.7	1948/49	2210.0	1960/61	2380.5
1937/38	1977.0	1949/50	2316.8	1961/62	2398.3
1938/39	1995.3	1950/51	2359.2	1962/63	2390.2
1939/40	2042.8	1951/52	2343.2	1963/64	2402.6
1940/41	2166.5	1952/53	2346.2	1964/65	2402.1
1941/42	2180.7	1953/54	2353.3	1965/66	2428.8
			23740.0		50887.0
					Sumo: 79494.3

La tuta sumo, kiun devus pagi Germanujo, atingus en 1966 79494,3 Milionojn da or-markoj.

Apud la pagoj de Germanujo estas tiuj de aro da eŭropaj ŝtatoj inter si kaj al Usono. Ekzemple: Dum 1931/32 Germanujo pagas 1685 Milionojn. El tiu sumo ricevas: Polujo 0,5, Japanujo 13, Portugala 13, Rumanujo 12, Greklando 7, Usono 66, Italujo 191, Britujo 362, Jugoslavujo 79, Belglando 104 kaj Francujo 838 Milionojn da markoj. Francujo pagas al Britujo 250 kaj al Usono 168 kaj konservas 420 por la riparado. Britujo ricevas 362 de Germanujo, 250 de Francujo, 2 de Portugalujo, 5 de Rumanujo, 7 de Greklando, 6 de Jugoslavujo kaj 82 de Italujo, sume 714. Ĝi pagas al Usono 671 kaj konservas fine 43 Milionojn. Italujo ricevas 191, pagas al Britujo 82, al Usono 61, sume 143, kaj konservas 48. Belglando ricevas 104, pagas al Usono 32 kaj konservas 72. Jugoslavujo ricevas 79, pagas al Usono 3 kaj al Britujo 6 kaj konservas 70. (Sen garantio pri nepra ĝusteco laŭ ĉiuj detaloj. Eroj de milionoj estas rondigitaj.)

Skemo

pri la interŝtataj pagoj
1931/32



Sen garantio pri absoluta interkorespondo de la ciferoj.
La skizeto servu nur por doni imagon proksimuman de l' problemo.

IALA

Internacia Asocio por Internacia Helpa Lingvo en Usono
Box 118, 525 West 120th Street, New York

Usona Asocio por Internacia Helpa Lingvo, nomata mallonge IALA (International Auxiliary Language Association in the United States, incorporated), estis fondita en 1924, laŭ instigo de la Komitato pri Internacia Helplingvo de l' „International Research Council“. IALA estas neŭtrala asocio, celanta la starigon de unu helplingvo, simpla kaj klara, instruota en ĉiuj landoj apud la naciaj lingvoj.

La laboroj de IALA etendiĝas sur du ĉefaj kampoj: Klopodoj por interesi pli grandajn rondojn pri la mondlingva movado, kaj esploroj. Tri esploroj estas organizataj: Eduka, lingva kaj sociologia.

La eduka esploro celas:

Unue: Instigi al starigo de eksperimentaj kursoj kaj trovi por la instruado de helplingvo (ekz. Esperanto) la plej oportunan lokon en la programoj de edukaj institutoj;

due: Determini kaj taksu la progresojn faritajn en la lernado de helplingvo kaj kompari ilin kun tiuj faritaj en lernado de naciaj lingvoj dum egalaj periodoj;

trie: Prepari materialon por eksperimentaj kursoj, studi uzatajn lerno-librojn laŭ ilia relativa valoro.

IALA penas plenumi siajn laborojn en spirito de scienca esploro. Sen antaŭjuĝoj ĝi klopodas kolekti, klasigi, kaj kompari faktojn, kaj sur la bazo de tiuj konstataĵoj instigi al eksperimentado liveronta pluajn certajojn. Por eksperimentaj kursoj al plenaĝuloj, IALA rekomendas studon de kiel eble plej granda nombro da diversaj helplingvoj, kiuj povas ilin interesi. Por eksperimentaj kursoj al junuloj de ok ĝis dekok jaroj, IALA rekomendas helplingvon kiel bazon por ĝenerala lingva studo. Por tio, ĝi sugestas Esperanton, kiel la plej praktikan el la helplingvoj, pro tio, ke ĝi estas la plej disvastigita kaj en ĝi estas haveblaj la plej multe da presajoj. IALA rekomendas, ke al lernejoj kaj instruistoj estu donataj plenaj informoj pri la progresoj de la helplingva movado. En Usono tiun studon pri helplingva lernado entreprenis la Instituto de Eduka Esploro (Columbia University) sub la gvido de Dro Edward L. Thorndike, Direktoro de la psikologia fakto. En Eŭropo simila tasko estas gvidata de Profesoro Bovet, Direktoro de la Instituto de l' Eduk-sciencoj, Geneve, kaj de Profesoro Dietterle, Leipzig.

La dua esploro de IALA tuŝas la lingvan flankon. Tiurilate estis farita granda paŝo antaŭen per la organizo de la Internacia Konferenco por Lingva Studo, kiu okazis en Genève de la 20a de Marto ĝis la 2a de Aprilo 1930. En tiu konferenco partoprenis dekdek fakuloj el ok nacioj (angla, dana, estona, germana, rumana, rusa, svisa kaj usona). Prezidis Profesoro Otto Jespersen, Kopenhago. Apud li, IALA estis reprezentita de S-ino A. V. Morris, ĝia honora sekretario, F-ino Eaton, kaj Profesoro Col-linson, Liverpool. Kvin helplingvoj estis reprezentitaj de S-roj S. Auerbach por Ido, R. de Saussure por Nov-Esperanto, E. de Wahl por Occidental, R. Zeidler por Novial, P. Stojan por Esperanto. Profesoro Peano, Torino, kaj Profesoro Yushmanov, Petrograd, ne sukcesis veni, tial ili ne povis persone reprezenti siajn lingvojn: Latine sine Flexione kaj Ètem. Tamen la lingvo de Peano estis publike prezentita apud la kvin cititaj. La grandan sekretarian laboron de la konferenco faris Profesoro Perrenoud, Cernier, kun sia edzino, ambaŭ Esperantistoj. Je la fino alvenis tri fakaj lingvistoj, Profesoroj A. Debrunner, Jena, O. Funke, Bern, E. Hermann, Göttingen, kiuj aktive partoprenis laborkunsidojn kaj komisionajn laborojn de la konferenco. Dum lastaj kunsidoj estis krome la profesoroj el Genève: Ch. Bally, S. Karcevsky, A. Séchehayé kaj P. B. Potter el Wisconsin. Lastmomente venis Prof. Earle B. Babcock, New York, Prezidanto de la gvidanta estraro de IALA. La konferenco kunsidis en Carlton Parc Hotel, apud Genève, kaj pasis en bona spirito de solidara kunlaboro, precipe dank' al la persona influo kaj nelacigebla laborado de S-ino Morris, ĝia iniciatintino kaj ĉefa apoganto. La konferenco lasis post si daŭran rezulton en la formo de la Lingva Laborprogramo, kiu detale fiksas ĉiujn sekciojn kaj punktojn de estonta scienca esploro, kiu postulos plurajn jarojn da preparaj laboroj.

Trie, la sociologia esploro celas klarigi la bezonon de helplingvo, konigi tion al interesataj sferoj, enketi pri la nuna multlingva haoso en internaciaj kongresoj.

La estraro de IALA estas multfaka. Unue, la centra gvidado kun Prezidanto E. B. Babcock, Profesoro de romanaj Lingvoj en Universitato de New York, J. J. Carty, Viciprezidanto, S-ino Morris, Honora Sekretariino, H. N. Shenton, Sekretario, S-ro Morris, Kasisto, kaj dek

anoj: L. E. Bowman, F. G. Cottrell, S. P. Duggan, H. E. Edmonds, J. H. Finley, A. N. Goldsmith, H. G. Leach, Paul Monroe, F. H. Osborn, S-ino H. Peabody. Poste, la Generala Konsilantaro kun dekunu anoj. Fine kvar sekcioj: 1) Sekcio de Interesigo kaj Apogo, Prezidanto S-ro Dave H. Morris; ĝi enhavas du lokajn filiojn en Washington (Prezidanto Profesoro Henry Grattan Doyle) kaj en Boston (Prezidanto John French, Ĉefo de la Cambridge School); 2) Sekcio de Socia Ekonomio, Direktoro Profesoro Herbert N. Shenton de Syracuse University; 3) Eduka Societo, Direktoro Profesoro Edw. L. Thorndike, kun filioj en Genève kaj Leipzig, kaj sep konsilantoj en Usono; 4) Sekcio de Lingva esploro, Direktoro Edward Sapir, Profesoro en la Universitato de Chicago, kaj tri konsilantoj en Usono kaj en Eŭropo.

Bibliografio:

Angle, en presita formo, aperis (22 × 14 cm): *Report of Progress*, F. G. Cottrell, 1923 (15 p.); *Outline of Program*, 1924 (23 p.); **Raportoj de IALA*, 1927 (3 p.), 1928 (19 p.), 1929 (19 p.), 1930 (35 p.); *A Preliminary Investigation of the Teaching of Auxiliary Language in Schools*, 1927 (72 p.); **Progress in Learning an Auxiliary Language*, Thorndike & Kennon, 1927 (34 p.); *The Language Problem in International Radio Communication*, 1928 (8 p.); *Totality*, Edward Sapir, 1930 (Supplement to „Language“, journal of the Linguistic Society of America, 27 p., 25 × 17 cm). Krome, rilate IALA, diversaj informaj *broŝuroj kaj alijiloj.

Angle, represaj aperis: *The Problem of an International Auxiliary Language*, E. Sapir (Romanic Review), 1925; **International Auxiliary Language*, M. E. Jones (Journal of the American Association of University Women), 1926; **An International Auxiliary Language*, A. V. Morris kaj M. E. Jones (Woman's Press), 1927; **Why should we cut out our tongues?*, A. V. Morris (Forum Magazine), 1927; **A Brief Account of the International Language Movement*, J. Sayers (Current History); *The Educational Value of an Artificial Language*, H. S. Eaton (Modern Language Journal); **Artificial Language*, H. S. Eaton (Private School News); **Can Social Engineers Improve the International Language Situation?*, H. N. Shenton, 1930.

* IHLA sendas senpage la * markitajn presaĵojn.

Angle, en maŝinskribita formo (28×22 cm), aperis en 1930 kelkaj ĝeneralaj studoj, verkitaj per kunlaboro de E. Sapir kaj W. E. Collinson, sub la kuna titolo „Foundations of Language“, kaj ĉefe la kompleta raportaro pri la Yeneva konferenco (tekstoj en la angla kaj franca, escepte en germana, Esperanto k. a.

En Esperanto aŭ Angla kaj Esperanto en presita formo, aperis: *La Kolomba Premio*, Dumas-Papot (— p.). Verkoj de f-ino Helen S. Eaton: *Rakontetoj*, tradukitaj el la Franca de Anna Ballard, legolibro por komencantoj (16 p.); *General Language Course for 7th and 8th grades*, *General Language Course for High Schools and Colleges*, du volumoj en la formato 19×13, presitaj en London 1928 kaj 1929, kun 189 kaj 127 paĝoj. **Raporto de la Honora Sekretariino*, 1927 (7 p.).

En Ido, en presita formo, aperis: **Raporto de la Honoral Sekretario*, 1927 (7 p.).

Ĉiu esperantisto kiu deziras informon precizan pri la teorio kaj praktiko de la movado por internacia lingvo devas koni la verkon

Bibliografio de Internacia Lingvo

Monumenta eldonaĵo de la Bibliografia Servo de UEA, kun 560 paĝoj grandformataj da teksto, reproduktaĵoj de interesaj dokumentoj, plie specimenoj kaj kompleta listo de internaciaj lingvoj, elĉerpa listo de ĉiuj eldonaĵoj en kaj pri Esperanto (escepte tiaj kun malpli ol 16 paĝoj) esp. gazetaro, entute fonto de dokumentado. Ĝis 6000 indikoj.

Prezo 12.50 Frk. sviz. Prezo
Universala Esperanto-Asocio
 1, Tour de l'Île, Genève

Varnomoj kaj Esperanto

Oni scias, ke taŭga fabrikmarko, nomo por iu artiklo aŭ varo, influas notinde la disvastigon kaj aĉeton. Ne malofte la nomo de tia varo anstataŭas la nomon de l' objekto mem. „Mia Ford“, „mia Citroën“, estas tipaj ekzemploj de tiu ĉi kutimo, submeti la nomon de l' fabrikanto al tiu de l' fabrikajo. La nuna tempo impresplena kaj plena je sensacioj ankaŭ kaŭzis la multe pli grandan zorgon por elekto de impresa varnomo. Longjara sperto de la reklamistoj kaj propagandistoj evoluis tutan scienccon pri tio kaj riĉa estas la faka literaturo pri la arto de l' reklamo. Kaj en tiu ĉi arto la nomdonado okupas gravan lokon. Evidente ne plu sufiĉas, ke komercisto vendu grason, ŝuojn, vestaĵojn, horloĝon ktp. Tro granda estas la konkurenco kaj por puŝi la klienton al aĉeto de tiu tute speciala variaĵo aŭ artikolo, necesas distingilo. El tio kreiĝis tiuj miloj kaj miloj da varnomoj, ofte fabrikmarkoj, kiujn la publiko pli facile memoras kaj aĉetante, instinkte postulas. Tio estas en certa senco sugestio; promenante vespere en metropolo ĉu Berlino, Parizo, Londono aŭ Novjorko, la luma reklamo superŝutas la pasanton per varnomoj, kiuj eĉ ne plu indikas la artiklon mem. Tre interese estas ja konstati, kiamaniere kreiĝis tiaj nomoj. Jena ekzemplo servu je tio: Konata aŭtomobilo itala estas tiu de *Fiat*. Kion ĝi signifas? Oni pensus al la latina vorto *Fiat*, do *Estu*. Certe ia aŭtomobilo *Fiat* estu la ĉefa, se oni volus bazi la varnomon je la latina vorto. Tamen la solvo estas alia: La vorto estas la komenc-literoj de la fabrik-nomo: *Fabriche Italiane d'Automobile, Torino = FIAT*.

*

Estas fakto, ke Esperanto povus liveri multajn tre trafajn vortojn por tiaj varnomoj. La simpleco de la lingvokonstruo permesas tujan komprenon de amaso da vortoj, eĉ ne lerninte la lingvon. Tion jam ekkonis spertaj reklamistoj, espezantistoj aŭ ne, kaj uzis tiun eblecon. La Oficiala Dokumentaro de l' XXa Kongreso de Esperanto enhavis liston de tiuj varnomoj kolektitaj dokumente de l' Internacia Centra Komitato. La listo, represetata tie ĉi, montras surprizigan variecon laŭ elekto kaj certe multaj samideanoj jam vidis iujn, tute malatentante, ke la vorto estas el nia lingvo. Tre ofte estas uzata la vortoj „Espero“, „Esperanto“. Ilin ni ne citas en la listo, ĉar

pure esperantista kaj kun celo reklami ion inter verdstela publiko. Pli grava estas la nomoj simple elektitaj el Esperanto pro belsoneco aŭ praktiko. Serĉante tian nomon, oni povas fiksi ecojn por elekto de esperanta vorto kiel varnomon:

1. Internacia radikvorto;
2. Grafia nesameco kun naĉlingva vorto, precipe ĉe adjektivoj.
3. Mallonga, klara, belsona.

La plimulto de l' adjektivoj, esprimantaj kvaliton, taŭgas por varnomo: *Perfekta, Solida, Rapida, Bongusta, Eleganta, Supera, Agrabla, Alta, Gracia, Gracila, Hela, Milda, Masiva, Mola, Orda, „Tipa“, Tonika, Trafa, Centra* estas kelkaj ekzemploj, kiuj respondas al supraj reguloj. Malpli bonaj estas kunmetaĵoj pro la longeco, escepte kelkaj kun „Bon-“ aŭ „Bel-“ (Bongusta, Belforma). Pure esperantaj vortoj, ekzemple kelkaj afiksoj ankaŭ estas bonaj: „Inda“, „Eta“, „Ilo“, „Ema“.

La uzo de esperanta vorto kiel varnomo montras la enpenetrigon de nia lingvo en la ĉiutaga vivo. Grava manko estas, ke la preterpasanta publiko ne scias, ke tiu aŭ alia

varnomo estas en Esperanto. Grandstilan reklamon per tiu esperanta varnomo organizis desegnisto Hubert Saget en Basel. Subite vidigis en ĉiuj svisaj urboj afiŝo kun infankapo kaj la vorto „Forta“, esprimanta la kvaliton de l' rubando fabrikita de firmo Schulthess & Kio en Basel.



Listo de Var-nomoj en Esperanto

<i>Alpa</i>	Mentol-franĉbrando
<i>Alta</i>	Fontplumo
<i>Alta</i>	Herba buŝ-gargarakvo
<i>Arda</i>	Silka ŝtrumpo por virinoj — Parfumaĵoj
<i>Arĝenta</i>	Kolonja akvo
<i>Bonapura</i>	Meksika cigaro
<i>Belpina</i>	Pargetvakso por plankoj el pina ligno
<i>Belsona</i>	Ĉemiza tolo
<i>Blanka</i>	Teksaĵo
<i>Blankina</i>	Likvoro

BUSINESS SLOW EH! — Then why not take the line of least resistance and sell

“KUVU”

DOLLY TUBS?

The Tub every sensible woman is demanding.

Universala vortaro

(4a Aldono. Akceptita de la Lingva Komitato 1929)

Abiturient-o, élève ayant terminé ses études secondaires, bachelier; top-form boy in secondary school, who obtained his leaving-certificate examination; Abiturient; mezgrada lernanto, kiu finis la gimnazian kursaron, sukcese plenuminte la koncernan ekzamenon.

Abstin-i, être abstinent; to abstain; enthaltsam sein, abstinieren. [nent leben.]

Aktual-a, actuel; present, of present interest; zeitgemäss. **Akvafort-o** (gravurajo), estampe gravée à l'eau-forte; etching, aquafortis engraving; radiertes Blatt.

Albin-o, albinos; an albino; Albino.

Alen-o, alêne; awl; Ahle.

Alo-o, aloès (bot.); aloe; Aloe (Pflanze).

Alumini-o, aluminium; aluminium; Aluminium.

Amar-a, amer; bitter; bitter.

Amor-o [Z], (myth.) dieu de l'Amour, Cupidon, Eros; God of Love, Cupid; Liebesgott, Amor.

Anilin-o, aniline; aniline; Anilin.

Aŭtonom-a, autonome; autonomous; sich selbst Gesetze gebend, selbständig, unabhängig.

Biret-o, barrette, toque; biretta, cap; Baret.

Bis, bis! again! noch einmal!

Bombast-o, enflure (fig.), style ampoulé, emphase; bombast, turgidness; Bombast, schwülstige Redeweise, Redeschwall.

Ceramik-o [Z], art céramique; ceramics; Töpferkunst.

Cevron-o, chevron (arch.); rafter; Dachsparren.

Deriv-i (tr.), (faire) dériver (gram.); to derive (tr.); ableiten, herleiten.

Diluv-o, déluge; deluge, flood; Wasserflut, Sintflut.

Dimensi-o, dimension; dimension; Ausdehnung.

Dok-o, dock; dock, ship-basin; Dock.

Ekzakt-a, exact (qc); exact (math.); genau; tute precize ĝusta, tute konforma al la diro.

Empiri-o, expérience (considérée comme base de la philosophie ou de la science); empirics; Empirie, methodische Erfahrung; sciencia aŭ filozofia kono akirita per sperto.

Etabl-i, établir; to establish; errichten, einrichten, anlegen.

Fagot-o, basson; bassoon, fagotto; Fagott, Basspfeife.

Fikci-o, fiction; fiction; Erdichtung.

Gencian-o, gentiane; gentian; Enzian.

Genist-o, genêt; broom, genista; Ginster.

<i>Bono</i>	Cigaro
<i>Bono</i>	Klasigo-kesto
<i>Bovo</i>	Margarino — Viand-ekstrakto
<i>Briko</i>	Karb-briketo
<i>Brito</i>	Margarino brita
<i>Eterna</i>	Poŝhorloĝo — Kolumo duonfortika
<i>Ego</i>	Laŭtparolilo
<i>Elektro</i>	Pirogravur-aparato
<i>Epoka</i>	Elektre hejtata porcelana kafo-kruĉo
<i>Faldilo</i>	Faldmaŝino
<i>Fama</i>	Kuir-graso
<i>Flama</i>	Ŝtrumpoj
<i>Formata</i>	Ortopedia formilo
<i>Forta</i>	Har-rubando fortika
<i>Forto</i>	Kasŝranko el ferbetono
<i>Gamo</i>	Lav-aparato
<i>Giraf-o</i>	Etendiĝilo (kun longa „kolo“) por botoj
<i>Globo</i>	Resoni-o por gramofonoj
<i>Heraldika</i>	Ludilo
<i>Imago</i>	Blankig-materialo por tolaĵoj
<i>Kuvo</i>	Patentkuvo
<i>Lavilo</i>	Sapo-pulvoro
<i>Ludo</i>	Dam-ludo angla
<i>Mia Vera</i>	Hartiukturo
<i>Mortis</i>	Rimedo kontraŭ musoj
<i>Movado</i>	Horloĝo
<i>Monda</i>	Kuir-graso
<i>Mola</i>	Ĉemiza tolo
<i>Mondona</i>	Teksajo
<i>Mi inda</i>	Horloĝo
<i>Novo</i>	Gazolin-motoro
<i>Novo</i>	Insulino
<i>Nova</i>	Cikorio (kafsuregato)
<i>Oro</i>	Kuir-graso
<i>Ornamenta</i>	Ornamfarbo
<i>Oleovalvo</i>	Aŭtomobil-valvo

Reklamistoj uzantaj nian lingvon por tiu celo, farus bone sin turni al la Internacia Centra Komitato, kiu volontе konsilas pri plej taŭga esprimo, respondanta al la bezono de l' reklama tekniko.

Grund-o, terrain (au point de vue de sa nature, de sa composition); ground, earth (soil); Boden (in Bezug auf Gemel-o, jumeau; a twin; Zwilling. [seine Beschaffenheit].
Hegemoni-o, hégémonie; hegemony; Vorherrschaft.
Helic-o (meĥ.), hélice (méc.); screw, Propeller; Propeller, Schiffsschraube.
Hipnot-o, sommeil hypnotique; hypnotic sleep; Zwangsschlaf.
Hum-o, humus, terre végétale; humus, vegetable mould;
Imun-a [Z], immunisé (méd.); immune; seuchenfest. [Gartenerde.
Inaugur-i, inaugurer; to inaugurate; einweihen, feierlich eröffnen. [gister; Inhaltsverzeichnis.
Indeks-o, index, liste alphabétique; index, alphabetical reference.
Indig-o, indigo; indigo; Indigo. [geborener.
Indigen-o, indigène; a native, indigene; Ureinwohner. Ein-
Inert-a, inerte; inert, sluggish; träge, unwirksam (chem.).
Inflam-o (med.), inflammation (méd.); inflammation; Entzündung. [stand, Erkenntnisvermögen.
Intelekt-o, intelligence, facultés intellectuelles; intellect; Ver-
Intens-a, intense, intensif; intense, intensive; intensiv, hoch-
gespannt, kraftwirkend.
Inund-i, inonder; to inundate; überschwemmen.
Invers-a, inverse; inverse; umgekehrt.
Kali-o, potassium; potassium; Kalium.
Kalv-a, chauve; bald, calvous; kahl(köpfig).
Karbon-o, carbone; carbon; Kohlenstoff.
Kastanjet-o, castagnettes; castanet; spanische Tanzklapper.
Kinin-o [Z], quinine; quinine; Chinin.
Klac-i, faire des commérages, potiner, cancaner; to gossip,
Klor-o, chlore; chlorine; Chlor. [tattle; Klatschereien machen.
Kluk-i, glousser; to cluck; glucken.
Knar-i [Z], grincer (plume, roue, porte); to creak (of a
wheel, door, hinge, pen); knarren.
Koincid-i, coïncider; to coincide; (zeitlich) zusammenfallen.
Kolizi-i, entrer en collision; to collide; zusammenstossen.
Komision-o, commission; a commission, board; Ausschuss;
aro da personoj komisiitaj por esplori ian difinitan dem-
mandon aŭ plenumi ian difinitan taskon.
Kondicional-o, conditionnel (gram.); conditional mood (gram.);
Bedingungsform (Gram.).
Konker-i [Z], conquérir; to conquer; erobern.
Konsekr-i [Z], consacrer (rel.); to consecrate, ordain;
weihen, einsegnen, heiligen. [ununterbrochen.
Kontinu-a [Z], continu; continuous; fortgesetzt, fortlaufend,

Korol-o, corolle; corolla; Blumenkrone.
Kreditor-o, créancier; creditor; Gläubiger.
Kverel-i [Z], se quereller; to wrangle, quarrel; sich zanken;
kolere interdisputi.
Lamen-o [Z], lame(lle); lamina; Lamelle, Plättchen; mal-
dika kaj mallarĝa plato.
Lament-i [Z], se lamenter; to lament; jammern, wehklagen.
Lat-o [Z], latte; lath; Latte; longa, mallarĝa kaj maldika
peco el ligno, uzata en konstruado.
Later-o, côté (géom.); side (geom.); Seite (Geom.); rekta
linio, limanta geometrian figuron.
Lens-o, lentille (opt.); lens (optics); Linse (Glas).
Lob-o, lobe (anat. bot.); lobe; Lappen.
Lord-o, lord; Lord (British); Lord.
Lumbrik-o, lombric, ver de terre; earth-worm; Regenwurm.
Medol-o, moëlle (anat. bot.); marrow, medulla (anat. bot.);
Mark (das) (in Knochen und Pflanzen).
Merkat-o, marché, sphère de vente, ensemble des trans-
actions commerciales; market; Markt; sfero de vendo,
kampo de komerca agado pri aparta branĉo (neniam
signifas placon aŭ ejon).
Munt-i, monter (mécán., joaill.); to mount, fit up (ma-
chinery, apparatus), set (jewellery); aufstellen (eine
Maschine), montieren, fassen (einen Edelstein); fiksi la
diversajn pecojn de aparato aŭ maŝino, enfiksi juvel-ŝtonon,
Murd-i, assassiner; to murder, kill unlawfully; morden;
krime mortigi homon laŭ antaŭa intenco.
Narkot-i (trans.), narcotiser; to narcotize; narkotisieren.
Nas-o [Z], nasse; hoop-net; Fischreuse; konusforma korbo
el salikaj vergetoj por kapti fiŝojn.
Natri-o, sodium; natrium, sodium; Natrium.
Oksid-o, oxyde; oxide; Oxyd.
Oleandr-o, laurier-rose; oleander; Oleander, Rosenlorbeer.
Orbit-o, orbite (anat., astr.); orbit (anat., astr.); Augen-
höhle, Planetenbahn.
Panel-o, panneau; panel; Vertäfelung an einer Zimmerwand.
Paŝtel-o, pastel; pastel, coloured crayon; Pastellstift.
Patrici-o, patricien; patrician; Patrizier, Altbürger. [zieher.
Pedagog-o, pédagogue; pedagogue; Pädagog, Schulmann, Er-
Pedagogi-o, pédagogie; pedagogy, education of children;
Pädagogik, Erziehungslehre. [lerine.
Pelerin-o, pélerine; tippet, pelerine; Schultermäntelchen, Pe-
Pioĉ-o, pioche; pickaxe, mattock; Karst (Hacke).
Pivot-o, pivot; pivot; Zapfen, Drehstift.

Plag-o [Z], calamité, fléau (fig.), plaie (fig.); plague, calamity; Landplage; tutlanda malfeliĉego, dia punfrapo, natura katastrofo.

Plantag-o, plantain; plantain (bot.); Wegerich.

Plastik-o, art plastique; plastic art; Plastik, Modellierkunst.

Pleb-o, plèbe; the plebeians, common people, lower orders; Plebs, Pöbel, niederes Volk.

Plur-aj, plusieurs; several; mehrere; pli ol unu.

Plural-o, pluriel (gram.); plural (gram.); Plural, Mehrzahl.

Podi-o [Z], estrade; podium, stage; Podium.

Provok-i [Z], défier, provoquer; to provoke, defy, challenge; herausfordern, provozieren.

Redukt-i, réduire (math., chim.); to reduce (math., chem.); reduzieren, zurückführen, vereinfachen (math.).

Regent-o, régent; a regent; Reichsverweser; provizora regnestro, kiu reĝas dum la neplenaĝo aŭ foresto de la reĝo.

Rezist-i, résister; to resist; widerstehen, widerstreben, sich widersetzen.

Sacerdot-o, prêtre catholique, ecclésiastique ayant reçu le sacrement de la prêtrise; Roman Catholic priest; katholischer Priester; katolika pastro, supera je diakono, ricevinta de episkopo la sanktajn benojn; kiuj rajtigas fari la meson kaj disdoni la sakramentojn.

Sekur-a, qui est en sûreté, à l'abri du péril, qui ne court aucun risque; safe, secure; sicher, ausser Gefahr; est-

Skem-o, schéma; scheme; Schema. [anta en sendanĝera situacio

Solvent-a, soluble; solvent (fin.); solvent, zahlungsfähig.

Splen-o, spleen; spleen; Spleen; malsana stato de la animo karakterizata per konstanta enuo kaj indiferenteco al ĉio.

Stamen-o, étamine (bot.); stamen (bot.); Staubfaden; virseksa organo de la floroj.

Stipendi-o, bourse d'études; bachelorship, study-allowance, bursary; amtliche Geldunterstützung für Schüler, Stipendium.

Subvenci-o, subvention; subvention, subsidy; Geldunterstüt-

Spat-o, bêche; spade; Spaten. [zung; oficiala monhelpo.

Trafik-o, circulation, trafic; traffic; Verkehr.

Uzur-o, usure (fin.); usury; Wucher.

Valid-a, valable; valid; rechtsgültig, geltend. [mercaĵo.

Var-o, merchandise; Wares, goods, commodities; Ware; koviz-o [Z], visa; visa; Visum; oficiala aŭtentikigo de pasporto ktp. [Rauminhalt, Umfang.

Volumen-o, volume (géom.); volume (geom.); Volumen,

Zefir-o, zéphyr; zephyr; Zefir, lauer Wind; agrabla milda venteto,

(Laŭ Oficiala Dokumentaro Esperantista: 21a Kongreso, Budapeŝt 1929)

Dua Parto

Esperantismo

Fundamentaj Dokumentoj

Antaŭparolo al la Fundamento — Notiindaj Datoj — Kongresoj

Internacia Organizo

Lingva Komitato kaj Akademio — Konstanta Reprezentantaro de la Naciaj Societoj — Universala Esperanto-Asocio — Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado

☆

Esperantista Gazetaro Internacia

☆

Universala Esperanto-Asocio

Centra Organizo

Komitato — Komisiono — Honoraj Membroj — Dumvivaj Membroj — Teritoria organizo — Centra Oficejo

☆

Adresaro laŭlanda

Naciaj societoj kaj periodaĵoj — Institutoj — Fakaj grupiĝoj naciaj — Delegitoj kaj Vicdelegitoj de UEH — Hotela Servo: Adresoj de hoteloj — Lokaj grupoj — Reklamoj de Entreprenejoj

☆

Faka Organizo Internacia



Fundamento de Esperanto

(Antaŭparolo)

Por ke lingvo internacia povu bone kaj regule progresadi kaj por ke ĝi havu plenan certecon, ke ĝi neniam disfalos kaj ia facilanima paŝo de ĝiaj amikoj estontaj ne detruos la laborojn de ĝiaj amikoj estintaj, — estas plej necesa antaŭ ĉio unu kondiĉo: la ekzistado de klare difinita, neniam tusebla kaj neniam ŝangebla FUNDAMENTO de la lingvo. Kiam nia lingvo estos oficiale akceptita de la *registaroj* de la plej ĉefaj regnoj kaj tiuj ĉi registaroj per speciala *leĝo* garantios al Esperanto tute certan vivon kaj uzatecon kaj plenan sendangerecon kontraŭ ĉiuj personaj kapricoj aŭ disputoj, tiam aŭtoritata komitato, interkonsente elektita de tiuj registaroj, havos la rajton fari en la fundamento de la lingvo unu fojon por ĉiam ĉiujn deziritajn ŝanĝojn, se tiaj ŝanĝoj montriĝos necesaj; sed *ĝis tiu tempo* la fundamento de Esperanto devas plej severe resti absolute senŝanĝa, ĉar severa netuŝebleco de nia fundamento estas la plej grava kaŭzo de nia ĝisnuna progresado kaj la plej grava kondiĉo por nia regula kaj paca progresado estonta. *Neniu persono kaj neniu societo devas havi la rajton arbitre fari en nia Fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon!* Tium ĉi tre gravan principon la esperantistoj volu ĉiam bone memori kaj kontraŭ la ektaŭso de tiu ĉi principo ili volu ĉiam energie batali, ĉar la momento, en kiu ni ektaŭsus tiun principon, estus la komenco de nia morto.

Laŭ silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj jam de tre longa tempo la sekvantaj tri verkoj estas rigardataj kiel fundamento de Esperanto: 1) La 16-regula *Gramatiko*; 2) la *Universala Vortaro*; 3) la *Ekzercaro*. Tiujn ĉi tri verkojn la aŭtoro de Esperanto rigardadis ĉiam kiel *leĝojn* por li, kaj malgraŭ oftaj tentoj kaj delogoj li neniam permesis al si (almenaŭ *konscie*) eĉ la plej malgrandan pekon kontraŭ tiuj ĉi leĝoj; li esperas, ke pro la bono de nia afero ankaŭ ĉiuj aliaj esperantistoj ĉiam rigardados tiujn ĉi tri verkojn kiel la solan leĝan kaj netuŝeblan fundamenton de Esperanto.

Por ke ia regno estu forta kaj glora kaj povu sane disvolviĝadi, estas necese, ke ĉiu regnanto sciu, ke li neniam dependos de la kapricoj de tiu aŭ alia persono, sed devas obei ĉiam nur klarajn, tute difinitajn fundamentajn *leĝojn* de sia lando, kiuj estas egale devigaj por la regantoj kaj regatoj kaj en kiuj neniu havas la rajton fari arbitre laŭ

persona bontrovo ian ŝanĝon aŭ aldonon. Tiel same por ke nia afero bone progresadu, estas necese, ke ĉiu esperantisto havu la plenan certecon, ke leĝdonanto por li ĉiam estos ne ia *persono*, sed ia klare difinita *verko*. Tial, por meti finon al ĉiuj malkomprenigoj kaj disputoj, kaj por ke ĉiu esperantisto sciu tute klare, per kio li devas en ĉio sin gvidi, la aŭtoro de Esperanto decidis nun eldoni en formo de unu libro tiujn tri verkojn, kiuj laŭ silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj jam de longe fariĝis fundamento por Esperanto, kaj li petas, ke la okuloj de ĉiuj esperantistoj estu ĉiam turnataj ne al li, sed al *tiu ĉi libro*. Ĝis la tempo, kiam ia por ĉiu aŭtoritata kaj nedisputebla institucio decidis alie, ĉio, kio troviĝas en tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel deviga por ĉiuj; ĉio, kio estas kontraŭ tiu ĉi libro, devas resti rigardata kiel malbona, se ĝi eĉ apartenus al la plumo de la aŭtoro de Esperanto mem. Nur la supre nomitaj tri verkoj publikigitaj en la libro „Fundamento de Esperanto“, devas esti rigardataj kiel oficialaj; ĉio alia, kion mi verkis aŭ verkos, konsilas, korektas, aprobas ktp., estas nur verkoj *privataj*, kiujn la esperantistoj — se ili trovas tion ĉi utila por la unueco de nia afero — povas rigardadi kiel *modela*, sed ne kiel *deviga*.

Havante la karakteron de *fundamento*, la tri verkoj represitaj en tiu ĉi libro devas antaŭ ĉio esti *netuŝeblaj*. Tial la legantoj ne miru, ke ili trovos en la nacia traduko de diversaj vortoj en tiu ĉi libro (precipe en la angla parto) tute nekorekte tiujn samajn *erarojn*, kiuj sin trovis en la unua eldono de la „Universala Vortaro“. Mi permesis al mi nur korekti la *preserarojn*; sed se ia vorto estis erare aŭ nelerte *tradukita*, mi ĝin lasis en tiu ĉi libro tute senŝanĝe; ĉar se mi volus plibonigi, tio ĉi jam estus *ŝanĝo*, kiu povus kaŭzi disputojn kaj kiu en verko fundamenta ne povas esti tolerata. *La fundamento devas resti severe netuŝebla eĉ kune kun siaj eraroj*. La *erareco* de tiu aŭ alia vorto ne prezentas grandan malfeliĉon, ĉar, komparante la kuntekstan tradukon en la aliaj lingvoj, oni facile trovos la veran sencanon de ĉiu vorto; sed senkompare pli grandan danĝerecon prezentas la *ŝanĝado* de la traduko de ia vorto, ĉar, perdinte la severan netuŝeblecon, la verko perdus sian eksterordinare necesan karakteron de dogma fundamenteco, kaj, trovante en unu eldono alian tradukon ol en alia, la uzanto ne havus la certecon, ke mi morgaŭ ne faros ian alian ŝanĝon, kaj li perdus sian konfidon kaj apogon. Al ĉiu, kiu montrus al mi ian nebonan esprimon en la Fundamenta libro, mi re-

spondos trankvile: „jes, ĝi estas eraro, sed ĝi devas resti netuŝebla, ĉar ĝi apartenas al la fundamenta dokumento, en kiu neniu havas la rajton fari ian ŝanĝon“.

La „Fundamento de Esperanto“ tute ne devas esti rigardata kiel la plej bona lernolibro kaj vortaro de Esperanto. Ho, ne! Kiu volas *perfektiĝi* en Esperanto, al tiu mi rekomendas la diversajn lernolibrojn kaj vortarojn, multe pli bonajn kaj pli vastajn, kiuj estas eldonitaj de niaj plej kompetentaj amikoj por ĉiu nacio aparte kaj el kiuj la plej gravaj estas eldonitaj tre bone kaj zorgeme, sub mia persona kontrolo kaj kunhelpo. Sed la „Fundamento de Esperanto“ devas troviĝi en la manoj de ĉiu bona esperantisto kiel konstanta *guida dokumento*, por ke li bone ellernu kaj per ofta enrigardado konstante memorigadu al si, kio en nia lingvo estas oficiala kaj netuŝebla, por ke li povu ĉiam bone distingi la vortojn kaj regulojn *oficialajn*, kiuj devas troviĝi en ĉiuj lernoverkoj de Esperanto, de la vortoj kaj reguloj rekomendataj *private*, kiuj eble ne al ĉiuj esperantistoj estas konataj aŭ eble ne de ĉiuj estas aprobataj. La „Fundamento de Esperanto“ devas troviĝi en la manoj de ĉiu esperantisto kiel konstanta *kontrolilo*, kiu gardos lin de deflankiĝado de la vojo de unueco.

Mi diris, ke la fundamento de nia lingvo devas esti absolute netuŝebla, se eĉ ŝajnus al ni, ke tiu aŭ alia punkto estas sendube erara. Tio ĉi povus naski la penson, ke nia lingvo restos ĉiam rigida kaj neniam disvolviĝos. . . . Ho, ne! Malgraŭ la severa netuŝebleco de la fundamento, nia lingvo havas la plenan eblon ne sole konstante riĉiĝadi, sed eĉ konstante *pliboniĝadi* kaj *perfektiĝadi*; la netuŝebleco de la fundamento nur garantias al ni konstante, ke tiu perfektiĝado fariĝas ne per arbitra, interbatala kaj ruiniĝa *rompado* kaj *ŝanĝado*, ne per nuligado aŭ sentaŭgigado de nia ĝisnuna literaturo, sed per vojo *natura*, senkonfuza kaj sendanĝera. Pli detale mi parolas pri tio ĉi en la Bulonja kongreso; nun mi diros pri tio ĉi nur kelkajn vortojn, por ke mia opinio ne ŝajnu tro paradoksa.

1. *Riĉiĝadi* la lingvon per novaj vortoj oni povas jam nun, per konsiliĝado kun tiuj personoj, kiuj estas rigardataj kiel la plej aŭtoritataj en nia lingvo, kaj zorgante pri tio, ke ĉiuj uzu tiujn vortojn en la sama formo; sed tiuj ĉi vortoj devas esti nur rekomendataj, ne altrudataj; oni devas ilin uzadi nur en la *literaturo*; sed en korespondado kun personoj *nekonataj* estas bone ĉiam peni uzadi nur vortojn el la „Fundamento“, ĉar nur pri tiaj vortoj ni povas esti

certaj, ke nia adresato ilin nepre trovos en sia vortaro. Nur iam poste, kiam la plej granda parto de la novaj vortoj estos jam tute matura, ia aŭtoritata institucio enkondukos ilin en la vortaron *oficialan*, kiel „*Aldonon al la Fundamento*“.

2. Se ia aŭtoritata centra institucio trovos, ke tiu aŭ alia vorto aŭ regulo en nia lingvo estas *tro neoportuna*, ĝi ne devos *forigi* aŭ *ŝanĝi* la diritan formon, sed ĝi povos proponi formon *novan*, kiun ĝi rekomendos uzadi *paralele* kun la formo malnova. Kun la tempo la formo nova iom post iom elpuŝos la formon malnovan, kiu fariĝos *arĥaismo*, kiel ni tion ĉi vidas en ĉiu natura lingvo. Sed prezentante parton de la *fundamento*, tiuj ĉi arĥaismoj neniam estos elĵetitaj, sed ĉiam estos presataj en ĉiuj lernolibroj kaj vortaroj samtempe kun la formoj novaj, kaj tiamaniere ni havas la certecon, ke eĉ ĉe la plej granda perfektiĝado la unueco de Esperanto neniam estos rompata kaj neniu verko Esperanta eĉ el la plej frua tempo iam perdos sian valoron kaj kompreneblecon por la estontaj generacioj.

Mi montris en *principo*, kiamaniere la severa netuŝebleco de la „Fundamento“ gardos ĉiam la unuecon de nia lingvo, ne malhelpante tamen al la lingvo ne sole riĉiĝadi, sed eĉ konstante *perfektiĝadi*. Sed en la *praktiko* ni (pro kaŭzoj jam multajn fojojn priparolitaj) devas kompreneble esti *tre singardaj* kun ĉia „perfektiĝado“ de la lingvo: a) Ni devas tion ĉi fari ne facilanime, sed nur en okazoj de efektiva *neceseco*; b) Fari tion ĉi (post matura prijuĝado) povas ne apartaj personoj, sed nur ia centra institucio, kiu havas nedisputeblan aŭtoritatecon por la tuta esperantistaro.

Mi finas do per la jenaj vortoj:

1. Pro la unueco de nia afero ĉiu bona esperantisto devas antaŭ ĉio bone koni la *fundamenton* de nia lingvo;

2. La fundamento de nia lingvo devas resti por ĉiam *netuŝebla*;

3. Ĝis la tempo kiam aŭtoritata centra institucio decidis *pligrandigi* (neniam *ŝanĝi!*) la ĝisnunan fundamenton per oficialigo de novaj vortoj aŭ reguloj, ĉio bona, kio ne troviĝas en la „Fundamento de Esperanto“, devas esti rigardata ne kiel deviga, sed nur kiel *rekomendata*.

La ideoj, kiujn mi supre esprimis pri la Fundamento de Esperanto, prezentas dume nur mian *privatan* opinion. Leĝan sankcion ili ricevos nur en tia okazo, se ili estos akceptitaj de la unua internacia kongreso de esperantistoj, al kiu tiu ĉi verko kun sia antaŭparolo estos prezentita.

Varsovio, Julio 1905.

L. Zamenhof

Notindaj datoj

el la historio de Esperanto kaj de UEA

1859. *Zamenhof, Lazaro Ludoviko*, naskiĝas en Bialystok (15an de Decembro).
1878. *Zamenhof* festas kun siaj kunlernantoj la efektiviĝon de la „Lingvo Universala“.
1887. Aperoj de la broŝuro „Dro Esperanto, Lingvo Internacia“.
1889. Aperoj de la unua gazeto en Esperanto „La Esperantisto“ en Nürnberg.
1892. Fondo de societo „Espero“ en Peterburgo (Leningrad).
1898. Fondo de la Franca Societo por la Propagando de Esperanto.
1899. La raporto „La Lingvo Internacia“ de *E. Naville* estas prezentata al la Akademio Franca de la Sciencoj.
1901. Generalo *Sebert* kaj *Ch. Méray* prezentas Esperanton al la Franca Akademio de la Sciencoj.
1903. Fondo de „Juna Esperantisto“ de *H. Hodler* kaj *Edm. Privat*.
1903. Fondo de la Hispana Societo por la Propagando de Esperanto. — Fondo de la Brita Esperantista Asocio.
1905. Unua Kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer. Akcepto de la Deklaro pri Esperantismo. Elekto de la Lingva Komitato (L. K.).
1906. Fondo de la Germana Esperanto-Societo en Braunschweig. — Dua Kongreso de Esperanto en Genève. Aprobo de la propono de *A. Carles* pri kreo de „konsuloj“.
1907. „Esperanto“, gazeto de UEA, reaperas sub gvidado de *H. Hodler*. — *Th. Rousseau* instigas la kreon de Esperanto-Oficejoj. — Tria Kongreso de Esperanto en Cambridge.
1908. Oficiala fondo de UEA (Majo); provizora elekto de Delegitoj. — Kvara Kongreso de Esperanto en Dresden. — Unua Kunsido de UEA dum la Kvara Kongreso.
1909. Kvina Kongreso de Esperanto en Barcelona. — Dua Kunsido de UEA dum la Kvina Kongreso.

1910. Unua Kongreso de UEA en Augsburg. — Sesa Kongreso de Esperanto en Washington.
1911. Sepa Kongreso de Esperanto en Antwerpen (Anvers). — Dua Kongreso de UEA.
1912. Oka Kongreso de Esperanto en Kraków. — Tria Kongreso de UEA en Kraków. Financa reformo de UEA.
1913. Naŭa Kongreso de Esperanto kaj Kvara de UEA en Bern.
1914. Deka Kongreso de Esperanto kaj Kvina de UEA en Paris.
1915. Dekunua Kongreso de Esperanto en San Francisco.
1916. Morto de *Harold Bolingbroke Mudie*, prezidanto de UEA (6. Januaro). — Morto de *Th. Rousseau*, vicprezidanto de UEA (11. Aprilo).
1917. Morto de Dro *L. L. Zamenhof* en Warszawa (14. Aprilo). — Morto de Rektoro *Boirac*, prezidanto de la Esperantista Akademio (20. Decembro).
1920. Morto de *Hector Hodler*, prezidanto de UEA (30. Marto). — Dekdua Kongreso de Esperanto kaj Sesa de UEA en Hago.
1921. Rezolucio de la Xa Internacia Konferenco de la Ruĝa Kruco en Genève. — Dektria Kongreso de Esperanto kaj Sepa de UEA en Praha. — Rezolucio subtenita de 13 ŝtatoj ĉe la Dua Kunveno de la Ligo de Nacioj, favore de instruado de Esperanto en la lernejoj.
1922. Pedagogia Konferenco pri Esperanto en Genève. — Dekkvara Kongreso de Esperanto kaj Oka de UEA en Helsinki. Decido de l' Kongreso pri Oficiala Organizo Esperantista. — Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj; raporto de la sekretario de la Ligo de Nacioj al la Tria Kunveno.
1923. Komerca kaj Turisma Konferenco pri Esperanto en Venezia. — XVa Kongreso de Esperanto en Nürnberg; UEA oficiala organizaĵo esperantista. — Morto de Dro *A. Mybs*, honora membro de UEA, honora prezidanto de G. E. A. kaj akademiano. — Morto de kolonelo *Pollen*, honora prezidanto de B. E. A. — Morto de prelado *A. Giesswein*, prezidanto de Hungara Esperanto-Societo.

1924. Rekomendo de la Ligo de Nacioj al la ŝtatemembroj, trakti Esperanton kiel klaran lingvon en telegrafado. — XVIa Kongreso de Esperanto en Vieno, memortabulo ĉe hotelo Hammerand. — Morto de S-ino Klara Zamenhof, vidvino de la Majstro (7. Decembro).
1925. XVIIa Kongreso de Esperanto kaj Somera Universitato en Genève. — Esperanto klara lingvo en telegrafado. — Rezolucioj ĉe Paca Kongreso en Paris, Kongreso de Teknika Gazetaro, Trade Unions. — Poŝtmarko kun teksto en Esperanto.
1926. Konferenco en Locarno. — Inaŭguro de Zamenhofa Monumento. — XVIIIa Kongreso de Esperanto kaj Somera Universitato en Edinburgh. — Dua poŝtmarko esperanta. — SAT-Kongreso en Leningrad.
1927. Konferenco en Praha pri „Paco per Lernejo“. — XIXa Jubilea Kongreso de Esperanto kaj Somera Universitato en Danzig. — Honora poŝtmarko kun bildo de Zamenhof, eldonita de la poŝto de USSR.
1928. 20-jara ekzisto de UEA. — Unua esperantista popolnombro. — XXa Kongreso de Esperanto en Antverpeno. Somera Universitato „La Maro“. John Merchant, prezidanto de I. C. K., Dro Privat, honora prezidanto de I. C. K.
1929. Komerca kaj Trafika Konferenco en Frankfurt a. M. — XXIa Kongreso de Esperanto en Budapeŝto kaj Somera Univ. — S-ino Hankel, Dresden † (15. Dec.).
1930. Generalo Hippolyte Sebert, Ano de l' Akademio, fondinto de l' Esperantista Centra Oficejo en Parizo, Honora Membro de UEA, Honora Prezidanto de K. R., † 25. Januaro. — XXIIa Kongreso en Oxford.

Fundamento de Esperanto

Eldono franca-angla-germana-rusa-pola (en unu volumo)

Prezo: 1,80 Fr. svis. aŭ 9,— Fr. fr. kun afranko.

Eldonoj: armena, greka, hungara, itala, judhispana

Prezo: 1,— Fr. svis. aŭ 5,— Fr. fr. po unu

Centra Esperantista Librejo, 51 Rue de Clichy, Paris 9

Universala Esperanto-Asocio, Libroservo, Genève

Universalaj Kongresoj de Esperanto

Orda No.	Urbo	Dato	Prezidis	Aliĝintoj (K: Kongresanoj, L: el tiom da landoj, R. S.: Regnaj, senditoj oficialaj)			Decidoj, Rezolucioj [pri:]. Atentindaĵoj
				K.	L.	R. S.	
**	Calais-Dover	1904 VIII. 7.—8.	Capé-Montrosier	180	6	—	Kongresoj ĉiujaraj. E-a signo. Elparolo.
I.	Boulogne-sur-Mer	1905 VIII. 7 —12.	Zamenhof kaj Boirac	688	20	—	Deklaracio pri E-ismo. Fundamento. Lingva Komitato. Flago. Projekto de konsulejoj (estonta UEA).
II.	Genève	1906 VIII. 28.—2. IX.	Schnceberger	818	30	—	Konstanta Kongresa Komitato. Neŭtraleco. Fak-kunsidoj. Scienca Asocio E-ista.
III.	Cambridge	1907 VIII. 12.—17	Pollen	1317	35	1	Spesmilo: Sistema de internacia mono.
IV.	Dresden	1908 VIII. 17.—22.	Mybs	1368	40	7	Instituto de Esperanto. Unua kunveno de UEA.
V.	Barcelona	1909 IX. 6.—11.	Pujula y Valles	1287	32	19	Organizo de naciaj societoj. Financa zorgado pri E-movado. Laboro de la Akademio.
VI.	Washington	1910 VIII. 15.—20	J. Barrett	357	20	16	Internacia Konsilantaro (unua provo de tutmonda organizo).

Universalaj Kongresoj de Esperanto

Orda No.	Urbo	Dato	Prezidis	Aliĝintoj			Decidoj. Rezolucioj [pri:]. Atentindaĵoj
				(K: Kongresanoj, L: el tiom da landoj, R. S.: Regnaj, senditoj oficialaj)			
				R.	L.	R. S.	
VII.	Antwerpen	1911 VIII. 20.—27.	A. Van der Biest	1733	42	26	Rajtigitaĵ Deleĝitoj (nova provo de organizo).
VIII.	Kraków	1912 VIII. 11.—18.	Mikolajski	946	28	11	Kongresa regularo. Lasta kongresa parolado de Zamenhof. 25-jara jubileo.
IX.	Bern	1913 VIII. 24.—31.	Jakob Schmid	1015	30	16	Fidesprimo al Lingva Komitato. Necesso de kunagado kaj konkordo.
X.	Paris	1914 VIII. 2.	La kongreso ne okazis pro la milito	3739	50	—	Kelkaj privataj kunsidoj okazis por helpi al forirantaj samideanoj.
XI.	San Francisco	1915 VIII. 22.—29	R. Colquhoun	163	16	17	Propagando en universitatoj.
**	Paris	1919 IX. 21.—25.	Rollet de l'Isle	26	3	—	Denova okazigo de ĉiujaraj kongresoj. Rajtigitaĵ Deleĝitoj.
XII.	Hago	1920 VIII. 9.—15.	J. R. Isbrücker	408	27	7	Teknikaj vortaroj. E. Centra Oficejo kaj UEA kiel du ĉefaj organizoj; neceso de komuna centro.
XIII.	Praha	1921 VII. 31.—6. VIII.	S. Kamaryt	2561	35	30	Centra organizo de la E-movado.

XIV.	Helsinki	1922 VIII. 9.—15.	Von Frenckell	820	30	14	Kontrakto inter UEA kaj Naciaj Societoj. 1930-10
XV.	Nürnberg	1923 VIII. 2.—8.	J. Dietterle	4963	43	12	Zamenhofa monumento. Konfirmo de la kontrakto de Helsinki. Rekono de UEA kiel oficiala institucio.
XVI.	Wien	1924 VIII. 6.—14.	Dr. Minibeck	3400	40	8	Kongresa regularo. Lingva disciplino, Rezulocio pri neŭtraleco.
XVII.	Genève	1925 VIII. 2.—7.	Edm. Privat	953	35	38	Prelegoj en la unua Somera Universitato. Zamenhofa memor-festo.
XVIII.	Edinburgh	1926 VIII. 1.—7.	W. Page	960	36	34	Somera Universitato. Propagando per lernejo.
XIX.	Danzig	1927 VII. 28 —4. VIII.	B. Heltermann	905	34	35	Somera Universitato. Enketo pri instruado de E. en lernejoj.
XX.	Antwerpen	1928 VIII. 3.—11.	Frans Schoofs	1494	36	34	Jubilea festo de UEA. Somera Universitato. E. en Radio.
XXI.	Budapest	1929 VIII. 1.—8.	J. Mihalik	1256	33	24	Elparolado. Radio-propagando. Tradukado en internaciaj kongresoj.
XXII.	Oxford	1930 VIII. 2.—9.	B. Long	1200	30	12	Somera Universitato. E. en Radio kaj en komercio. Instrua metodo de Ĉe.

Esperantista Lingva Komitato Esperantista Akademio

La Esperantista Lingva Komitato konsistas el lingvaj kompetentuloj, kies nombro ne estas limigita. La anoj de la L. K. estas elektataj de la Lingva Komitato mem por unu jaroj laŭ listo starigata de la Akademio. Rajtas prezenti kandidatojn la Naciaj Societoj, UEA kaj la Fakaj Societoj. Nuntempe la L. K. konsistas el 128 anoj. Laŭ la lingvo partoprenas: Angla 14, Bulgara 1, Ĉeĥa 5, Ĉina 2, Dana 1, Estona 1, Finna 1, Flandra 2, Franca 20, Germana 23, Greka 1, Hebrea 3, Hispana 6, Holanda 4, Hungara 5, Itala 6, Japano 1, Kataluna 6, Ladina 1, Latva 1, Litova 1, Pola 7, Portugalga 3, Rumana 1, Rusa-Blankrusa-Ukraina 10, Sveda 2.

Esperantista Akademio.

Supera komisiono de la Lingva Komitato. *Prezidanto:* Prof. Th. Cart, 12 rue Soufflot, Paris V. — *Vicprezidantoj:* J. M. Warden kaj Dro Dietterle. — *Direktoroj de Fakaj Societoj:* Prof. E. Grosjean-Maupin, Dro W. Lippmann. — *Membroj:* J. Baghy, W. Bailey, L. Belmont, P. Christaller, Collinson, Pierre Corret, V. Inglada, G. Isbrücker, B. Migliorini, E. A. Millidge, P. Nylén, Setälä, Stamatiadis.

Akademijaj Korespondantoj: S-ro Rollet de l'Isle (Scienco kaj Teknika Vortaro), S-ro E. Drezen (Rusa lingvo), S-ro M. Sola (Kataluna), S-ro A. Tellini (Ladina), Dro Leono Zamenhof (Pola), S-ro Edv. Backheuser (Portugala).

Oficiala organo de l' E. A.

Oficiala Bulteno de la Esperantista Akademio. — Neregule. — *F.:* 1930, 22 p., 22,5 × 15 cm. — *Red.:* Prof. Th. Cart. — *Adm.:* Esperantista Centra Librejo, 51 rue de Clichy, Paris IX. — *Ab.:* Senpage por la anoj de l' L. K., aliaj 5 Frk. sviss. jare.

Lingva Komitatoj

(La anoj kun steletoj montras la anojn de l' Akademio)

Arnhold, Dro Heinrich, Waisenhausstr. 18-22, Dresden.
Aymonier, Camille, 24 Rue du Bosquet, Caudéran, Gironde.
Backheuser, Dro E., Caixa postal 2494, Rio de Janeiro.
Baghy, Julio, Rottenbiller ut. 66-I-20, Budapest VII.
Bailey, Th. G., Laganville, Nether Street, London N. 3.
*Bailey, W., 32 Crescent Road, Cheetham Hill, Manchester.
Bastien, Louis, 116 Rue de Vaugirard, Paris 6.
Behrendt, Arnold, Hohenstaufenstr. 24, Berlin W.
*Belmont, Leon, Marszalkowska 97 A, Warszawa, Polujo.
Bennemann, Paul, Tiefestr. 5, Leipzig-C. 1.
Bianchini, P. J., Cimpello de Pordenone, Friuli, Italujo.
Blaise, Sino M., Manor Way, North Harrow, Midd., Angl.
Blicher, Martin, Bredgade 63, A III, Kopenhago, Danujo.
Blok, H., Vechtstraat 60, Amsterdam, Nederlando.
Bobin, M., 21 Rue Vital, Paris 16e.
Bofill, Narciso, Sindicato 188-I-ero, Palma de Mallorca.
Boucon, H., 10 Boulevard du Lycée, Annecy, Hte Savoie.
Bremon y Masgrau, Dro J., Balmes 102, Barcelona.
Bulthuis, H. J., Kamillestraat 37, Hago, Nederlando.
Bünemann, Oskar, Papenhuderstr. 32, II, Hamburg 24.
Butin, Max, Kronprinzenstr. 33, Godesberg, Germanujo.
*Cari, Théophile, 12 Rue Soufflot, Paris 5e.
Chavet, Gabriel, Rue Gauthier de Chatillon 6, Lille.
*Christaller, Paul, Neue Weinsteige 61, Stuttgart.
Cogen, Léon, Drève 52, Ninove, Belgujo.
*Collinson, W. E., 9, Bertram Rd., Sefton Pk., Liverpool.
*Corret, Dro Pierre, 133 Bd. Brune, Paris 14.
Couto Fernandez, A., Laranjeiras 225, Rio de Janeiro.
Czubrynski, Dro A., Gimnazjum, Garwolin, Polujo.
Černohvostov, G., Alberga, Finnlando.
Degon, P., 54 Rue Perronet, Neuilly sur Seine, Francujo.
Demidjuk, G., Degtjarnij per. 5, kv. 6, Moskvo.
*Dietterle, Dro Johann, Steubenstr. 10, Leipzig W 31.
Diez, F., Marques del Puerto 14, Bilbao, Hispanujo.
Döhler, Dro W., Rosenplatz 11, Riesa a. Elbe, Germanujo.
*Dombrowski, A., Rotušės Aikšte 6, Kaunas, Litovujo.
Dreher, L., Starowislna 37, Krakow, Polujo.
Dresen, F-ino Helmi, postkast 6, Tallinn, Estonujo.
Drezen, Ernesto, Skatertni 3, kv. 5, Moskvo, Ruslando.

Ellersiek, F., Wilmsstr. 5, Berlin SW 61.
Esselin, A., 10 Place Vintimille, Paris 9.
Fischer, Henriko, Alea Suter 19, Bucuresti, Rumanujo.
Fujisava, Cikao, Kiušu Imperia Universitato, Fukuoka.
Furtado, Mur, Alameda Iter 74, Sao Paulo, Brazilo.
Ghezzeo, Dro A., Via Montecucco 6, Trieste, Italujo.
Gru Casas, Jaume, Claris 72, Barcelona.
Gru Casas, Josep, Casanova 117, Barcelona.
Grenkamp-Kornfeld, S., 4 r. d. Vaugirard, Paris 6.
*Grosjean-Maupin, 7 rue Bonaparte, Paris VI.
Grot, Edgar, Elizabetes iela 9, dz. 33, Riga, Latvujio.
Harvey, W., Craighill Gardens 1, Edinburgh, Skotlando.
Hohlov, N., Margino 28, Moskvo 18.
Hromada, Rudolf, Socharska 333, Praha VII.
*Inglada, V., Prof., Escuela superior de Guerra, Madrid.
*Isbrücker, J. R. G., Oostduinlaan 32, Hago, Nederlando.
Jodko, A., Ananovskij per. dom 5, loĝ. 5, Moskvo.
Kalocsay, Dro K. de, Jozsef utca 4, I. 8, Budapest VIII.
Kamaryt, Dro Stan., ul. Telocvicna 3, Bratislava.
Karolczyk, S., Widok 19, Warszawa, Polujo.
Kastner, Paul, Opatička 6, Zagreb, Jugoslavujio.
Kenn, Dro Won, P. O. Box 88, Kanton.
Kostecki, J., Długa 28, Warszawa, Polujo.
Krestanoff, Ivan H., ul. 6 Septemvri n-ro 28, Sofia.
Kreuz, Robert, 15 Chemin Furet, Genève, Svisujo.
Kühnl, Edvardo, Dittrichova 7, Praha II.
La Colla, Via Sicilia 47, Roma 122.
Lajarte, R. de, 4 Villa d'Orléans, Fontenay sous Bois, Seine.
Lejzerowicz, J., Skwerowa 20, Lodz, Pol. [Budapest.
Lengyel, P., Maria Valeria Tel. all. uj lakas, 32-280.
*Lippmann, Dro Walter, Leibnizstr. 13, Leipzig.
Loy, Karl, Kronach 212, Bayern, Germanujo.
Lundgren, John, Hedemora, Svedujo.
Mangada Rosenörn, J., 19a Regimento, Jáca, Hispan.
Mann, William W., Calandrellistr. 46, Berlin-Lankwitz.
Mazzolini, Alessandro, Via Garibaldi 20, Fano, Marche.
Melckebecke, Dro van, Avenue de France 22, Antwerpen.
*Migliorini, Bruno, Via Alessandro Poerio 29, Roma 44.
*Millidge, E. A., High Salvington, Worthing, Sussex.
Minor, Karl, Brahmallee 10, Hamburg.
Mojado, Mariano, Abascal 13, pral. A. Madrid.
Mućnik, J., Tel-Shamawi, Kfar Jehosuo, Haifa, Palestino.
Nekrasov, N., 1a Tvers. Jamskaja, 35, kv. 5, Moskvo I.

*Nylén, P., Gröna Villan, Huddinge, Stockholm.
Obručev, S. Moika 82, kv. 28, Leningrad, U. S. S. R.
Pillath, F., Sommerburgstr. 38, Essen, German.
Pitlik, Augustin, Kremencova 17, Praha II, Ĉeĥoslov.
Privat, Dro Edmond, 1 Tour de l'île, Genève, Svislando.
Pulvers, S-ino Charlotte, Adelaarsweg 41, Amsterdam.
Racz de Kövesd, Dro B., Hajtsár ut. 161 B., Budapest VII.
Reed, Edward C., 1707 Surrey Lane, Washington, D. C.
Reed, S-ino Ivy Kellerman (la sama adreso).
Rohrbach, Dro, Galbersweg 6, Gotha, Germanujo.
Rollet de l'Isle, 35 rue du Sommerard, Paris 5e.
Rousseau, C., 50 Rue de la République, Clermont, Oise.
Rublev, S., Kazarmenny per. 7, Odessa.
Sabadell, A., Paseo de Gracia 23-4 Dha, Barcelona.
Schmid, Jakob, Müslnweg 2, Elfenau, Bern, Svis.
Schmidt, Dro A., Lützowstr. 8, Gotha, Germanujo.
Scott, H. M., 1312 Purdy Avenue, Moundsville, W. Va.
Sepulveda Cuadra, L., Carmen 1288, Santiago de Chili.
*Setälä, Vilho, Mechelininkatu 21, B. 31, Helsinki, Finn.
Shafer, Ad., 45 Courthorpe Rd. Hampstead, London N. W. 3.
Simon, Otto, Billrothstr. 31, Wien XIX.
Sinpak, A., P. O. Box 88, Kanton.
Sola, M., San Francisco 12, Tarrassa (Barcelona).
Spiridović, E., ul. Libknehta 45-12, Harkov.
*Stamatiadis, Dro Anakreón, Rue Rodou 21, Athenai.
Stojan, Petro, Impasse de l'Air 531, Acacias, Genève.
Stroele, Georges, Maujobia 7, Neuchâtel, Svis.
Supichova, S-ino J., Mala Stepanka 6, Praha II.
Tellini, Achille, Piazza Vittorio-Emanuele 9a, Udine.
Uitterdyck, D., Hyacintenlaan 1, Hilversum, Holland.
Underhill, Dro J., Idaho Springs, Colorado, Usono.
Vaona, Attilio, Via S. Egidio 2-4, Verona, Ital.
Villanueva, A. L., Vergara 12, 2º, Murcia, Hisp.
*Warden, John Mabon, Cluny Drive 41, Edinburgh, Skotl.
Waringhien, G., 17 Place Simon Volland, Lille, France.
Wenger, Jean, Côte 113, Neuchâtel, Svis.
Wiesenfeld, Edvardo, Ogrodowa 3, Warszawa, Polujo.
Witteryck, A. J., 136 Gde. Avenue, Steenbrugge, Belg.
Zamenhof, Dro Leono, Marszalkowska 125, Warszawa, Pol.
Zschepank, F-ino J., Paul-Gerhardt-Str. 22, Dresden-A. 19.

Konstanta Rezentantaro de la Naciaj Societoj (K. R.)

Prez.: Henri Petiau, 60 Bd. St. Liévin, Gand, Belg.
Sekr.-Kas.: Frans Schoofs, 11 Kl. Hondstraat, Antwerpen.

Rezentantoj de la aligitaj societoj:

Argentina: G. B. Lopes, str. San Pedro 341, (Flores),
Buenos Aires. [London W. C. 1.

Aŭstralazia: S-ro Faraker, Australia House, Strand,

Aŭstria: Hugo Steiner, Bisamberg 248 bei Wien.

Belga: Frans Schoofs, 11 Kleine Hondstraat, Antwerpen.

Brazila: J. B. de Mello Souza, Copacabana 830, Rio de Janeiro.

Brita: Montagu C. Butler, 142 High Holborn, London W. C. 1.

Bulgara: Atanas D. Atanasov, Str. Gladstone 52, Sofia.

Ceĥoslovaka: Dro Stan. Kamaryt, Telocvicna 3, Bratislava.
(G. E. L.): Prof. Scholze, Klothildenstr. 6, Reichenberg.

Dana: Alfred Christensen, Kastanievej 32, Odense.

Estona: F-ino Helmi Dresen, Postkast 6, Tallinn.

Finnlanda: Albin Sandström, Kopmansgatan 11, Helsinki.

Franca: René Dubois, 58 rue de la Tombe Issoire, Paris 14.

Germana: Dro H. Arnhold, Waisenhausstr. 18-22, Dresden.

Hispana: Julio Mangada-Rosenörn, Jáca.

Hungara: Dro J. Takács, Vaczi utca 8-I-12, Budapest IV.

Itala: Generalo Carlo di Montezemolo, Castiglione.

Japana: Sindo-Seitaro, Premier House, Umeda, Osaka.

Kataluna: Mariano Sola, San Francisco 13, Terrassa.

Latva: Talivaldo Indra, Pasta Kaste 475, Riga.

Litova: Pastro Dombrovski, Rotužes Aikšte 6, Kaunas.

Nederlanda: J. R. G. Isbrücker, Oostduinlaan 32, Hago.

Norvega: Rolf Bugge Paulsen, Odinsgate 1, Oslo.

Pola: Jan Kostecki, Długa 28, Warszawa.

Rumana: Henriko Fischer, Alea Suter 19, Bucuresti.

Sveda: Paul Nylén, Huddinge, Stockholm.

Svisa: Eduard Stettler, Bundesgasse 16, Bern.

Urugvaja: . . . , Calle San José 1139, Montevideo.

Usona: E. A. N. A., 1591 Anderson Ave., Fort Lee, N. J.
A. S. Vincent, 400 California street, San Francisco, Cal.

Universala Esperanto-Asocio (UEA)

Estrata de komitato 22—25-membra, el kiu estas elektata Komisiono konsistanta el sep anoj, al kiu estas konfidata la supera gvidado de la Asocio. La administrado, financoj, redaktado kaj korespondado estas plenumata profesie en la Centra Oficejo, direktata de respondeca Direktoro. (Art. 31-36 kaj 39-43 de la statuto.)

Prez.: Eduard Stettler, Bundesgasse 16, Bern.

Vicprez.: Johannes Karsch, Dresden-N. 6, Schliessfach 10.

Direktoro: Hans Jakob-Notz, Genève.

Centra Oficejo: 1, Tour de l'Île, Genève, Svis.

(La liston de la Komitatanoj de UEA vidu paĝon 83)

Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado (I. C. K.)

Honora Prezidanto: Dro Edmond Privat, Territet, Svis.

Prezidanto:

John Merchant, 13, Hartington Rd., Millhouses, Sheffield.

M. Rollet de l'Isle, 35 rue Sommerard, Paris 5 (Franc.).

Prof. Dro J. Dietterle, Steubenstr. 10, Leipzig W 31.

Dro Feliks Zamenhof, Marszałkowska 48, Warszawa, Pol.

* * * *KEU:* *Komercista Esperanto-Unio*, Agentejo (Toko Esperanto): Postbox 81, Soerabaia (Javo). — Perado, reprezentado, eksporto de Java-produktoj: teo, kafo, tabako, ledo; „Kroepuk Oedang“, speciala Java-mangajo. — *Celo:* Vidu sub KEU, Dresden (Germanujo).

Tandjoeng Balai (Sumatro). 4000. — Apud la maro. — *D:* W. L. J. Sparenburg, lernejestro, Heerenstr. 52.

Norge **NORVEGUJO** Kongeriket Norge

Nacia Societo:

Norvega Esperantista Ligo (N. E. L.). — *Fondo:* 1911. — *Organizo:* Konsistas el grupoj kaj izoluloj. — *Kot.:* Individua membro 4 Kr., grupoj pagas po membro 2,50 Kr. — *Gazeto:* „Norvega Esperantisto“. — *Stato:* 100 membroj. — *Estraro:* Prez.: R. Bugge-Paulsen; Sekr.: H. Bonnevie; Kas.: A. Arnessen; Bibl.: S-ino H. Nyström; Anoj: B. Ottesen, F-ino R. Bye; Revizoroj: S-ino A. Sletterød, F-ino E. Nilssen. — *Adreso:* H. Bonnevie, Bergsliens gt. 11, Oslo.

Gazeto:

Arbeider-Esperantisten (Laborista Esperantisto). Monata. — *F.:* 1924, 4 p., 30 × 22,5 cm. — *Adr.:* „Agado“, Esperanta librejo, postkesto 407, Oslo. — *Ab.:* 3 Kr. norv.

Universala Esperanto-Asocio

Lokoj kun Delegitoj

Bergen. 100 000. — „Pordo de Norvegujo“.

D: Olav Farstad, homeopato, Homeopatiske Institut, Kavligarden.

VD: Ludv. Ellevin Anjer, studento, Fjøsanger.

HS: Bondeheimen, Kong Oscarsgarde 22; *L:* 3,50-5, *M:* 2,50, *P:* 7,40 Kr.

Drammen. 26000. — Haveno; komerca, industria loko.

D: Edwin N. Wahl, bankoficisto, c/o Drammens Privatbanker.

HS: Hotel Central, 2 min. de P' stacio; *L:* 4-5, *M:* 2,50, *P:* 13-14 Kr. T. 10 %.

Norvegujo

Halden. 13 000. — Loko kie militmortis Karlo XII. 1718.
VD: Arvid Pihlström, paperlaboristo, Oskarsgate 16.

Haugesund (Rogaland). 16660. —

D: Jon Lotsberg, instr., Vibrandsøy pr. Haugesund.

Holmestrand. 2500.

D: Olaf Stören, ĉefinstruisto.

Nams (Nordre Trondjem). 3800. —

D: Reinert Buseth, libristo.

Nidaros. 55 000. — Antaŭe Trondhjem.

D: Ragnø Rian, komercisto, Nonnegaten 27.

Oslo. 260000. — Ĉefurbo ĉe norda fino de bela insulara fjordo 97,5 km longa. Haveno. Reĝa kastelo. Universitato. Norvega Nobelinsti-



tuto. Grava komerco, industrio. Siplinioj. Kulturhistoria liberaera muzeo. Viking-ŝipoj. Arto. Muziko. Sportoj: skia, glitveturila, velsipa. Belegaj ĉirkaŭaĵoj: Fjordo kun insularo, montoj kun arbarego. Taŭga elirpunkto por turismaj vojaĝoj. Alveno: Aere de Berlino kaj Hamburgo. Ŝipe de Stettin, Hamburgo, Antverpeno, Hull, Newcastle, ĉirkaŭ 48 horojn; kaj København, ĉirkaŭ 24 horojn. Vagonare

de Berlino kaj Hamburgo, ĉirkaŭ 24 horojn.

D: Arne Arnessen, bankrevizoro, Bondernes Bank.

VD: Jens Schjerve, oficisto, Bennetts Reisebyraa. 35 Karl Johansgate.

EG: Esp. Klubo. Adr.: F-ino Nelly Henriksen, Munkedamsveien 53-b. Ejo: Middagsstevnet, Bogstadvæien 8-II (ĉiun 1-an M monate).

„Norvega Esperantista Ligo“. Adr.: H. Bonnevie, Bergsliensgate 11.

„Societo de Esp. Laboristoj“, Adr.: Birger Andersen, Schweigardsgate 92. Ejo: Arbeidersamfund, Torvgaten 14 (S). [M: 1,50 Kr.

HS: Hôtel d'Angleterre, 2 Karl Johansgate; L: 4,

HS: Hospitset, 1 Rosenkranzgangen; L: 4,50, M: 2 Kr. (En ambaŭ: Imposto ŝtata 10% sur mangajaĵoj. T. 10%.)

** Turisma Asocio (Reiseforeningen). Adr.: Stortingsgaten 2, Oslo. Oficiala centra organizo por prosperigo de

Norvegujo - Novzelando - Palestino

la turisma trafiko al la lando de la noktomeza suno kaj al la hejmlando de la skisporto.

Stord (Sunhordland). 3000. — En Hardangerfjordo.

D: Nils Okland, kantoro, Rommetveit.

Tistedalen. 3000. — Industrio de teksaĵoj, fero, emajlo.

D: Emil Andreassen, betonfondisto.

Trondhjem (Drontheim) vidu Nidaros

NOV-ZELANDO

New Zealand — Dominion of New Zealand

Auckland. 210 000. — Piede de Mount Eden, meze de vulkana tereno. Fondita 1840, ĝis 1876 sidejo registara. Haveno. Plej granda urbo en Nov-Zelando.

D: Cyril John Adcock, instruisto, Drury.

Christchurch. 123 000. — Fondita 1852. [St. Albans.

D: Norman M. Bell, instruisto, 134, Fitzgerald Street,

Dargaville (Auckland).

D: Alfredo Gregory, aferisto, William Penn Branch, Brotherhood of Life, International Hall.

EG: Adr.: Ce la Del. Ejo: Every Boys Reading Room, International Hall (J 19.20).

Feilding. 5000. — Eksporto de butero kaj lano.

D: Samuel Andrew, teragento, Deubigh Square.

Wellington (Wellington). 110000. — Ĉefurbo, sidejo de la registaro. Bona haveno ĉe sudo de la Norda Insulo.

D: L. E. Dust, plumbisto, 20 Chelsea Str., Miramar.

VD: William Hudson King, poŝtoficisto, Postal division, Secretary's Office, G. P. O.

EG: Adr.: B. Potts, 34 Argentine Ave. Miramar.

Ejo: YMCA, Willis Street.

Whangarei. 6000. — Cementfabrikado, eksporto de karbo.

D: David Tilly, administranto de la gajejo.

PALESTINO

(Lando de filistoj; greke: Palaistinoi; biblie: Kanaan)

Jerusalem. 100000. — Unu el la plej antikvaj urboj, jam 15 jarcentoj a. Kr. nomita. Ĉefurbo. Sankta urbo de hebrea kaj kristana religioj. Sidejo de romkatolika, greka kaj armena patriarkoj. Logantaro: 60000 hebreoj,

25000 kristanoj, 15000 mahometanoj. Hebrea universitato; hebrea biblioteko kun 225 000 libroj. Sidejo de l' Supera Komisario, de l' Ĉefa Rabeno. Eksporto de vino, oranĝoj, bananoj, tabako.

D: Pinhas Laŝovicki, arkitekto, Kerem Quar.

VD: Samuel Genio, Old City, Jewish Quarter.

EG: „Paco kaj frateco“, *Adr. Ejo:* Ĉe la Del.

Panama **PANAMO** República de Panama

Balboa Heights (Canal-Zone).

D: Earle A. Young, oficisto, P. O. Box 214.

Papua **PAPUO** Territory of Papua
Antaŭe Brita Nova Gvineo. Dependas de l' Aŭstralia Ligo.

Samarai. — Haveno. Eksporto: Kupro. Radiostacio.

D: Frederick James Williams, kuracisto.

Irán **PERSUJO** Mamâlik-i-maruza-i-Irân

Espahan (Irak Aĝam). 150 000. — Tre antikva urbo.

D: A. G. Amiri, redaktoro de l' gazeto „Akhgar“, Sarĝuŝah.

Masjid-i-Sulaiman (Khuzistan). 20 000. — Antikva urbo.

D: Habibullah Taher-Zadah, ĝenerala sekretario, Geologia Departemento.

Recht (Gilan). 40000. — 30 km ĝis Kaspia Maro.

D: Haĝi Sejd Mohamed Ruhani, bienposedanto, Bad-del-Lah.

* * *KEU:* *Komercesta Esperanto-Unio*, Agentejo: Mirza Mahmud Gulŝeni, Sraje Gulŝeni, Recht (Persujo). — *Celo:* Eksporto, importo kaj reprezentadoj de fabrikoj kaj firmoj; cetere vidu sub *KEU*, Dresden (Germanujo).

Sultanabad (Arak). 35 000. — Tapiŝfabrikado.

D: Reza Taheri.

Tabriz (Azerbajĝan). 250000. — Ĉe montaro Sahand kaj rivero Aĝi. Iama ĉefa komerca loko. Kotonteksado, silk-ajoj, tapiŝoj, nafto, sulfuro, karbo, fruktkulturado.

D: Darjuŝ Nemseĉi, komercisto, Sheshklan.

EG: Esperanto-Societo, *Adr. Ejo:* Ĉe la Del. (V 17).

Teheran. 350000. — Ĉe la ekstremaĵoj de montaro Elburs. Ĉefurbo. Rezidejo. Scienca lernejo. Karavancentro.

D: Bahmen Sidani, redaktoro.

VD: Ahmed Jazdani Kasravi, oficisto ĉe urba financa administracio, Boulevard Gomrok, rue Sabzikar.

Polska **POLUJO** Rzeczpospolita Polska

Nacia Societo:

Pollanda Esperanto-Delegitaro (Ogólno-Polska Delegacja Esperantystów). — *Fondo:* 1926. — *Organizo:* Ĉiu esperantista societo aŭ grupo en Pollando delegas reprezentantojn laŭ la nombro de iliaj membroj. — *Kot.:* Laŭ decido. — *Gazeto:* „Pola Esperantisto“. — *Servoj:* a) informejo, b) propagando, statistiko, eldono de propagandiloj. — *Stato:* 22 grupoj. — *Estraro:* Prez.: Prof. Odo Bujwid; Vicprez.: Ing. Eugenjuŝ Tor; Sekr.-Kas.: Józef Alfus; Org.: Dro Leon Rosenstock. — *Propagando:* Dro Leopold Dreher, krome dek estraranoj. — *Adreso:* Józef Alfus, Krakow XXII, Aleja Dembowskiego 10.

Gazeto:

Pola Esperantisto. Monata gazeto de polaj esperantistoj. — *F.:* 1906, 16 p., 16 × 23,5 cm. — *Eldon-nombro:* 700. — *Red.:* Prof. Odo Bujwid kaj T. Hodaĵowski. — *Adreso:* Lubicz 34, Kraków. — *Ab.:* 8 Zlotoj jare.

Faka Societo:

Laborista Esperantista Societo „Laboro“ en Pollando. — *Fondo:* 1922. — *Organizo:* Centra komitato, lokaj grupoj. — *Celo:* Propagando de Esperanto inter klas-konciaj laboristoj kaj laboranta intelektularo. Senpartia organizado de proletaj esperantistoj. — *Estraro:* Prez.: Jos. Litauer; Sekr.: Jan Zawada. — *Adreso:* Marszałkowska 81, m. 33, Warszawa.

Universala Esperanto-Asocio

Teritorio de UEA: Polujo

Cefdelegito: J. Shapiro, Lipowa 33, Bialystok

Poŝteka konto: 60.074 — Telefono: 3-31

Lokoj kun Delegitoj

- Augustów** (Bialystok). 14000. — Arbara industrio.
D: Natan Warhaftig, industriisto, Poŝta kasto 17.
- Baranów n. Wieprz.** (Pow. Pulawy). 5000.
D: Bolesław Józwicki, instruisto de popola lernejo.
- Baranowicze** (Wilno).
D: Abram Gelfand, komercisto, Sadowa 38.
- Będzin** (Woj. Kielce). 40000. — Karbo, metalo. Ruinoj.
D: Abram Mojżesz Rozen, komercisto, Potockiego 15.
VD: Jakobo Freiburger, oficisto, Browarna 3.
EG: Adr.: Ĉe la Del. (V).
- Biała-Podlaska** (Woj. Lublin). 22000. — Kastelo.
D: Nachman-Chaim Rozmaryn, dentteknikisto.
Skrzynka pocztowa 39.
EG: Pola Esperanto-Asocio, Adr. Ejo: Ĉe la Del.
HS: „Viktoria“, 10 min. de la stacidomo; L: 5, P: 12 Zl.
- Białystok.** 97185. — Naskiĝurbo de Dro L. L. Zamenhof.
Loko de I Internacia Postkongreso Esperantista, Aŭg. 1931.
D kaj ĈD: Jakob Shapiro, ĵurnalista, Lipowa 33.
EG: Zamenhofa E.-S., Adr.: Polna 4 (ĉiuvespere 20-23).
HS: Hotel Ostrowski, ul. Sienkiewicza 15; L: 3-6 Zl.
- Bielsko.** 20000. — Ĉe rivero Biala. Turisma centro.
D: Dro Julius Haas, dentkuracisto, ul. Kolejowa 11.
VD: Sigm. Fränkel, fabrikisto, Ul. Starobielska 1.
EG: Adr.: Ĉe la Del. Ejo: Restoracio Schöja (L 20).
- Bolechów** (Woj. Stanisławow.) 5000. — Salminejo.
D: Arie Hoszowski, ligna industriisto, No 340.
- Brzesc n. Bugiem** (Polesie). 40000. — (Brest Litovsk.)
D: Rajnoldo Vonago, ĵugisto, Białostocka 35.
VD: Michał Demidowicz, pensiulo, Sienkiewicza 10.
- Bydgoszcz.** 115000. — Ĉe rivero Brda-Brahe.
D: Francisko Prengel, astrologo, Koscielna 1, II.
VD: Arthur Pankratz, Sejmdeputito, ul. Matejki 7, II.
EG: Adr.: Kościelna 1-II. Ejo: Ne konstanta.

- Chełmno** (Pomorze). 16000. [Kadetów 2.
D: Bronisław Radziwiński, instruisto, Korpus
- Chorzów** (Gorny Slask). 17000. — Azoto, karbo.
D: Konstanty Czajka, maŝinisto, Sobieskiego 3.
VD: Tomas Bywaletz, inspektoro, Szkolna 20.
EG: Adr.: Ĉe la Del. Ejo: Rest. Morcinek, Szkolna 15.
- Czarny Dunajec** (Malopolska). — Somera restadloko.
D: Stanisław Peksa, notario.
- Czersk** (Pomorze). 9000. — Eksporto de ligno.
D: Kazimierz Majorkiewicz, instruisto.
- Częstochowa.** 120000. — Fama bildo de Dipatrino.
D: Abrahamo Karmiol, komercisto, Nowy Rynek 5.
- Czortków** (Malopolska Wsch.). 25000. — Ĉe rivero Seret.
D: Hillel Oberländer v. Sternberg, bibliotekisto, ul. Głowna 95.
- Dąbrowa-Górnica** (Kieleckie). 50000. — Ferindustrio.
VD: F-ino Lola Weisbeker, Król. Jadwigi 32.
EG: „Tagigo“. Adr.: F-ino Tola Rozenblum, Kr. Jadwigi 32. Ejo: Poalej Sjon, ul. Kosciuszki 31 (J 20).
Lab. grupo ĉe TUR. Adr. Ejo: 3-go Majo 14 (D 17).
- Drohobycz.** 33000. — Apud Boryslaw, centro de petrolo.
D: Joachim Altmann, oficisto, Plac Smolki.
HS: Hotel Europejski; L: de 6 Zl.
- Garwolin** (Lublin). 6000. —
D: Dro Ant. Czubryński, profesoro, Gimnazjum.
HS: Hotel Gasowskiego; L: 5,25 Zl. T. inkluzive.
- Grodno** (Woj. Białystok). 60000. — Kastelo.
D: Natan Fridman, instruisto, Bonifraterska 11/6.
- Grudziądz** (Pomorze). 60000. — Antikva urbo.
D: Ferdynand Neumeuer, redaktoro, Kościelna 27.
- Kalisz.** 60000. — Antikva pola urbo „Calissia“.
D: Aleksy L. Lasiński, redaktoro, skrz. poczt. 149 (hejma adreso: ul. Dobrzecka 11/5).
EG: P.E.A., Adr.: Ĉe la Del. Ejo: Redakcio de „Ziemia Kaliska“ (D 16-18). [10-12 Zl. T. 10%].
HS: „Europa“, Aleja Józefiny 3; L: 5-6, M: 1, P:

** *Drukarnia Wydawnicza* (Eldona Presejo en Kalisz),
Adr.: Ĉe la Del. — Provizita per plej novaj kaj modernaj
 tipoj de preslitteroj. *Presas*: Flugfoliojn, blanketojn, bro-
 ŝurojn kaj verkojn Esperantlingvaj. Senkonkurencaj prezoj.
 Akurata plenumo de mendo. Propra korektado. Ofertoj kaj
 prezoj laŭ deziro senpage.


Kartuzy (Pomorze). 3900. — Proksime de urbo Danzig.
D: Franciszek Sielke, instruisto, ulica Gdanska 23.

Katowice (Gorny Glask). 60 000. — Karboregiono.
D: J. Tichawski, oficisto, ul. Plebiscytowa 25, III.
VD: Max Kloss, priv. oficisto, ul. Wawelska 3, II.
EG: Societo de Esperanto-Amikoj, *Adr.*: Ĉe la VD.
Ejo: Restoracio Naleppa, ul. Kościuszki 38 (Mk 20).
HS: „Monopol“, Ulica Dworcowa; *L*: 6,50-15 Zl.

Kołomyja. 40 000. — Ĉe rivero Prut. Petrolrafinado.
D: Orest Kuzjma, gimnazia profesoro, Nova ulica 4b.
VD: Antin Karatnyckyj, Jahajlonska ul. 40.
EG: „Progreso“, soc. de ukrainaj Esp., *Adr.*: Ĉe la Del.

Korzec (Wolyń). 7000. — Ĉe rivero Korczyk.
D: F-ino Fela Zawodnik, instruistino, Szkolna 10.

Kraków. 210 600. — Ĉe rivero Wisla-Vistulo. Iama re-
 zidejo kaj kronigurbo de polaj reĝoj. Fondita
 ĉirkaŭ la jaro 700. Pentrinda ĉirkaŭajo apud
 la rivero Vistulo. Kun neniu alia urbo en Pol-
 ujo estas tiel ligita pola historio kiel kun Krak-
 ów. Je ĝiaj muroj dispeciĝis en 13a jc. atakoj
 de Tataroj. El Kraków ekmarŝis kun militistaro
 kontraŭ Turkoj pola reĝo Johano III. Sobieski,
 por savi Vienon kaj Eŭropon. Ĉi tie nacia heroo
 Tadeo Kościuszko organizis batalon por libereco de Pol-
 ujo. Vidindaĵoj: Reĝa kastelo Wawel kun katedralo, tre-
 zorejo, reĝaj tomboj ktp., Barbakano, urba turo, drap-
 haloj, Jagelona biblioteko, diversaj muzeoj. Preĝejoj: de
 S-ta Barbara, S-ta Anna kaj multaj aliaj; malnova sinogogo.
D: Ign. Wiesenberger, fabrikdirektoro, ulica
 Powiśle 12.
VD: F-ino R. Weinsberg, prokuristino, Sm. Anny 9.



Granda placo, urba turo, draphaloj, S-ta Adalberto



Wawel Katedralo

EG: Societo Esperanto. *Adr.* kaj *Ejo*: Muzeum Prze-
 myslowe, ulica Smoleńska 9 (*L* 20).
 „Pola Esp. Klubo“ *Adr.*: Dro Edw. Kosteckki, Szkoła
 Przemyslowe. *Ejo*: Muzeum Przemyslowa Smolenska 9.
 „Studenta Rondo“, *Adr.*: M. Ziomek, ul. Winc. Pola 5.
 „Fervoĵista Profesia Asocio“, esp. fako. *Adr.*: ul.
 Warszawska 17.
 „Skoltina Esp. Grupo“, *Adr.*: ul. Lubomirskich 43.

Kremenc (Wolyn). 25000. — Poeto Jul. Slowacki.
D: Bazylł Doroszenko, instruisto, Pocztova 28,

Królewska Huta (Gorny Slask). 80 000. — Industrio.
D: Emil Kolodziej, elektro-muntisto, ul. Mickie-
 wicza 76. — *EG*: Rondo Esp., *Adr.*: Ĉe la Del.

Leszno (Blonie, pod Warszawa). 3000. —
D: Adam Furmanik, pastro.
EG: „Juna Esperantisto Mariavita“, *Adr.*: Laborista Ofic-
 ejo, poŝto Blonie Leszno. *Ejo*: Dom Ludowy (J kaj D).

- Lida** (Wilno). 20 000.
D: Andrzej Golachowski, arbara ing., Nadleśnictwo.
Łódź. 600 000. — Centro de tekstilindustrio pola.
D: Włodzimierz Pfeiffer, libristo, Księgarnia Fiszerza, Piotrkowska 47.
VD: Izrael Lejzerowicz, komercisto, Skwerowa 20.
EG: Lodza E.-Societo. *Ejo:* Poludniowa 3 (L, J 20-22). „Laboro“, *Adr. Ejo:* Cegielniana 75 (L, J 20-22).
*** KEU:* Komercista Esperanto-Unio, Agentejo: str. Radwanska 6. — Perado kaj reprezentado, eksporto kaj importado, informoj en ĉiuj komercaj aferoj. — Celo: Vidu sub KEU, Dresden (Germanujo).
Łomża (Białystok). 30 000. — Ĉe bordo de Narev.
VD: Mojżesz Perelman, dentkuracisto, Długa, 7.
EG: Zamenhofa Esperanto-Societo, *Adr.:* Ĉe la Del.
Lubania n. Pilica (Warszawa). 7680.
D: Józef Bulski, instruisto.
Lublin. 120 000. — Malnova pola urbo apud Bystrzyca.
D: Czesław Pruski, ŝtatoficisto, Konopnicka 8 m. 7.
EG: Filio de Pola E.-Asocio, *Adr. Ejo:* „Warszawska“, str. Krak. Przedm. 60; Tel. 16.07 (Mk 20).
HS: „Victoria“; L: 6, M: 2 Zl. T. 10 %.
Luck (Wołyn). 30 000. — Ĉe rivero Styr. Antikva urbo slava.
D: Anatol Koch, termezuristo, Ul. Wąska 9.
Lwów. 250 000. — Naftofontoj. Universitato de 1784.
D: Dro Isidoro Fels, kuracisto, ul. Stoneczna 1.
VD: Józef Kucharz, fervojisto, Na Blonie.
EG: Societo Esperanto, *Adr. Ejo:* Instytut Technologiczny, Boularda 5 (M, J 18).
Mława (Warszawa). 24 000.
D: Roman Sakowicz, juristo, Warszawka 65.
Mysłowice (Gorny Slask). 24000. — Karbominejoj.
D: Walenty Jamrozy, flegisto, ul. Oderskiego 3, II.
VD: Izidor Czypionka, hejtisto, Szabelnia, 10.
EG: Rondo de Esperanto-Amikoj, *Adr.:* Ĉe la Del.
Nowa-Wilejka (Wilno). 6000. — Proksime de Wilno.
D: Leon Kozyro, fervoja oficisto, Kościuszki 4.
Nowogródek. 8500. [Robót Publicznych].
D: Michał Chmielinski, ŝtata inĝeniero, Dyrekcja
HS: „Europa“, Rynek; L: 5 Zl.

- Ostrołęka** (Białystok). 10000. — Batalkampoj 1807, 1915.
D: Josef Gutmann, kuracisto, Kościuski, 39.
EG: Esperantista Grupo, *Adr.:* Ejo: Ĉe la Del. (S 20).
Pelplin (Pomorze). 4000. — Katedralo. Pastra seminario.
D: A. Troszyński, studento, Seminarjum Duchowne.
EG: IKUE, loka grupo, *Adr. Ejo:* Ĉe la Del. (J 20).
HS: Hotel Pelplin, str. Dworcowa 7; L: 4, M: 1,50 Zl.
Piaski Luteckie (Lublin). 6000.
D: Florentyn Kotliński, instruisto.
Płock (Woj. Warszawskie). 20000. — Ĉe rivero Wisła
D: F. Feldman, mariav. episkopo, ul. Dobrzynska 27.
VD: Salomon Kon, fil. studento, ul. Tumska 9.
EG: Mariavita Junularo, *Adr.:* Ejo: Ĉe la Del. (D 19).
Proszowica (Kielce). 15 000.
D: Jakobo Rozenblum, instruisto.
Przemysl (Malopolska). 60 000. — Ofte citita dum milito.
D: Leon Blech, ul. Jagiellonska 6.
HS: „Cit“, ul. Kolejowa; L: 8-12 Zl.
Radom. 80000. — Ĉe rivero Mlečna fluanta en Radomka.
D: Jan Wojtas, tajloro, Ogrodowa 7. [jazdowa 1/39].
VD: Franciszek Wrzesień, konstruteknikisto, Pod-
EG: Pola Esperanto-Societo, *Adr.:* Ĉe la Del. *Ejo:* Biblioteko de Polska Macierz Szkolna, Wysoka 33 (J 20).
Równe (Wołyn). 60 000. — Proksime de la rusa limo.
D: Izaak Zafrański, librotenisto, ulica Sienna 1.
VD: Mordko Icekzon, librotenisto, ul. Jagiellonska 29.
EG: Rondo de Esperanto-Amikoj, *Adr.:* Ĉe la Del. (S).
Roździeń-Szopidnice (Górny Slask). 24 000.
D: T. Niedzwiedz, ŝtata trezorofic., Piłsudskiego 18.
EG: „Zamenhof“, *Adr. Ejo:* Magistrata domo Szopienice, ul. 3-go Maja (Mk 20).
„Espero“, Adr.: Ĉe la Del. *Ejo:* Restoracio Babczyński Rozdzien, ul. Janowska (J 20).
Ruda (Slask). 29 000. — Apudlima urbeto.
D: Abraham Rozenes, komercisto, Biskupicka 3.
Siedlce. 40100. — Ĉefloko de distrikto samnoma.
D: Bolesław Żmuda, konstruisto, ul. Asłanowicza 20.
HS: „Wiktoria“, ul. Piękna 15; L: 5 Zl. T. 10 %.

- Siemianowice-Śląskie.** 40 000. — Karbo. Fero.
D: Stanisław Reichman, komercioficisto, ul. Sienkiewicza 17.
- Sosnowiec** (Zaglembie). 130 000. — Karbminejoj.
D: Bolesław Czechowski, instruisto, „La Ornamo“.
 Prez. Mosciekiego 9, Hale Targowe. [Czysta 1.
VD: F-ino Gustawa Lewenhofowna, oficistino,
EG: Lab. gr. ĉe TUR, *Adr.:* Grochowa 1, St. Klejnota.
 „UEA-grupo“, *Adr.:* Ĉe la Del. *Ejo:* Str. Przejazd 1,
 Dro A. Ingster (J 20.30). [gistrato.
 „Mul“, urblerneja grupo, *Adr.:* M. Wdowik, ma-
- Staszów** (Kielce). 13 000. — Ĉe rivero Czarna.
D: Mejlich Rizenberg-Czajkowski, hotelposedanto,
 Krakoska 6. — *EG:* *Adr.:* Ĉe la Del. (V, S 19).
 „Laboro“, *Adr.:* ul. Złota 2 (L, J 19).
- Stoczek Łukowski.** 3000.
D: Józef Poniatowski, instruisto = nauczyciel.
- Stryj** (Stanisławow). 35000. — En la Karpatoj.
D: S-ino Erna Zimand, komercistedzino, Str. 3. Maja 6.
VD: Norbert Steinberg, librotenisto, Szeroka 307.
HS: „Rosenberg“, Str. 3-go Maja 24; L: 5, M: 1 Zł.
- Święciany-Wileńskie.** 6000.
D: Aleksander Juchniewicz, komisaro defend-
 arbara, ul. 11-go Listopada 26.
HS: Hotel Gilińskiego, ul. Lyntupska 21; L: 1,50 Zł.
- Tarnobrzeg** (Lwów). 3174. — Ĉe Vistula rivero.
D: Karol Mikoś, popola instruisto.
- Tarnów** (Malopolska). 44000. — Malnova urbo ĉe Biala.
D: F-ino Irena Traumdwna, ul. Towarowa 338.
HS: Hotel Polski, ulica Kolejowa 7; L: 6,60 Zł.
- Tomaszów-Lubelski** (Woj. Lublin). 12 000.
D: Jozef Zolnierenk, gimn. prof., ul. Lwowska 47.
- Tomaszów-Mazowiecki** (Woj. Łódskie). 35 000. — Silko.
D: Julian Blay, komerca oficisto, Sw. Antoniego 17.
- Toruń** (Pomorze). 55000. — Ĉe Wisla-Vistulo.
D: Dro Ignacy Dziedzic, advokato, ul. Szeroka 43.
HS: „Polonia“; L: 8,50, M: 2,90 Zł.
- Tuczyn** (Wołyń).
D: F-ino Leja Kornin, oficistino.

- Warszawa.** 1 100 000. — Ĉe Wisla-Vistulo. Ĉefurbo.
 Katedralo. Kastelo. Palacoj. Belveder kaj Lazienkowski.
 Universitato. Teknikaj lernejoj. Politekniko. Libera uni-
 versitato pola. Supera komerca lernejo. Agronomia kaj
 Veterinara institutoj. Bibliotekoj, muzeoj, galerioj. In-
 dustrio: maŝinoj, kemioj. Komercio: lano, konfekcio, lu-
 polo. Tombo de Dro L.L. Zamenhof, aŭtoro de Esperanto.
D: W. Miernicki, industriulo, Marszałkowska 88.
VD: F-ino Halina Weinstein, studentino, Leszno 99-5.
EG: Pola Esp.-Asocio, *Adr.:* Widok 19. *Ejo:* Nowy
 Świat 27 m. 8 (L, J 20, escepte Julio—Septembro).
 „Pola Studenta Esp. Societo“, *Adr.:* Leszno 99 m. 5.
Ejo: Bagatela 15 m. 3, 2a etaĝo (Knabina Gimnazio)
 (L kaj V 19.30, escepte dum Julio ĝis Septembro).
 „Akademia Esp. Rondo“, *Adr. Ejo:* Żydowska Strzecha
 Akademicka, Nowy Świat 21.
 „Konkordo“, *Adr. Ejo:* Marszałkowska 141.
 „Pola E.-Instituto“, *Adr.:* E. Wiesenfeld, Ogrodowa 3.
 „Laborista Esp. Societo Laboro-Praca“, *Adr.:* Adv. Li-
 tauer, Marszałkowska 81. *Ejo:* Długa 19 (Mk 20).
 „Tramista Esp. Rondo“, *Adr.:* Chłodna 51 m. 15.
 „TEKA“, *Prez.:* Dro W. Robin, Marszałkowska 113.
- Wieliczka** (Malopolska). 9000. — Mondfama salminejo.
D: Dro Zygmunt Müller, juĝisto.
HS: „Pologne“, ul. Basztowa; L: 10, M: 2 Zł. T. 10%.
- Wilno.** 200 000. — Ĉe rivero Wilja. Loĝantaro diversnacia.
D: K. Geršater, ul. Pilsudskiego 23.
EG: „Esp. Rondo Akad.“, *Adr.:* Jagiellońska 3 m. 2.
 Esperanto-Societo „Universo“, *Adr.:* Zawalna 15-7.
 ** Nova utila entrepreno aliĝinta al UEA estas la
Mnemonika Instituto laŭ memorfortiga metodo trifoje premi-
 ita de la Pariza Akademio de profesoro D. Fajnstejn en
 Wilno (Polujo), Zawalna 15/11. La mnemonikaj perkore-
 spondaj lecionoj en Esperanto tute anstataŭas la personan
 instruadon. Prospektojn postulu senpage.
- Wiśnicz** apud Bochnia. 3500. — Ĉe submontaro Karpaty.
D: Dro Isajo Fragner, advokato.
- Włocławek** (Woj. Warszawa). 55 000. [browskiego 1/12.
D: Adam Szczygłowski, farmaciisto, Plac Gen. Da-

Polujo

- Włodzimierz** (Wolyn): 23 000. — Ĉe rivero Lug.
D: Erasto Krajewski, florkultur., Mala Browarna 6.
- Zabierzów** apud Krakow (Malopolska). 2000. —
D: Josef Fudro, kaldronisto, N-ro 64.
- Zakopane** (Malopolska). 15000. — Somerrestadejo.
D: Tadeusz Kaciczak, komercisto, Kóscielisko.
** *Tutjara sanigejo* sub piedo de alta montaro kuŝanta je 800—1000 m super la maro. Ideala ripozejo. Renkontejo de eminentuloj. Centro de turismo. Ĉefurbo de vintra sporto. Ideala klimato je specialaj sanigaj kondiĉoj. Koncernajn informojn oni ricevas de Zarząd Uzdrowska, Rynek.
- Żółkiew** (Malopolska). 8000. — Centro de peltindustrio.
D: Emanuel Hay, asekuristo.
HS: Hotel Wilh. Plapler; L: 5, M: 1,25 Zl. T. 10%.
- Żychlin** w. Warszawa (pow. Kutnowski). 8000.
D: Romuald Soloniewicz, doktoro de medicino.

Adreslibro de Pollandaj Esperantistoj (en Esperanto)

Kun Praktika Informilo Pri-Esperanta (en pola lingvo)

El la enhavo:

Parto I-a: 15 ĉefaj argumentoj por Esperanto. Indikoj por memlernantoj. Esperantista gazetaro tutmonda. Organiza strukturo de la Esperanto-movado. Fundamenta biblioteko de l' Esperantisto. Ĉefaj sukcesoj de Esperanto de post 1918 kaj aliaj informoj.

Parto II-a: Adresaro de pollandaj esperantistaj organizaĵoj kaj grupoj. Adreslibro de Pollandaj Esperantistoj. Pli ol trimil adresoj kun indiko de la profesioj k. a.

Prezo: enlande Zlotoj 3.—, eksterlande 3 svisaj Frankoj sen afanko, por kio oni aldonu 10% de la valoro.

Ĉiuj mendoj kaj mensendo estu direktataj senpere al la **Redakcio de la Adreslibro de Pollandaj Esperantistoj**

M. O. Czerniakow, ul. Zacieczna, 2, J. Zawada,
Warszawa (Pollando) — Poŝtĉeka konto: 20845, Varsovio

Portugalujo

Portugal PORTUGALUJO República Portuguesa

Nacia Societo:

Portugala Esperanto-Asocio. — *Fondo:* 1925. —
Organizo: Lokaj grupoj, individuaj anoj. — *Adreso:* Apartado 279, Lisboa.

Universala Esperanto-Asocio

Lokoj kun Delegitoj

- Arcos de Valdevez** (Minho). 3000. —
D: Jose Maria da Silva, komercisto, Rua Alexandre Herculane 26.
- Caria** (Beira Baixa). 3500.
D: José Antunes, librotenisto.
- Castelo Branco** (Beira Baixa). 10 000. — Korkporduktado.
D: José Alex. Nascimento, kom., Rua Olarias 46.
- Coimbra**. 26000. — Ĉe rivero Mondego.
D: Manuel Pereira da Costa, leŭtenanto, Regimento de Artilharia 2.
VD: Filipe Paes Fidalgo, hotelisto, Hotel Coimbra.
HS: „Coimbra”; L: 15, M: 15, P: 40 Esk. T. 10% Esperanto parolata.
- Lisboa.** 800 000. — Antikve Olisipo, rome Felicitas Julia. Ĉefurbo ĉe rivero Tejo. Vasta grava haveno kaj centro komerca, industria kaj intelekta. Patriarkejo. Universitato, bibliotekoj, sciencakademio, astronomiaj observatorioj. Vidindaĵoj: belaj urbaj panoramoj; katedralo, preĝejoj de Jeronimos, Conceição, S. Roque, S. Vicente, Estrela, k. a.; zoologia ĝardeno kaj akvario; muzeoj de belartoj, artilerio, zoologio, mineralogio, reĝaj veturiloj, arkeologio; Parlamentejo, Societo de Geografio; monumentoj: ĝardenoj, teatroj kaj cirko. Bonega servo de elektraĵ tramoj.
D: Jorge de Saldanha Carreira, bankoficisto, Avenida Duque de Loulé 50, III.
HS: „Hotel International”, Rua Betesga 75; P: 38-55 Esk. Anoj de UEA 10% da rabato.
HS: „Grande Hotel de Portugal”, R. Amparo 12; L: 10-29, M: 14, P: 30-48 Esk. Anoj de UEA 10% da rabato.

Portugalujo - Rodezio Suda

* * * *Parceria Ant6nio Maria Pereira*, Rua Augusta 44a 54. — Esperantaj kaj portugalaj libroj. Anoj de UEA dek proc. rabato.

* * * *Companhia Central Vinicola de Portugal*, Rua Ivens 10, Lisboa. — Grava eksporto de portugalaj vinoj. Oni akceptas kaj plenumas mendojn el 6iuj landoj. Oni parolas kaj korespondas en Esperanto.

* * * *A. Lopez & Maia Ltd.*, Largo do Calhariz 34, Lisboa. — Tajloroj; ŝtof- kaj kudraj-vendistoj. Oni deziras 6iulandajn korespondantojn. Korespondas kaj parolas en Esperanto.

Meda (Guarda).

D: Aurelio Lacerda Moutinho, terposedanto.

Porto. 200 000. — Cefloko de provinco Minho.

D: Jos6 A. Proen9a, komercisto, R. d. Rosario 215.

Set6bal (Extremadura). 57 000. — Antikva urbo.

D: Amador de Fifeuiredo Simoes, urbdoma skribisto, Bairro Lopes. [Escolas 25.

VD: Manuel Francisco Palma, librotenisto, Parque dos

EG: „Disvastiga Stelaro“, Adr.: Pra9a do Bocage. Ejo:

Associa9ao de Classe dos Emp. Comm. e Industria (L, Mk, V 21).

Tramagal (Abrantes). 2500. — Apud rivero Tejo.

D: Rufo Antonio Lopes, desegnajisto.

Vendas Novas. 6000. — Korkoligna industrio.

D: Jos6 dos Reis Pires, alferes E. P. A.

RODEZIO SUDA

Afriko — Southern Rhodesia

Salisbury. 6500. — Agrikulturo: maizo, tabako, kotono, faboj, ternuksoj ktp. Brutaro-produktaĵoj: lakto, butero, fromaĝo. Industrio: kotonejo, maizo-muelejo. Sapo, kandeloj. Lardo- kaj oleofabriko.

D: F-ino Mary Edith Berry, stenografistino, Departement of Agriculture.

Rumanujo

Rom6nia

RUMANUJO

Nacia Societo:

Rumana Esperantista Societo (R. E. S.). — *Fondo*: 1907. Reorganizita en 1923 per la IIIa Rumana Esperanto-Kongreso en Timisoara. — *Organizo*: Federacio de grupoj, direktata de urbaj, regionaj kaj tutlanda delegitaroj. — *Kol.*: Minimume 120 L. jare po pers. — *Gazeto*: Informa bul-teno eldonata laŭbezono. — *Servoj*: Kunvenoj por ekzerco kaj propagando, kongreso, regionaj konferencoj, ekskursoj, ekspozicioj, publikaj kursoj kaj ekzamenoj, eldono de propagandiloj. — *Estraro*: Hon. Prez.: Generalo C. Gavanescu, korpusa komandanto, kaj Gr. Trancu-Iaŝi, eksministro; Prez.: H. Fischer-Galati, L. K.; Vicprez.: D. Ciolac, kolonelo, G. Lungulescu kaj Emil Nicolau; Konsilantoj: Advokato I. Balas, Tiberio Morariu; Sekr.: H. Haraba9iu, V. Timis. — *Adreso*: Str. 11 Junie 80, Bucuresti.

Instituto:

Esperanto-Instituto Rumana. — *Fondo*: 1926. — *Celo*: Arango de Esperanto-kursoj, eldono de diplomoj. Eldonejo kaj vendejo de libroj esperantistaj. Abonejo de gazetoj. Statistikoj; eldono de gvidfolioj. — *Adm.*: F-ino Eugenia Morariu, Str. Bravilor 15, Cluj.

Universala Esperanto-Asocio

Teritorio de UEA: Rumanujo

Cefdelegito: Tiberio Morariu; Sekr.: F-ino Eugenia Morariu, Str. Bravilor 15.

Lokoj kun Delegitoj

Alba-Iulia (Transilvanio). 13000. —

D: (Vakas).

[rasan 3.

VD: F-ino Irma Gyulay, oficistino, Strada A. Mu-

EG: „Andreo Ce“, Adr.: Ce la VD.

Esperanto-Rondo „Amikeco“ (ERA), Adr.: F-ino Jenny Kohn, Str. Libertatii 17.

- Arad** (Banato). 100 000. — Ĉe rivero Mures.
D: F-ino Erzsebet Buczi, oficistino, Baia Simay, Str. Moise Nicoara. [Ferdinand 46.
VD: Jozefo Wohlberg, privatoficisto, 46 Bulv. Reg.
D (Komerco): J. Martin, direktoro, Str. Lae Barna 3.
EG: Adr.: Ĉe la Del. [200 Leoj. T. 10%
HS: „Crucea Alba“, Str. General Berthelot; L: 150-
HS: „Central“, Bulevar Reg. Maria; L: 200 L. T. 10%.
- Bălan** (Transilvanio). 2000. — Mineralakvofontoj.
D: Leo Weiss, oficisto, Fabrica Gyula Milch.
- Band - Mărășești** (Transilvanio). 3600.
D: Ioan Codarcea, instruisto, jud. Mures.
- Beclean** (Transilvanio). 3500. — Ĉe rivero Somes.
D: Dro József Rácz, advokato.
- Betlen (vidu Becean).
- Bistrita** (Transilvanio). 15000. — Ĉirkaŭita de l' Karpatoj.
VD: Arthur Ivascu, studento, Piata Principele Carol 6.
- Borosjenő (vidu Ineu).
- Braila**. 80 000. — Ĉe Danubo. Grenkomercado.
D: Charles Fortune, ing. agron., Str. Catolica 4.
- București**. 950000. — Ĉefurbo rumana, situita 89 m super la marnivelo, ambaŭflanke de rivero Dimbovica. Sidejo de la Reĝa Kortego, de la Rumania Patriarĥejo kaj de ĉiuj superaj institucioj ŝtataj. Elirpunkto de la ĉefaj rumanaj fervojlinioj kaj alvenpunkto de kelkaj gravaj eŭropaj fervojlinioj. Radiostacio. Universitato. Superaj lernejoj. [București 2.
D: H. Harabăgiu, oficisto, Bulev. Alex. Ion Cuza 33.
VD: Ernst Grund, prokuristo, Strada Coloniei 5, București 5.
D (Komerco): Max Wurmbrand, prokuristo, ĉe firmo Max Zismann, Str. Oituz 10, București 1.
EG: Esperantista Grupo „București“, *Adr.:* Ĉe la Del. Ejo: Sala de lectura (Legosalono) ĉe Biblioteko Libertatea, str. C. A. Rosetti 7, kontraŭ la Reĝa Palaco (Mk 21). [București 5.
EO: Rumana Esperanto-Societo, *Adr.:* Str. 11 Junie 80,

HS: Hotel Marna, str. Buzesti 3; L: 170, M: 20 Leoj.

* * *Prima Fabrica Cehoslovaca* por konfektio de haine barbatesti. Akcia Societo. — *Adr.:* Strada Berzei 94-96. Tel. 62/83. Telegramadreso: Cehofabrica. — Plej granda enlanda fabriko de pretaj vestaĵoj. 200 laboristoj. Importas ŝtofojn kaj tajlorajn aldonaĵojn. Esperanto korespondata.

* * * „*Bibliofila*“, Strada Wilson 1 (En Fundatie Carol). Artaj libroj novaj kaj antikvaj kaj grafikaj artaĵoj. Proponu vendotajn librojn kaj mendu bezonatajn. Speciala fako por Esperanto-libroj. Esperanto korespondata kaj parolata.

* * *A. C. Dracsaneanu*, Agentejo kaj komercejo, reprezentas kaj deziras reprezenti unuarangajn eksterlandajn fabrikojn por teksaĵoj, kaŭĉukoj, papervaroj, ludiloj ktp. — Esperanto korespondata. — *Adr.:* București 1, Str. Cobalcescu 20.

* * *H. Fischer-Galati*, Calea Victoriei 86, II, București 1; Telegram-adreso: Hefiga. — Eksporto de petrolo kaj derivaĵoj. Agentejo por importo de maŝinoj por industrio kaj trafiko.

* * *Josef Schechter*, Internacia Agentejo Select, Calea Victoriei 48, Str. Regala 9, București 1. Interŝanĝas poŝtmarkojn nur kun seriozuloj kaj peradas ĉiuspecajn aferojn.

Cavarna (Dobrogea). 10 000. — Ĉe Nigra Maro.
VD: Ivan Ivanof, studento, str. Principele Carol 18.

Cernauti (Bukovino). 132000. — Ĉe rivero Pruth.
D: Arnold Hasenöhr, rez. majoro, Kochanowski 5.
VD: Dro Leon Koppelman, advokato, str. Stefan cel Mare 19.
EG: Ejo: Kafejo Deutsches Haus, str. J. Flondor. „Esperanto-Societo“, *Adr.* kaj Ejo: Dro Ed. Rinzler, Str. Reg. Maria 4 (S 19).
HS: Hotel Bristol, Piata Dacia; L: 156, M: 20 Leoj.

Cimislia (Jud. Tighina). 2000.
D: S-ino Ester Procupetz, instruistino.
VD: F-ino Dora Friedman.

Cluj (Transilvanio). 100000. — Ĉe rivero Someș.
D: F-ino Eugenia Morariu, oficist., Str. Bravilor 15.
VD: Ernesto Hirsch, direktoro de la Societo Anonima, „Helcompa“, Str. Regina Maria 42.

- EG:** „Klubo Esperantista“, *Adr.:* Ĉe la Del. *Ejo:* Piarista Liceo, Str. Cogalniceanu 2 (D 15).
 „Pax Christi“, loka grupo de Mondjunularo Katolika, *Adr.:* Simon Csora, landa sekretario de MOKA, Asigurare „Generala“, Cluj. *Ejo:* Piarista Liceo, 1a etaĝo, Cogalniceanu 2 (Vla klaso, D 15).
HS: „New York“, Piata Unirii; L: 160-210 L.T. 10%.
- ** Esperanto-Instituto Rumana**, Cluj, Str. Bravilor 15.
 Fondita 1926. Arango de Esperanto-kursoj en Rumanujo. Abonejo de gazetoj. Eldono de gvidfolioj. Peras interligon kun turistaj societoj.
- Constanta** (Dobrogea). 80 000. — Ĉe Nigra Maro.
D: Dimitre Minceff, publicisto, Str. Sabinelor 12.
VD: Stefan Anghelof, str. T. Jonescu 23.
EG: „Espero“, *Adr. Ejo:* D. Gandev, str. G-I. J. Lahovary 13 (Mk 20.30).
- Copalnic-Mănăstur** (Transilvanio). 1171.
D: Maurice Simon, sekretario, Jud. Satu-Mare.
- Csikszereda (vidu Mercurea Ciuc).
 Czernowitz (vidu Cernauti).
- Dedabistra** (Transilvanio). 2500. — Apud rivero Mureș.
D: Adalberto Berohn, privatoficisto, Jud. Mureș.
- Dej** (Transilvanio). 18000. — Ĉe kunfluo de la tri Samos.
D: Adalberto Frank, komercisto.
- Focșani**. 30000. — Ĉe rivero Milcov. Distrikta ĉefloko.
D: Dro Jon Danila, direktoro de la Supera Komercio Lernejo.
EG: „Espero“. *Adr. kaj Ejo:* 47 Strada Brailei (S 20).
- Gheorgheni** (Transilvanio). 10 000.
D: Dro Maksimiliano Campian, advokato.
VD: György Szabó, ĉefparofestro, Fogarassy utca 10.
- Gherla** (Transilvano). 8000. — Ĉe rivereto Someș.
D: Béla Babos, profesoro, Str. Morii 1.
- Giurgiu** (Vlaŝca). 30 000. — Grava haveno ĉe Danubo.
D: Stefano Koch, kontroloro, ĉe Hungara River-ŝipveturado „M. F. T. R.“, Giurgiu-Port. [Weigand 13.
VD: Karlo Leono Goldenberg, dentisto, Str. G-I

- Grosswardein (vidu Oradea Mare).
 Gyulaféhevár (vidu Alba Iulia).
- Hateg** (Transilvanio). 4000. —
D: Adolfo Hirsch, bankoficisto, „Banca Centrala“.
- Hatzfeld (vidu Jimbolia).
- Ineu** (Jud. Arad). 7000. — Vinberkulturado.
D: S-ino Boriska Piliș.
- Jimbolia** (Banato). 13000. — Ĉe landlimo Jugoslava.
D: Peter Gerger, fotografisto.
- Karlsburg (vidu Alba Iulia).
- Lipova** (Jud. Timis.). 10 000.
D: Adalb. Toader, poŝtestro.
- Ludoșul de Mures** (Transilvanio). 4600.
D: Endre Allesz.
- Mangalia** (Constanta). 3000. — Banloko ĉe Nigra Maro.
D: Vasil Petroff, kuracisto.
- Marosludas (vidu Ludosul de Mures).
- Marosvásárhely (vidu Targu-Mures).
- Mediaș** (Transilvanio). 18000. —
D: Dro Rudolf Pospisil, advokato, Sibiului 8.
HS: „Transilvanica“; L: 120, M: 20 Leoj. T. 10 %.
- Moreni**. 7000. — Industria urbo, petrolo.
D: Antonio Paolazzo, metiisto, „Astra Rumana“.
- Nagyvárad (vidu Oradea).
- Oradea** (Transilvanio). 64 200. — Frukt-vinberkulturado.
D: Izsó Kelemen, profesoro, Strada Wilson 13.
- Orașul-Nou** (Transilvanio). 2500.
D: Iosif Corbu Silaghi, notario.
- Petroșeni** (Jud. Hunedoara). 20 000. — Pentrinda regiono.
D: Francisko Lerch, str. N. Torga 8.
VD: Jozefo Kanduth, Jiul Cultural.
- Ploești** (Prahova). 70 000. — Petrolrafinejoj.
D: Emil Nicolau, oficisto, Strada Barcanesti 1.

Rumanujo

- Radauti** (Bucovina). 28 000.
D: Siegfried Hö r e r, ĉeflibrotenisto, str. J. Maniu 174.
- Reghin** (Transilvanio). 9200. [Vladimirescu 7
VD: F-ino Emma Birthler, oficistino, Str. Tudor
- Salonta** (Bihor). 20 000. [anu 39.
D: Johano L. D o b a y, ĉeflibrotenisto, Str. I. Meti-
VD: Ladislao B o r d á s, notario, Str. T. Jonescu 17.
EG: Adr.: Ĉe la Del. *Ejo:* Rom-katol. lern. (2-foj. mon.).
- Sămpetru** (jud. Braşov).
D: Gheorghe Barsan P i p u, terkulturisto, N-ro 465.
- Satu-Mare** (Transilvanio). 70 000.
D: Arpad V a j n a y, urbestreja ĉefoficisto, Primaria.
VD: Andreo R u b i n, str. Mihai Pavel 7.
- Schässburg-Segesvar (vidu Sighisoara).
- Sighisoara** (Transilvanio). 15000. — Saksa koloniado.
D: Francisko O l a h, majoro en rezervo, Hüllgasse 86.
VD: F-ino Jozi E d e r, oficistino, Str. M. Albert.
EG: „Nia kastelo“, *Adr. Ejo:* Ĉe la Del. (V 20-22).
HS: „Steaua de Aur“ = Ora Stelo; moderna hotelo.
- Silistra** (Dobrogea). 22 000.
D: F-ino Maria P o p o v a, str. Carpati 28.
- Solca** (Bucovina). 5000. — Vizitata aerkuraĉloko.
D: Ernesto H a s e n ö h r l, oficisto.
- Suceava** (Bukovina). 15000. — Ĉe rivero samnoma
D: Johano B e r h a n g, lernejdirektoro, Stefan Voda 6.
- Târgu-Mures** (Transilvanio). 36000. — Ĉe rivero Mures.
VD: S-ino Dro Maria B e r d e, verkistino, 6 Str. Ste-
fan cel Mare.
EG: Adr. kaj Ejo: Fötér 66 (ĉiutage).
- Tecuci**. 20 000. — Ĉe rivero Barlad. Vinkulturado.
D: Miahil U l é i c a, oficisto, 23 str. 10 Mai.
- Teius** (Transilvanio). 4500. — Apud rivero Mures.
D: Paulo S t a m a t i a n, poŝtoficisto, Teius II.
HS: „Dacia“, apud stacidomo; P: 130 Leoj. T. 10%.


Rumanujo - Saarteritorio

- Timișoara** (Banat). 90 000. — Ĉefurbo de Banato.
D: Alfred B a m b a c h, juĝa oficisto, Str. Romulus 12.
VD: J. C s a p ö, oficisto, Str. Cipr. Porumbescu 18.
(Travoĝantoj volu sin turni al la VD per Tel. 51.)
EG: Adr.: Ĉe la VD.

(Rumana)

Preŝul 5 lei

CHEIA LIMBEI ESPERANTO



Mendebla ĉe Esperanto-Centro Rumana
Bravilor 15, Cluj

Saar

SAARTERITORIO

Saargebiet

Nacia Societo:

Esperanto-Ligo Saarteritoria. — *Fondo:* Sept. 1923.
— *Estraro:* Prez.: Karl Kr ä m e r. — *Adr.:* Ĉe la Prez.:
Hohenzollernstr. 156, III, Saarbrücken.

Universala Esperanto-Asocio

Teritorio de UEA: Saar

Cefdelegito: Ernst August O m l o r, regiona prokuroro,
Beethovenstr. 24, Sankt Ingbert.

Lokoj kun Delegitoj

Böckweiler - Blies. — Inter Zweibrücken kaj Blieskastel.
D: Nikolaus D o n i e n, ĝendarmo, Breitfurter Str. 8.

Bous. 5500. — Fabrikado de Mannesmann-ŝtaltuboj.
D: Eugen B e r s c h t l, ĉefingeniero, Friedrichstr. 1.

Engelfangen. *D:* Ludwig L u c k e n b i l l, librotenisto.

Saarteritorio - Sao Tomé

Erbach. 5000.

D: Josef Kulhanek, pentristo, Luitpoldstr. 104-1/4.

Krughütte.

D: Jakob Schenkel, desegnisto, Am Ziegelhof 12.

Neunkirchen. 40000. — Industrio de karbo kaj fero.

D: Karl Koch, komercisto, Andreasstr. 2.

VD: Fritz Sutter, tornisto, Prinz-Heinrich-Str. 4.

EG: *Adr.:* Ce la Del. *Ejo:* Gastejo Schleppe, Marktstr. 1 (Mk 20).

Saarbrücken. 127000. — Industria kaj komerca centro de l' Saarteritorio. [str. 156, III.]

D: Karl Krämer, sup. instruisto, Hohenzollern-

EG: „Klubo“, *Adr.:* Dro L. Reeps, Reg.-Obermedizinalrat, Kanalstr. 7. *Ejo:* Schlosskaffee, Viktoriastr. (L 20.30).

„Loka grupo“, *Ejo:* Kafejo Kiefer, Reichstr. (unua kaj tria M 20).



Saarlouis. 17000.

D: Johannes May, poŝteĵ-estro (Ober-Postamtman).

Sankt Ingbert. 21000. — Industrio: fero, karbo, vitro.

D kaj CD: Ernst August Omlor, regiona prokuroro, Beethovenstr. 24.

EG: E. L. S., loka grupo. *Adr.:* Ce la Del.

HS: „Hotel zur Glocke“, Kaiserstr. 25; L: 20, M: 4, P: 36 Frankoj francaj. T. 10 %.

Sulzbach. 23000.

D: Dro Josef Fassbinder, profesoro.

Wiebelskirchen. 10000. — Karbminejoj. Belaj arbaroj.

D: Walter Schild, oficisto, Ziehwaldstr. 18.

EG: Esperanto-Ligo Saarteritoria, *Adr.* kaj *Ejo:* Ce la Del.

SAO TOME E PRINCIPE

(Okcidenta Afriko Portugala)

São Tomé. 3000.

D: Manoel Martins Xavier de Pina, poŝtoficisto.

Sirio - Straits Settlemento

Turke: Suristan

SIRIO

État de Syrie

Arabe: Al-Sam

Suria

(Franca Mandato)

Beyrouth (Granda Libano). 150000. — Antikve Berytes, fenicia fondaĵo. Plej grava komerca loko en Sirio. Cefloko de Libana Respubliko. Instrua centro.

D: Zeine Nour-Ud-Dine Zeine, studento, American-University of Beirut.

EG: „Esperanto-Grupo de A.U.B.“, *Adr.:* American-University of Beirut (Amerika Universitato de B.).

Ejo: En la Universitato.

Damas. 350000.

D: Wafik El Yafi, skribisto, Services Fonciers de Syrie.

Rayack. — 60 km de Beyrouth kaj Damas.

D: S-ino Marie David-Rousset, Poste Météorologique s.p. 606.

Lernolibro de Esperanto por Araboj

Prezo: 1 ŝil. 6 pencej — — — — Mendu ĉe:

Amin El Mofiti, D de UEA, Ibrahimieh Ramleh

Alexandria, Egiptujo

Straits Settlemento

(Straits Settlements)

Singapore. 600000. — Cefurbo. Sub brita regado de 1819. Grava loko komerca. Cefproduktaĵoj: kaŭĉuko, stano.

D: Gilliam Ching Chou, civ. inĝeniero, c/o Sims Darby & Cie Ltd., Truseon Department.

VD: Su Siong Jung, studento, 31 Tronoh Road.

SOVETUNIO

(Sojus Sovetskij Socialističeskij Respublik)

Nacia Societo:

Sovetrespublikara Esperantista Unio. — *Fondo:* 1921. — *Organizo:* Centra Komitato, Tutunia, respublikaj, landaj, urbaj komitatoj, lokaj filioj, grupoj kaj ĉeloj ĉe fabrikoj, entreprenoj, institucioj, kluboj. — *Kot.:* 1 Rb. (kun „Bulteno de SEU“). — *Budĝeto 1931:* 52455 Rb. — *Servoj:* Reprezento de la Esp.-movado en U. S. S. R., eldono de propagandiloj kaj lernolibroj, kulturinforma servo al eksterlandaj esperantistoj, eldono de prisovetaj verkoj. — *Stato:* 5116 anoj (1. X. 1930). — *Estraro:* Gen. Sekr.: E. Drenzen; Sekr.: A. Jodko, G. Demidjuk, N. Nekrasov, V. Varankin, N. Modenov, N. Incertov. — *Adr.:* Spiridonovka 15, Moskva; poŝta: Moskva, poŝtkesto 630.

Gazetoj:

Mejdunarodnij Jazik — Internacia Lingvo. Dumonata gazeto dediĉita al problemoj de lingvo internacia, ĝia teorio, praktika aplikado kaj disvastigo. — *F.:* 1923, 64 p., 26 × 18 cm. — *Eldon-nombro:* 2000. — *Red.:* B. Breslau. — *Adr.:* Poŝtkesto 630, Moskva, aŭ Spiridonovka 15, Moskva. — *Ab.:* 2,50 Rb.

Bulteno de C.R. SEU. Monata gazeto por praktikaj problemoj de sovetia Esperanto-movado kaj por oficialaj komunikoj al SEU-membraro. — *F.:* 1926, 16 p., 26 × 18 cm. — *Eldon-nombro:* 7000. — *Red.:* G. Demidjuk. — *Adreso:* Spiridonovka 15, Moskva; poŝta: poŝtkesto 630, Moskva. — *Ab.:* Senpage por SEU-membroj; aliaj 1,20 Rb.

La Vojo de Klerige. Esperanto-lingva resum-folio de l' monata pedagogia revuo ukrainlingva „Slah Osvity“. — *F.:* 1925, 6 p., 17 × 27 cm. — *Red. kaj Adm.:* K. Liebknecht ulica 31, Harkov. — Senpage sendata al interesatoj.

Universala Esperanto-Asocio

(Pro nekonformeco de principoj de UEA al la politika reĝimo en la Unio de Sovetaj Socialistaj Respublikoj nia Asocio ne havas Delegitojn en USSR. Pri la perforta ĉesigo de niaj aranĝoj vidu rilatajn dokumentojn en „Esperanto“ 1923, oficiala informilo, paĝoj 141-142.)

SUDAFRIKO

South Africa — Union of South Africa

Beaufort West (Cape Prov.). 6140. — Fondita 1820.*D:* Matthew Deas, konstruisto.**Cape Town.** 200 000. — Cefstacio por la trafiko de Eŭropo kaj Orienta Indio. Parlamenta ĉefurbo de l' Unio de Sudafriko. Universitato.*D:* Wm. Chas. Chatters, P. O. Box 879.**East London** (Eastern Province). 40 774. [City Hall.*D:* Norman Barton Montagu Scanlen, kontisto, c/o**Johannesburg** (Transvaal). 293400. — Fondita 1887.

Plej granda ormineja distrikto. Universitato.

D: E. C. Mawbey, bankoficisto, Standard Bank of South Africa, P. O. Box 1031.

Sverige

SVEDLANDO

Konungarike Sverige

Nacia Societo:

Sveda Esperanto-Federacio. — *Fondo:* 1906. — *Organizo:* Konsistas el grupoj kaj individuoj. — *Kot.:* Individua membro 5 Kr. jare; grupo unu abonon kaj po 1 Kr. por ĉiu grupano. — *Gazeto:* „Sveda Esperanto-Gazeto“. — *Servoj:* La Federacio fondis apartan „Eldona Societo Esperanto“, kiu eldonas la gazeton, eldonas kaj vendas lernolibrojn kaj vortarojn, vendas ĉian Esperanto-literaturon; Sveda Esperanto-Instituto, aranĝas elementar kaj superan ekzamenojn ktp. — *Stato:* 23 grupoj, 800 membroj. — *Estraro:* Hon. Prez.: Paul Nylén; Prez.: —; Vicprez.: Sam. Jansson; Sekr.: Gösta Ahlstrand; Kas.: Adolf Larson; Bibl.: Bernhard Eriksson. — *Adreso:* Stockholm I.

Faka Societo:

Sveda Laborista Esperanto-Asocio.

Gazetoj:

Svenska Esperanto-Tidningen (Sveda Esperanto-Gazeto). Oficiala organo de la Sveda Esperanto-Federacio. Monata. — *F.:* 1913, 8-16 p., 16 × 24 cm. — *Eldon-nombro:* 2000. — *Adr.:* Eldona Societo Esperanto, Stockholm I. — *Ab.:* Por Svedlando: 2 Kr., eksterlande: 2,50 Kr.

Svenska Arbetar Esperantisten (Sveda Laborista Esperantisto). — *F.*: 1922, 8 p., 25 × 16,5 cm. — *Eldonombro*: 4000. — *Red.*: Einar Adamson. — *Adr.*: Linnégatan 49, Göteborg. — *Ab.*: 15 Öre po numero (0,20 Franko svisa).

Universala Esperanto-Asocio

Teritorio de UEA: Svedlando

Cefdelegito: Ad. Larson, Drömstigen, 43, Äppelviken.
Tel.: Kontoro: Stockholm „Hansa“ (9a-16a h.); hejmo: Äppelviken 942. Poŝteka konto: 2952.

Lokoj kun Delegitoj

Äppelviken (Stockholm).

D kaj CD: Ad. Larson, Drömstigen 43.

Alvesta (Småland). 1000. — Granda fervojstacio.

D: Fredrik Johansson, terkulturisto, Hjälmaryd, Blådinge.

Bengtstors (Elvsborgs Län).

D: Carl Winberg, kasisto. [la semajno.

HS: „Hotel Märten“; L: 3, M: 2, P: somere 35 Kr.

Billesholm Gruva (Skane). 3300. — Karbminejo.

D: Jozefo Nilsson, komercisto.

Bjuv (Skane). 3500. — Karbminejoj. Brikfabrikejoj.

D: Gustaf Telander, maŝinisto, Freden 117.

EG: „La Espero“, *Adr.*: Ĉe la Del. *Ejo*: A. B. F.

Hemmet Gruvgatan (1a kaj 3a M).

Bomhus. 6000. — Antaŭurbo de Gävle.

D: Gösta Aström, instruisto.

VD: F-ino Beda Nilsson, instruistino.

Borås. 35000. — Ĉe rivero Viskan. Teksa industrio.

D: Henrik Molin, laboristo, Halleberg 5.

VD: Ernst Helander, laboristo, Druvefors 15.

EG: „La Tagiĝo“, *Adr.*: Ĉe la Del. *Ejo*: Kafejo City.

HS: Stadshotellet; L: 4, M: 2,50 Kr. T. 10 %.

Borlänge (Dalekarlio). 2100.

D: Martin Jansson, leterportisto, Frostbrunn (Stora

Tuna). Renkontebla en la poŝtoŝeĵejo Borlänge.

VD: F-ino Edith Bodén, instruistino, Borlänge.

HS: Järnvägshotellet, apud stacidomo.

Enköping (Upsala). 5900. — Apud lago Mälaren.

D: Eric Holmström, lokomotivestro, Kungsgatan 12.

Eskilstuna (Södermanland). 30000. — Fer- kaj ŝtalindustrio.

D: Arvid Agren, telefonriparisto, telegrafstacionen.

VD: Eskil Johansson, telegrafa komizo, telegrafstacionen. — *EG*: „La Stelo“, *Adr.*: Ĉe la Del.

Fagersta. 4000. — Impona ferproduktado.

D: Sven Ceder, leterportisto.

VD: Gösta Johansson, ferlaboristo, Box 347.

EG: *Adr.* kaj *Ejo*: Studiehemmet (J 20).

Falun (Dalekarlio). 14000. — Kuprominado.

D: Gust. Ad. Henriksson, komercisto, Gavaregt. 10.

VD: Ernst M. Ström, kontoristo, Stenslund, Box 236.

EG: Klubo Esperantista, *Adr.*: Box 236. *Ejo*: Enocssons Café (unua kaj tria J).

Frillesas (Halland). 1500. — Terkulturado. Fiŝkaptado.

D: Oskar Theodor Henriksson, fervojisto.

Gävle (Gävleborg). 40000. — Haveno. Sipkonstruado.

D: A. K. Örn, reprezentanto, Hospitalsgatan 11.

VD: Erland Holmqvist, desegnisto, Katrinelund 60.

EG: Esperantoföreningen, *Adr.*: *Ejo*: Södra Kungsgatan 8 (2a L 20).

HS: Centralhotellet kaj Grand Hotel (proksime de l' stacidomo). Modernaj hoteloj kun lifto, elektra lumo, centra hejtado. Bona kuirejo, ĉambroj deponitaj 4 Kr. Posedanta direktoro O. Zedren. Rabato al UEA-anoj.

Gämla (Smaland). 1260. —

D: F-ino Sofia Lindberg, kontoristino.

Göteborg. 230 000. — Ĉe enfluo de Götaelf. Liberhaveno.

D: Nils Gunnar Nilsson, korbisto, Kjellestads-gatan 2 g III. [viksgatan 15 (Mk 19).

EG: Esperantoklubb, *Adr.* *Ejo*: Studiehemmet, Puster-

HS: „Kung Karl“, Nils Erikssonsgatan; L: 3,50-4, M: 1,50-2 Kr. T. 10 %.

Gränna (Smaland). 1100. —

D: Johan R. Littner, pensiulo, Brahegatan 14-15.

- Grangesberg** (Dalarne). 6000. — Minejo. Dinamitfabrikado.
D: Sigríd Wallenström, instruistino.
HS: Grangesbergs Hotell; L: 3-4,50, P: 5-7 Kr. T. 10%.
- Hällekis** (Västergötland). 800. — Ap. la granda lago Värnern.
D: Allan Andersson, komizo, Hällekis Kooperativa Handelsförening.
- Hällesjöby** (Jämtland). 1525. — Arbara distrikto.
D: Knut Eriksson, laboristo.
Jam frue stariĝis la demando, kiel fakaj societoj povus grupiĝi en UEA, la ĝenerala asocio por praktika apliko de la lingvo. Ambaŭ povas reciproke sin kompletigi gardante la necesan sendependecon en agado. Ofte faka societo bezonas helpojn por sukcesigi iun klopodon. El tiu reciproko naskiĝis la interkonsentoj pri interŝanĝo de servoj, kontrakte formulitaj inter UEA kaj tiuj fakaj organizaĵoj. Konstitucia bazo por tio estas la Art. 14 de la Statuto de UEA, kiu tekstas jene:

La Asocio povas fari ĉiajn kontraktojn laŭ la bezonoj de sia agado.

Kun societoj, korporacioj, firmoj kun celoj similaj al tiuj de UEA, aŭ kies kunlaboro aŭ simpatio estas dezirindaj, la Komisiono rajtas fari interkonsentojn pri komuna agado, pri interŝanĝo de servoj ktp. Ĝi povas helpi al tiaj societoj, meti je ilia dispono spacon en la oficiala gazeto, kaj doni al aliaj reprezentantoj konsilan voĉon interne de la Asocio.

Societoj kaj firmoj, entreprenoj kaj aliaj, ne estas membroj de UEA. Pri ilia agado la Asocio ne respondas, sed post ricevo de pravigitaj plendoj ĝi ĉesigos la rilatojn kun ili.

Por ke ambaŭflanke ne ekestu miskompreno en la sekvoj de la komuna agado, kontrakto fiksas la eblecojn de komuna interhelpo. Tia kontrakto tekstas tiel:

Universala Esperanto-Asocio kaj (Nomo de la Faka Societo) interkonsentas pri reciproka kunhelpo kaj interŝanĝo de servoj, konforme al Art. 14 de la Statuto de UEA.

La kontrakto inter ambaŭ organizaĵoj akcelas la praktikan uzadon de la lingvo kaj la koncentrigon de la fortoj. Por atingi tion, UEA kaj (Nomo de la Faka Societo) faros la jenajn servojn reciproke:

1. Diskonigo de l' alia kontraktinto en la propraj presadoj per anoncoj, reklamoj aŭ regulaj informoj. Ĝenerala rekomendo por aliĝi al la kunkontraktinta organizaĵo. Laŭeble aldoni de reklamiloj aŭ varbiloj al la oficialaj gazetoj. Teknikaj detaloj pri presado kaj aldoni aparte interkonsentota laŭokaze.
2. Interŝanĝo de adreso interesaj al ambaŭ sen speciala kondiĉo, escepte de repago por pretigo de grandaj listoj superantaj centon da nomoj. Livero de adresoj de fakuloj aliĝantaj al UEA, sed ankoraŭ ne-anoj de (Nomo de la Faka Societo).
3. Ĝenerala subteno okaze de komuna klopodado, ekzemple dum faka kongreso laŭ plano antaŭe fiksota. Interŝanĝo aŭ prunto de taŭga materialo laŭ ekzisto kaj disponebleco. Komunaj kunvenoj dum Universala Kongreso de Esperanto, laŭ la cirkonstancoj kaj dezirindeco.

(Nomo de la Faka Societo) nomas kiel reprezentanton ĉe UEA S-ron . . . , kun kiu UEA rilatas pri la plenumo de la kontrakto.

*

La nuna kontrakto valoras por tri jaroj, de la . . . ĝis . . . Ĝi povas esti malmendata tri monatojn antaŭ la findato, do je la . . . Se neniu el la du kontraktintoj formale malmendus, la kontrakto valoros denove por periodo de tri jaroj.

Ambaŭ organizaĵoj sin detenas de ĉio, kio povus malhelpi la memstarecon de l' alia, rilate al la Esperanto-Movado kaj la speciala movado aŭ celo sekvota. Ambaŭ ne respondecas pri financaj agoj de la alia kontraktinto, por UEA jam esprimita en Art. 14 de la Statuto.

La nuna kontrakto estas farita en du ekzempleroj kaj subskribitaj de la rajtigitaj personoj, nome:

Por UEA: En la nomo de ĝia komisiono: La prezidanto kaj la direktoro.

Por (Nomo de la alia kontraktanto)

Genève kaj . . . (Dato)

Subskriboj kaj stampoj

Ĝis nun kontraktis kun UEA la jenaj societoj:

Internacia Ligo de Poŝt-, Telegraf- kaj Telefon-Oficistoj.
Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (TAGE).
Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio (TEKA).

Internacia Polica Ligo.

Internacia Scienca Asocio Esperantista.

Franca Radio-Klubo Esperantista.

Universala Asocio de Blindaj Esperantistoj.

Skolta Esperantista Ligo.

Komercista Esperanto-Unio.

La ĉefa helpo donita de UEA al tiuj societoj estis la diskonigo pere de la gazeto kaj Jarlibro, okaza esploro de la sliparo (kartoteko) de la Centra Oficejo pri utilaj adresoj, dissendo de varbiloj. Kvankam modesta estas tiu helpo, el ĝi ekkreskos regula rilatado kaj interligo. Apartenas al la tempo intensigi tiun komunan laboron por la bono de nia klopodado. Fakaj societoj dezirantaj interkonsenti kun UEA sin turnu al la Centra Oficejo en Genevo por informoj.

La „Interniario“ (Internacia Frataro)

Direktoro: Livingstone Jenkins

Fondo, celo kaj ktp.

La „Interniario“ fondiĝis en la jaro 1923 (unue sub la nomo „Esperanta Kolportista Asocio“), kaj rapide gajnis la subtenon de multaj, kiuj deziris konservi la Internan Ideon de Esperanto.

Spite de la fakto, ke la „Interniario“ konsistas plejparte el Kristanoj, kaj ĉiam penadas disvastigi la konon de la instruoj de Jesuo, ĝia larĝa elrigardo jam allogis multajn, kiuj, kvankam apartenantaj al aliaj religioj, povas harmonie labori kun ni por la komunaj celoj de paco kaj frateco.

Frateco estas por ni ne nura vorto, sed (kiel multaj ja povas atesti) vere vivanta forteco inter la anaro de la „Interniario“, kaj la mirinda progreso de nia asocio estas pere de sinoferada laboro de la anoj mem.

Esperanto estas la oficiala lingvo de la „Interniario“, sed Biblio-partoj kaj alia literaturo estas disdonata ankaŭ en aliaj lingvoj. Ne-Esperantistoj povas aliĝi kaj labori per sia nacia lingvo.

Nia gazeto „Inter Ni“ same kiel la asocio havas kristanan karakteron, sed samtempe malfermas siajn paĝojn por libera interdiskutado.

Membreco, kotizoj kaj ktp.

1. *Aprobantaj Membroj* estas tiuj, kiuj deziras montri simpatian por niaj celoj kaj laborado, sed ne povas oferi aktivan subtenon.

2. *Aktivaj Membroj* estas tiuj, kiuj deziras partopreni nian laboradon kaj ricevi regule niajn sendaĵojn. Ili pagas jarkotizon de almenaŭ 2 Ŝilingoj (2 RM, 2,50 svis. Fr. aŭ 0,50 us. Dol.).

3. *Subtenantaj Membroj* estas tiuj, kiuj deziras subteni pligrande nian laboron kaj donacas jare almenaŭ 5 Ŝilingojn.

4. *Kolektivaj Membroj* estas grupoj, firmoj, asocioj aŭ federacioj, kiuj deziras fidiĝi al la „Interniario“ kaj pagas jarkotizon de almenaŭ 10 svis. Fr. (grupoj povas

filiĝi senkotize, sed sen plenaj rajtoj de membreco, aliaj grupoj povas pagi duone).

Nia gazeto „Inter Ni“ kaj aliaj oficialaj presajoj estas sendataj al ĉiuj pagantaj membroj de tempo al tempo.

Ĉiu membro (kiu sendas afrankon) rajtas ricevi pak-aĵon de senpaga literaturo.

Centra Oficejo: 64, St. Thomas Rd., Finsbury Park, London N. 4, Anglujo.

Koresponda Sekretario: F. Curto Basté, Oliva 28 (Sagrera), Barcelona, Hispanujo.

Gazeta Sekretario: Theod. Wilhelm Teich, Wilhelmstr. 43, Rheydt (Rheinland), Germanujo.

La „Interna Rondo“ de la „Interniario“ sendas senpage al ĉiu, kiu sendas la afrankon, la jenajn libretojn:

La Evangelio laŭ Sankta Marko / La Evangelio laŭ Sankta Johano / Biblio-partoj / La Kvakerismo (mallonga raporto)
George Fox (biografio / *Inter Ni* / *Kristana Revuo*

Skribu (preslitere) al la „Interna Rondo“ de la „Interniario“ kaj aldonu afrankon. Adresu:

Livingstone Jenkins, 64, St. Thomas Road, Finsbury Park, London N. 4, Anglujo.

Francisko Curto Basté, Oliva 28 (Sagrera), Barcelona.
Theodor Wilh. Teich, Wilhelmstr. 43, Rheydt, German.

Interna Ideo (kaj Homaranismo)

Inter Ni, varbilo por la Interna Ideo de Esperanto per Homaranismo. Eldonata por „La Interniario“. Petata subteno minimuma jara (= por ses numeroj 12-paĝaj, 21,5 × 14 cm): 1,50 germ. RM (= 1,90 svis. Fr.) aŭ egalvaloro. — *Adreso:* „Inter Ni“, Wilhelmstr. 43, Rheydt (Rheinland).

Bulgara Esperanto - Biblioteko

proponas al vi malkaran esperantan legajon:
du belajn verkojn en Esperanto, nome la
„**Bulgara Antologio**“
„**Bulgara lando kaj popolo**“



kun bildoj kaj landkartoj. Kune 5 Fr. svis.
(anstataŭ 10 Fr. svis.) inklusive sendkostojn.
Red.: Ivan H. Krestanov, Pirdop, Bulgarijo

En preparo: „Tra Eŭropo per Esperanto“ (vojaĝnotoj kaj impresoj dum 25-jara esperantista vivado de Ivan H. Krestanov, kun bildoj). Por antaŭpagintoj nur 3 Fr. svis., poste double.

Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio

Historio de TEKA

La TEKA estis fondita en 1908 dum la IVa Universala Kongreso de Esperanto en Dresden. Iniciatoroj estis Dro Mikolajski kaj Dro Robin, la nuna prezidanto. — *Unua estraro:* Honora Prezidanto: Dro L. L. Zamenhof; Prezidanto: Prof. Dro Dor, Lyon; Vicprez.: Dro Mybs, Altona, kaj Dro Whitaker, Liverpool; Kasisto: Prof. Dro Soulier, Lyon; Sekretario: Dro Robin, Warszawa. — *Oficiala organo* „Voĉo de Kuracistoj“. — *Unuaj Honoraj Membroj:* Prof. Dro Bergonié, Bordeaux, Prof. Dro Bouchard, Paris, Prof. Dro Broca, Paris, Prof. Dro Ch. Richel, Paris, Prof. Dro Gariel, Paris, Prof. Dro R. de Saussure, Genève, kaj Prof. Dro Vierordt, Tübingen. Honora Konsulo: Dro Leono Zamenhof, Warszawa.

Resuma regularo de TEKA:

1. La TEKA havas kiel celon praktikajn interrilatojn inter ĉiulandaj Esperantistaj kuracistoj.
2. Membro de TEKA povas esti ĉiu kuracisto, kotizanta 5 Frk. svisajn, pagatajn en la komenco de ĉiu jaro. Krom tio TEKA povas elekti honorajn membrojn, kiuj pagas nenian kotizaĵon.
3. Ĉiu membro de TEKA subtenas la asociojn en ĉiuj demandoj kuracistaj.
4. La membroj de la Asocio ricevas senpage la oficialan organon de la TEKA, kiu enhavas ĉiujn necesajn sciigojn, tuŝantajn la praktikajn interrilatojn inter kuracistoj.
5. La TEKA havas sian centran organizacion, kiu direktas ĉiujn aferojn de la Asocio.
6. La Centra Komitato elektas en ĉiuj landoj po unu aŭ pli konsulojn, kiuj gvidas la tutan agadon en sia lando, elektante reprezentantojn laŭeble en ĉiuj urboj kaj kuraclokoj.
7. La Centra Komitato konsistas el prezidanto, du vicprezidantoj, sekretario kaj kasisto.
8. La elekto de la Centra Komitato okazas ĉiujare en Decembro.

La TEKA rapide disvolviĝis. Ĉiutage alvenadis aliĝoj kaj aproboj. Post kelkaj monatoj ekzistis Konsuloj en jenaj landoj: en Francujo: Dro Valienne kaj Dro

Artigues, en Anglujo: Dro Legge kaj Dro Fuller, en Rusujo: Dro Sidlovskij kaj Doc. Dro Kabanov, en Polujo: Dro Krukowski, en Aŭstrujo: Dro Skalowski, en Svedujo: Dro Krikortz, en Hispanujo: Dro Pérez kaj Dro Hita, en Kanado: Dro Brossard, en Germanujo: Dro Mybs, en Rumanujo: Dro G. Robin kaj Dro Kanner, en Usono: Dro Milican, en Japanujo: Dro Tsukimoto, en Algerio: Dro Corcellet, en Azia Turkujo: Dro Stamatiadis.

En 1909 la TEKA kalkulis 370 pagantajn membrojn. La oficiala organo fariĝis tro malvasta. Fondiĝis novaj naciaj grupoj: Hungara, ĉeĥa, filio de TEKA en Rusujo s. n. „Tutrusa Esperantista Kuracista Societo“ (TEKS). En la aperinta en 1909 unua „Jarlibro de TEKA“ (donaco de Dro Thalwitzer) ni trovas nomaron de 19 Landaj Konsuloj, de 41 Rezentantoj kaj de 498 TEKA-anoj.

Konstanta kreskado de nia Asocio daŭris ĝis la milito. La TEKA-n gvidadis, kiel Prezidantoj, Prof. Dro Jameson-Johnston, Dublin, Prof. Dro Gariel, Paris, Prof. Dro Vanverts, Lille; Sekretarioj: Dro Rotschuh, Aachen, Dro Weiss, Stuttgart, Dro Austerlitz, Bardiov. Multe laboris por la TEKA Dro Briquet, Lille, Dro Blasberg, Kraków, Dro Sidlovskij, Moskvo, Dro Nemser, Petrograd, Prof. Dro Bujwid, Kraków, Dro Kenneth W. Milican, Chicago, Dro Artigues, Paris, Dro Venancio Da Silva, Rio de Janeiro, DroUhlmann, Basel, Prof. Dro Nishi, Tokio, kaj aliaj.

Grandan helpon kaj subtenon ĉe la organizado de TEKA-rezentantoj en diversaj urboj donis al ni la plej grava Esperantista organizaĵo UEA dank' al simpatia al ni rilato de neforgesebla ĝia Prezidanto S-ro Hodler. UEA dissendis cirkulerojn de TEKA al ĉiuj siaj Delegitoj, kio donis tre bonajn rezultojn.

La simpatia rilato de UEA al ni montriĝis ankaŭ en la komuna organizado de UEA- kaj TEKA-Kongreso en Augsburg 1909.

La „Voĉo de Kuracistoj“, redaktita de Dro Mikolajski en Lwów, transformiĝis en „Kuracisto“n, kies redaktoroj fariĝis Dro Chybczynski kaj poste Dro Robin, ambaŭ en Warszawa (1911—1914).

Dum la milito TEKA ĉesis sian agadon pro foresto de plejparto de siaj gvidintoj. Dro Mézei, Budapest,

fondis intertempe novan medicinan organon, kiel sian privatan entreprenon, la „Internacia Medicinan Revuo“. Dro Briquet, Lille, komencis eldonadi „Oficialan Bultenon de la TEKA“ por rekolekti denove la militintajn kaj nun disjetitajn eks-TEKA-anojn.

Dank' al penado de Dro Briquet, Dro Blasberg, Dro Robin, Dro Crlenjak kaj de Dro Sós, TEKA reviviĝis. La „Internacia Medicina Revuo“ de Mézei laŭ kontrakto kun la TEKA ĉesis aperi, ankaŭ la „Oficiala Bulteno“ de Briquet. TEKA komencis eldonadi sian oficialan organon „Internacia Medicina Revuo“ sub la ĉefredakcio de Prof. Dro Vanverts kaj redakcio de Dro Briquet, ambaŭ en Lille. De la 1929, post rezigno de Dro Briquet, la redakcion transprenis la nuna redaktoro Dro Kempeneers, Bruxelles.

Post revivigo postmilita estis elektita prezidanto Dro Blasberg, tiel meritplena en la afero de reorganizado de la TEKA. Post rezigno de la lasta, nun gvidas la Asocion Dro Robin.

En 1929 TEKA aranĝis unuan memstaran Konferencon en Wien dum la Antaŭkongresaj tagoj.

Dum la Universala Esperanto-Kongreso 1931 en Kraków, TEKA aranĝos speciale gravan kunvenon kaj kredible ekskurson tra kelkaj polaj banlokoj, sub aŭspicioj de la registaro.

De Januaro 1931 la oficiala organo aperos ĉiumonate. Estas intencata eldono de apartaj medicinaj verkoj. Fondiĝis „Farmaciista Sekcio“ sub gvido de Magistro Farmacia S-ro L. Wiltschek, Bratislava, kaj kun helpo de S-roj Dro Maeder, Sankt Gallen, kaj B. Elwell, London.

Estas intencata dank' al kunlaboro de UEA starigo de „Medicinaj Delegitoj“ en banlokoj kaj gravaj urboj.

Jara kotizajo estas modesta, nur 1 Dol. amer., por kio ĉiu TEKA-ano ricevas senpage la organon „Internacia Medicina Revuo“. Luksa abono sur speciala papero kostas 3 Dolarojn jare.

Ĉiujn mensendojn, abonojn, kotizajojn, demandojn bonvolu adresi al Dro P. Kempeneers, Bruxelles, 20 rue aux Laines (Belgujo).

Dro W. Robin
Prezidanto de TEKA

Sendube

Ĉiuj ŝatantoj de la Esperanto-literaturo legas avide la gazeton

Literatura Mondo

ĉar ĝi estas

la plej bela pure literatura gazeto
en Esperantujo.

Ĝian valoron garantias la ĉefredaktoroj:

Julio Baghy kaj Kolomano Kalocsay

La konstantaj kunlaborantoj, kiel:

*J. D. Applebaum, A. Behrendt, P. Benne-
mann, J. Berger, M. Blassberg, T. Cart,
Helmi kaj Hilda Dresen, R. Eichenbaums,
J. Forge, S. Grenkamp-Kornfeld, L. Halka,
R. Hromada, T. Jung, I. Jurysta, E. Knutsson,
I. Lejzerovicz, W. Lippmann, T. Morariu,
L. E. Newell, P. Nylén, Jan van Schoor,
K. R. C. Sturmer, R. Schwartz, L. Totsche,
Leono, Felikso kaj Lidia Zamenhof, E.
Wiesenfeld.*

Agentejoj en ĉiuj landoj. — — Postulu
senpagan prospekton kaj specimenon

Originalan Esperantan Literaturon

donas la eldonprogramo de la eldonejo Literatura
Mondo por la jaro 1931. En la serio troviĝas la
verkoj de Julio Baghy, Jean Forge, Kolomano
Kalocsay, Francisko Szilágyi.

Postulu detalan prospekton en ĉiuj librejoj aŭ de la
administracio de LITERATURA MONDO, Bleier Vilmos
Hungarujo, Budapeŝt IX, Boráros tér 6. IV. 11

Faka Organizado Internacia

(Steleto antaŭ la nomo signifas, ke oni ne respondis al
korektfolio ĝis 15. I. 1931.)

Blinduloj

Universala Asocio de Blindaj Esperantistoj. —

Fondo: 1923. — *Kot.:* 1 Fr. sv. Subtenantoj 4 Fr. sv. —
Gazetoj: „Esperanta Ligilo“; „Ligilo por Vidantoj“. —
Servej: Reciproka helpo al blindaj samideanoj, eldono de
gazeto. — *Stato:* ĉ. 400 anoj. — *Estraro:* Prez.: J. Kreitz,
Herkulesstr. 97, Köln-Ehrenfeld, Germ.; Vicprez.: A. Mas-
selier, Neuilly-Plaisance, Franc.; Unua Sekr.: H. Thi-
lander, Stocksund, Sved.; Dua Sekr.: R. Israëls, 2 Ex-
loërmond, Nederl.; Kas.: W. P. Merrick, Shepperton,
Angl.; Konsilantoj: V. Ramadanovich, Zemun, Jugosl.;
Miklós Bánó, Erzsetbet körut 16, Budapeŝt, Hungar. —
Adreso: Ĉe la Unua Sekretario.

Naciaj Konsuloj:

Argentina: J. Baquero, Pedernera 502, Flores, Buenos-Aires.
Aŭstralia: F-ino T. Aston, 42 Raleigh Street, Windsor,
Mesbourne, Vic. — W. L. Waterman, 60 Roebuck
Street, Mile End, South Austr.
Aŭstria: F-ino St. Zehetner, Am Tabor 6, Wien XIX.
Brazila: F. A. de Almeida, jr. Av. Paulo de Frontin 287,
Rio de Janeiro.
Brita: W. P. Merrick, Penso, Shepperton.
Bulgara: St. Nenkov, Ul. Ljuben Karaveloff 44, Sofia.
Cehoslovaka: F-ino E. Suchardova, oficistino, Žižkova
ul. 181, Domovina Slepou Bohem., Praha-Nové Vytocany.
Ĉila: Luis E. Sepulveda Cuadra, Calle del Carmen
1288, Santiago. [undborg.
Dana: F-ino Agnes Melchior, Blindeforskolen, Kal-
Finna: Robert Bergh, Sjöttullsgatan 15, Helsingfors.
Franca: A. Masselier, Neuilly-Plaisance, S. et O.
Germanaj: E. Keil, Fischerstr. 36, Berlin G 2.
K. Halfmann, Krefeld-Forsthaus. [Barcelona.
Hispana: J. Bellfort, Rambla de Catalunya 127-2-0-2a,
Hungara: Miklós Bánó, Erzsetbet-Körut 16, Budapeŝt.
Itala: A. R. Tancredi, R. Scuola Compl., Savona-Genova.
Japanaj: T. Kumagee, Ube-Shi, Yamaguchi-Ken.
Tokugiro Torii, Chitose Yama, Tiu-Shigai.

Jugoslavaj: F-ino Ljubica Kranjčević, Mesnička ul. 34, Zagreb. — Alojzij Levstek, Posta Ribnica, Goričavas, Dolensko, Slov.

Latva: Inte Čače, Krasns iela 4, Riga.

Meksika: S-ro Meza, 8 de Orizaba 154, Mexico D. F.

Nederlanda: R. Israëls, 2 Exloërmond.

Norvega: Red. E. Imsdahl, Rosenkrantzg. 5, Bergen.

Pola: W. Stachowiak, Krasinskiego 2, Bydgoszcz.

Rumana: F-ino J. Kohn, Alba-Julia.

Rusa: K. Sobolev, Jelabova 27, Leningrad.

Sveda: H. Thilander, Stocksund, Sved.

Svisa: Luigi Grassi, Hotel Lugano, Lugano.

Usona: E. Middleton, Greenfield, Illinois.

Fervojo

***Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj.** — *Refondo:* 1921 en Praha. — *Organizo:* Individuaj membroj; Subtenantoj neesperantistaj, Centra Komitato. — *Kot.:* 5 Frankoj svisaj. — *Gazeto:* „La Fervojisto“. — *Stato:* 1. Januaro 1926: 630 membroj. — *Estraro:* Prez.: Stevan Stojnić, kontroloro de ĝenerala fervoja direkcio en Beograd, kolonija Min. Saobracaja nro 17, Jugoslavujo. (De 1928 ne plu respondis. *Red.*)

Junularo

Tutmonda Esperanto-Junulara Asocio. — *Fondo:* 1920. — *Celo:* Koncentrigo de junulaj kaj porjunulaj fortoj antaŭenigi la E-movadon inter junuloj kaj kreskigi fortikan senton de solidareco inter ĝiaj anoj. — *Gazeto:* Esperanto-Junularo. — *Kot.:* 3 Fr. sv. kun gazeto. — *Estraro:* Patrono: Prof. Dro J. Dietterle, Leipzig, Ano de I. C. K.; Prezidanto: A. Csader; Sekr.: A. Neupert; Helpsekr.: F-ino H. Kunath; Komitatoj: Markovits, Budapest; Chun, Shanghai; Dušanski, Kaunas; Rebiček, Praha. — *Adreso:* Wedellstr. 17, Leipzig N 22.

Juro

***Internacia Societo de Esperantistaj Juristoj.** — *Fondo:* 1906. — *Organizo:* Individuaj membroj. — *Kot.:* 5 Frk. svis. jare. — *Adr.:* Jozef Litauer, adv., Marszałkowska 81, Warszawa.

Katolikismo

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (I. K. U. E.). — *Fondo:* 1910. — *Organizo:* Naciaj Ligoj kaj individuaj membroj. — *Kot.:* Pomembra kotizo de la landaj ligoj: Afranko de duobla letero eksterlanda. Individua kotizo: La duobla de la pomembra landiga kotizo. Budgeto: 1931: 1156 Guldenoj. — *Gazeto:* „Espero Katolika“. — *Estraro:* Prez.: Pastro J. Font Giralt; Vicprez.: F-ino M. Larroche; Gen. Sekr.: P. A. Schendeler; Vicekr.: J. E. Hookham. — *Adreso:* Ce la Ĝenerala Sekretario: Prins-Hendrik-Straat 30 E., Eindhoven, Nederlando.

Mondjunularo Katolika (MOKA). — *Fondo:* 1920. — *Organizo:* Delegitoj, grupoj, aliĝintaj organizaĵoj. — *Kot.:* 1.50 Frk., kun gazeto 4 Frk. sv. — *Budgeto:* 1931: 500 RM. — *Gazeto:* „La Juna Batalanto“. — *Stato:* Membroj en 85 landoj. — *Servoj:* Reciproka subteno, informservo, internaciaj kongresoj, tendaroj. — *Estraro:* Direktoro: Grafo G. K. Majláth, episkopo de Alba Iulia. — *Adreso:* Cefsekr. Dro W. Solzbacher, Dagobertstr. 28, Köln am Rhein, Germanujo.

Klasbatala

Sennacieca Asocio Tutmonda. — *Fondo:* 1920. — *Organizo:* Individuaj membroj, 24 administraj horzonoj. — *Direktado:* Konsilantaro 14-membra, Plenum-Komitato sesmembra; en Paris, unu en Moskvo kaj unu, la administranto, en Leipzig. Direkcio en Paris. Kontrolkomitato. — *Servoj:* Utiligi Esperanton por la klasaj profitoj de la proletaro tutmonda, krei internacian literaturon kaj raciecan spiriton, embrie funkciigi societon, kiel estonte povos funkcii la tutmonda socio. Helpo per informoj, vojaĝoj, enketoj, dokumentado. — *Akcia Eldon-Kooperativo:* AEK eldonas verkojn originalajn aŭ tradukojn, kies enhavo klerigas la legantojn. Jam aperis 40 libroj. — *Kot.:* Baza cifero 13 Fr. sv. por aktiva kaj 3 Fr. sv. por pasiva membro, por grupo aŭ organizo 6 Fr. sv. — *Stato:* 7000 membroj en 35 landoj. — *Gazetoj:* „Sennaciulo“, „La Nova Epoko“, „La Lernanto“, „Sennacieca Pedagogia Revuo“. — *Adreso:* 23 rue Boyer, Paris XXe; Administracio: R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O 27. (Poŝteka konto: Leipzig 6835.)



Komerco

Komercista Esperanto-Unio (KEU). — *Fondo:* 1922. — *Organizo:* Centro, filioj, agentejoj. — *Organo:* „La Komerco“. — *Celo:* Enkonduko de Esperanto en komerco kaj industrio, ekligo de komercaj interrilatoj, traduko de reklamaĵoj en Esperanton kaj disdonado en la tuta mondo. — *Adreso:* Friedrich-August-Str. 4, Dresden-Radebeul.

Esperanto & Commerce Esperanto kaj Komerco
Fondo: 1923. — *Organizo:* Individuaj personoj (komercistoj), komitato. — *Servoj:* Disvastigi francan komercon pere de Esperanto, interrilatigi komercistojn eksterlandajn kun francaj firmoj ktp. — *Kot.:* Por aktiva membro 40.—, Bonfaranto 60.—, Fondanto 600.— Fr. fr. — *Estraro:* Prez.: André Baudet, 19 Bd. de Courcelles, Paris 8; Vicprez.: André Petit; Kasisto: Jean Balliman. — *Adreso* (Sekretariejo): 23 rue Notre Dame des Victoires, Paris 2; Tel.: Gutenberg 65-23 aŭ 63-64, Louvre 49-57. Franca poŝtĉeko: 1514-56, Paris.

Kristanismo

Kristana Esperantista Ligo Internacia. *Fondo:* 1913. — *Kot.:* 1 Sil. brita kaj libervola aldono. — *Budĝeto:* 200 RM. — *Servoj:* Subtenas per Esperanto la biblian Kristanisman, helpas enkonduki Esperanton en internaciajn organizaĵojn de sinceraj protestantoj. — *Estraro:* Prez.: Paul Hü b n e r, Pölnenstr. 4, Quedlinburg, Germanujo.



Internacia Metodista Ligo Esperantista. — *Fondo:* 1929. — *Organizo:* Naciaj reprezentantoj de enlandaj metodistoj ambaŭseksaj formas nacian unuigon. — *Kotizo:* Libervola. — *Estraro:* Gvido: Kiril Jottov, Frankfurt a. M., Ginnheimer Landstr. 180 (Germ.).

Kuracistoj

Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio (TEKA). — *Fondo:* 1907. — *Gazeto:* „Internacia Medicina Revuo“. — *Estraro:* Prez.: Dr. W. Robin. — *Adr.:* Ce la Prez.: Marsalkowska 113, Warszawa.

Motoristoj

***Internacia Esperantista Motor-Unio.** — Faka Organizo de Esperantistaj aŭtomobilistoj, aviadistoj, motorcikl-

istoj, motorboatistoj kaj ĉiuj interesigantoj pri motorismo. — *Celo:* Enkonduko de Esperanto en medion motoristan ĉiulandan, helpo al motoristoj Esperantistaj en fakaferoj. — *Adreso* (provizora gvidanto): Karl Knoll, Neustadt 25, Zittau (Germanujo).

Muziko

Internacia Asocio por la propagando de la Aŭtonoma Muziknotado — *Fondo:* 1924. — *Kot.:* Izoluloj: 5 Fr. belg. jare, societoj: 10 Fr. belg. jare. — *Organizo:* Izolaj membroj, societoj aprobantaj la A. M. N.; Komitato kvinmembra, inter kiuj unu direktanta delegito. — *Celo:* Diskonigi kaj uzigi la A. M. N. en la tuta mondo. — *Gazeto:* „Belga Esperantisto“. — *Adreso:* L. Cogen, 52, Drève, Ninove (Belgujo).

Pacifista

Universala Esperantista Pacifista Ligo. — *Fondo:* 1923. — *Adr.:* E. G. Torgny, redaktoro, Skara, Sved.

Pedagogio

Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (TAGE). — *Fondo:* 1924 (refondo). — *Organizo:* Individuaj anoj, landaj sekcioj. — *Kot.:* 3 RM po jare. — *Servoj:* Grupigi ĉiujn esperantistajn instruistojn en forta organizaĵo, enkonduki Esperanton en la lernejoj kaj en la internaciajn asociojn de la instruistaro. — *Gazeto:* „Internacia Pedagogia Revuo“. — *Estraro:* Prez.: G. W. Roome, 21 Glenalmond Road, Sheffield, Angl. — *Stato:* 880 anoj (1930). — *Budĝeto 1931:* 3200 RM. — *Adreso:* Sekr.: M. Goldberg, Leipzig-Oetzsch, Im Lumbsch.

Internacia Cseh-Instituto de Esperanto. — *Fondo:* 1930. — *Organizo:* Fondantaj, subtenantaj, aktivaj membroj. — *Celo:* Disvastigo de Esperanto per Ĉe-metodaj kursoj kaj prepari instruistojn. — *Servoj:* Disponigi al la kursarangantoj taŭgajn instruistojn kaj helpi ilin kaj la instruistojn per konsiloj kaj la necesa materialo; organizi kursojn internaciajn por instruantoj de Ĉe. — *Estraro:* Andreo Cseh kaj Sino Julia Isbrücker. — *Adreso:* Oostduinlaan 32, Den Haag, Nederl.; Tel.: 16720; Poŝtĉeko: Haag 162626.

Polico

Internacia Polica Ligo. — *Fondo:* 1930. — *Organizo:* Individuaj membroj formantaj lokajn grupojn, laŭlande landajn sekciojn. — *Celo:* Enkonduki la uzadon de Esperanto en policon, alproksimigi la policon kaj publikon. — *Kotizo:* 1 USA-Dolaro. — *Gazeto:* „*Esperanto*“. — (15. Januaro 1930: Reorganizota.) — Oni sin turnu al: Paul Teuchner, Eisenbahnstr. 111 B, Leipzig O 28.

Poŝto kaj Telegrafo

Internacia Ligo de Esperantistaj Poŝt- kaj Telegraf-oficistaro (ILEPTO). — *Fondo:* 1911. — *Organizo:* Aktivaj, pasivaj kaj kolektivaj membroj. — *Kot.:* 4 Fr. sv., Subtenanto 5 Fr. sv., kolektiva 10 Fr. sv. pojare. — *Gazeto:* „*Interligilo*“. — *Servoj:* Propagando inter samprofesiaj, ĉe poŝtaj administracioj, kreo de faka vortaro, informservo pri fakaj demandoj. — *Estraro:* Honora prez.: Supera registara konsilisto Otto Reber, Bamberg; Prez.: Dro Ed. Spielmann, Gesellschaftsstr. 39, Bern (Svislando); Gen. sekr.: R. J. Filliâtre, 28 Rue de l'Agent Dufraigne, St. Cyr l'École (S. et O., Franclando); Kasisto: Petro Filliâtre, 54 Rue Custine, Paris XVIII.

Cefdelegitoj:

Aŭstria: Joseph Horaček, Wiednergürtel 24/15, Wien IV.
Belga: Hubert Wathélet, 11 Rue des Verges, Liège (Poŝtekkonto 1940.40). [S. W. D. O.]
Brita: G. Sutehall, Viktoria Esperanto-Grupo, London
Bulgara: C. Georgieff, Strajzita.
Ceĥoslovaka: Ferdinand Votrubeč, poŝtkasisto, Praha 36.
Cina: Ićio Sun, K 7 Boone Road, Shanghai.
Estona: J. Vahtkerl, Luise t. 5-II, Tallinn.
Franca: Robert J. Filliâtre, 28 Rue de l'Agent Dufraigne, St. Cyr l'École (S. et O.) (Poŝtekkonto Paris 1.111-11).
Germana: Paul Schmidt, Kesseldorfstr. 72, Dresden-A.
Hispana: F. Soler Valls, Centro de Telefrafos, Valencia.
Japana: Poŝtdirektoro Kondo, Nagasaki.
Jugoslava: Autun Margetič, kruziceva ul., Split.
Latva: A. Kažoks, P. K. 703, Riga.

Litova: L. Belinis, poŝtestro, Panevezys.
Nederlanda: J. B. B. Dufrenne, Overtom 174, Amsterdam.
Nov-Zelanda: W. H. King, Postal Division, Secretary's Office, G. P. O. Wellington.
Pola: P. Prabucki, poŝtestro, Miloslaw.
Rumana: Adalbert Toader, Lipova.
Ruslanda: C. O. E. L., poŝtkesto 701, Moskvo.
Sveda: Agren Arvid, Telegrafstationen, Eskilstuna.
Svisa: Dro Ed. Spielmann, Gesellschaftsstr. 39, Bern (Poŝtekkonto: nome de la Ligo: Bern III—5924).

Scienco

Internacia Sciencia Asocio Esperantista. — *Fondo:* 1906. — *Organizo:* Individuaj membroj laŭvole apartigitaj laŭ sekcioj de specialistoj. — *Kot.:* Subtenanto: 2,50, aktiva membro 0,50, societoj 5 Dol. jare. — *Budĝeto:* 6000 Fr. — *Gazeto:* „*Bulteno de I. S. A. E.*“. — *Servoj:* Helpe al sciencaj laboroj, teknikaj terminaroj, antaŭenigo de la uzado de Esperanto en sciencaj kaj teknikaj rondoĵoj. — *Estraro:* Prez.: Prof. Odo Bujwid, Krakow; Sekr.: M. Rollet de l'Isle, Paris; Kas.: C. Rousseau. — *Adreso:* S-ro Rollet de l'Isle, 35 Rue du Sommerard, Paris 5.

Skoltismo

Skolta Esperantista Ligo. — *Fondo:* 1918. — *Organizo:* Centra komitato en Anglujo; naciaj agentoj, kiuj formas grandan konsilantaron; membroj kaj asocioj. Membroj estas skoltoj, asocioj, personoj favoraj al la ligo. — *Gazeto:* „*Skolta Heroldo*“. — *Kot.:* 2 Sil. 6 P. por skoltoj malpli ol 18-jaraĝaj; aliaj 3 Sil. jare. — *Servoj:* Informoj, propagando inter skoltoj. — *Stato:* 600 membroj. — *Estraro:* Patronoj: J. M. Warden, J. Merchant, Dro Edm. Privat, Vilho Setälä, Dro H. W. Hetzel kaj Senatoro A. Capper; Prez.: A. W. Thompson; Hon. Gen. Sekr.: Norman Booth, Netherton Huddersfield; Hon. Kas.: D. H. Davis, 23, East Dulwich Grave, East Dulwich, London S. E. 22; Komitatoj: H. W. Voigt, G. L. Atkinson, F. D. Murphy, J. W. Leslie, C. D. A. Capp, F-ino Fry, S-ino D. H. Morris kaj T. D. Ling. — *Adreso:* Netherton, Huddersfield.

Stenografio

Internacia Asocio de la Esperantistaj Stenografistoj. — *Fondo:* 1923. — *Organizo:* Individuaj membroj. — *Servoj:* Propagandi E. en stenografistaro kaj stenografion en Esperantistaro, verki stenokribmaŝinan vortaron, disvastiigi la profesion de E.-stenografistoj. — *Estraro:* Prez.: L. Cogen; Gen. Sekr.: R. J. Haillez, 95 rue van der Elst, Watermael, Bruxelles. — *Kot.:* 2 Fr. sv., por societoj 4 Fr. sv. — *Adreso:* 52 rue de la Drève, Ninove, Belg.

Teozofio

Teozofia Esperanta Ligo. — *Fondo:* 1911. — *Organizo:* Naciaj sekretarioj, individuaj membroj. — *Kot.:* 5 Frk. svis. jare kun abono al „Espero Teozofia“. — *Servoj:* Praktika apliko de Esperanto por la teozofia movado. — *Stato:* 100 membroj. — *Estraro:* Prez.: M. Tiard; Vicprez.: J. Garrido; Sekr.: S-ino Cimrova. — *Adreso:* Spořilov 72-13, Praha (Ĉeĥoslovakujo).

Vivreformo

Vegetara Ligo Esperantista. — *Fondo:* 1908. — *Organizo:* Landaj sekretarioj en la ĉefaj landoj, individuaj membroj. — *Kot.:* Kun ĝi la abonpago por la 3-monata bulteno „Vegetarano“ 4 sv. fr. aŭ egalvaloro. — *Gazeto:* „Vegetarano“. — *Estraro:* Sekr. kasisto: O. Bünemann, Papenhuder Str. 32, II, Hamburg 24.

Verda Krucio, Laborkomunumo por sentabaka kulturo. — *Fondo:* 1924. — *Celo:* Disvastigo de la ideo de sentabaka kulturo inter la Esperantistaro, propagando de E. inter la tabak kontraŭuloj, kunigo de ĉiuj samcelanoj por komuna laboro, eldono de presajoj esp. kontraŭ la tabako, internacia informservo k. a. — *Afergvidanto:* W. Mudrak. — *Adreso:* Wien I, Judenplatz 8-I.

Internacia Esperantista Laborkomitato por senalkohola kulturo. — *Fondo:* 1929. — *Celo:* Kunlaboro de la Esp. abstinenculoj diverslandaj, atentigo je la graveco de l' alkoholdomando en Esp. rondoj, interŝanĝo de raportoj, presajoj koncerne alkoholismo kaj ties kontraŭbatalo, internacia informservo per E., propagando de E. inter la abstinenculoj. — *Estraro:* Prez.: S-ino A. Bramkamp-Weber, instruistino, Scheveningen, Pansierstraat 22, Nederl.; Prov. Sekr.: Walter Mudrak, Wien VIII, Strozsig 19/18.

Internacia Radio-Komisiono

komiŝiita de
Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado.
Prezidanto: J. Jungfer, Lindenstr. 10, Lübben (Spree-wald), Germanujo. — *Membroj:* W. Heinze, Bennostr. 29, Oberlössnitz (Bez. Dresden), Germanujo; P. Lendorff, Overbyes Alle 38, Kopenhago, Danlando; W. H. Matthews, 224 Becontree Avenue, Chadwell Heath, Essex, Britujo; O. Ginz, Bolzanova 1, Praha II, Ĉeĥoslovakujo.

Internacia Radio-Servo

1. Organizo de I. R. S.
Adreso: J. Jungfer, Lindenstr. 10, Lübben (Spree-wald), Germanujo. — *Sekretarioj:* La adresoj estos publikigitaj en la gazeto „Esperanto“ kaj la naciaj Esperanto-gazetoj. — *Subtenantoj:* Subtenantoj pagas pojure minimume 5 Fr. sv. Ili rajtas ricevi la gravajn publikigajojn de I. R. S. — *Kunlaborantoj:* Kunlaborantoj devas promesi pomonate sendi leteron aŭ poŝtkarton al adreso pri temo destinita de la estraro de I. R. S.

La I. R. S. ne estas fakasocio kaj ne havas apartan membro-kotizon. Por certaj servoj la abon-sistemo estas antaŭvidita. Krom tio estas starigita kaso por libervolaj donacoj. Tasko de I. R. S., kiu laboras en intima rilato kun la naciaj societoj, estas simpligi la kunlaboradon kaj igi pli efike la komunan Radio-Esperanto-propagandon. Sed I. R. S. ne sole volas propagandi Esperanton inter radiorondoj, sed ankaŭ helpi al la radio-aferoj per Esperanto.

2. Aranĝoj de I. R. S.
Internacia Radio-Servo: 1. Monata eldono: Por la Kunlaborantoj de I. R. S. kaj aliaj Radio-interesuloj. Abonprezo: Egalvaloro de 1 Respondukuponon po numero. 2. Propaganda eldono: Por propagandaj aferoj de la I. R. S. kaj de la Internacia Radio-Komisiono. 3. Semajna eldono: Por speciale urgaj aferoj precipe la Esperanto-Radio-Programo.

Esperanto-Radio-Programo, kompilita de la Internacia Radio-Komisiono, komiŝiita de I. C. K. en kooperado kun la Internacia Unio de Radiofonio. La Radio-parolantoj kaj kursgvidantoj de la Radio-sendstacioj estas petataj sendi informon pri E.-disaŭdigoj venontmonataj ĝis 25an ĉiunonate.

Radio-statisko pri la E.-disaŭdigoj de ĉiuj stacioj.
Raportoj pri la Esperanto-dissendoj de la Kunlaborantoj al la send-asocioj kaj parolantoj de la Radio-sendstacioj.

Verkaro de D-ro Edmond Privat

Esperanto Langue Auxiliaire

Manuel pratique avec Grammaire complète, exercices
et conversation et double vocabulaire (114 paĝoj)

Favora prezo: 1 ekz. 1,50 Fr. sv.

Kursa Lernolibro Laŭ praktika parola metodo — 23-30a milo

Prezo: 1 ekz. 1,— Fr. sv. — 10 ekz. 9,— Fr. sv.

Karlo Facila legolibro 41—50a milo

Prezo: 1 ekz. 0,70 Fr. sv. — 10 ekz. 6,— Fr. sv.

Historio de la lingvo Esperanto

Du partoj — Lukse bindita — 10,— Fr. sv.

Vivo de Zamenhof

Eldono de la Brita Esperanto-Asocio. Libraro Boling-
broke-Mudie. Bona papero, multaj bildoj, modela preso

Favora prezo: 5,— Fr. sv. por 1 ekz.

Tra l'Silento Poemoj elektitaj. 28 paĝoj. (Kovrilo iom flaviginta)

Favora prezo: 1,50 Fr. sv. por 1 ekz.

Esprimo de sentoj en Esperanto

68 paĝoj / Formato de l'jarlibro / 1,50 Fr. sv.

LIBROSERVO DE UEA

1, Tour de l'Ile, Genève, Svislando

Memoru la mortintojn!

Dum la jaro 1930 la jenaj gesamideanoj forlasis
niajn vicojn laŭ la sciigoj ricevitaĵe de la Centra
Oficejo. Ilia memoro restu inter ni kaj ilia sino-
dono estu ekzemplo por la postvivantoj.

Adams, A. J., Subtenanto de UEA, malnova pioniro,
Hastings, Angl.

Andrade, Carlos, Milita Kapitano, Lisboa, 25. 7. 30

Arnold, Walter, prof., prezidinto de Mondjunularo
Katolika, Zug, Svis., 10. 30

Auty, John Carlos, Ano 10544, D en Sheffield, 1. 30

Bahnert, Robert, VD en Hainfeld, Aŭstrio, 23. 6. 30

Balsells, Gaieta, kasisto de la Barcelona Kongreso 1905

Barberi, Francesco, Komandanto, malnova ano de UEA,
prezidinto de „Imperiosa Civitas“, Roma, 1. 3. 30

Barnicoat, D. M., Ano 10599, Brighton, Brit.

Beck, Nini, instruistino, Anino 29203, Bukaresti

Becker, Ed., ekl. kons., Ano 3319, Breslau, 2. 10. 30

Benisch, Franz, Ostrava-Privoz, Moravio, 25. 4. 30

Bishop, John W., MA 18615, Upper Montclair, USA,
11. 3. 30

Boschan, Julius, Ano 25599, Praha, 26. 9. 30

Buchanan, John, Dro, Ano 20575, TEKA-ano, London,
testamentis 4000 F. Sterl. por E.-Katedro ĉe uni-
versitato en Liverpool, 27. 2. 30

Coté, Ger. Hendr. Wilh., Dumviva ano kaj VD
en Utrecht, 24. 5. 30

Cuzon, Leopold, MA 16903, Paris, 5. 30

De Boer, Ano 10265, Hago, Nederlando, 7. 30

De Ménil, Félicien, barono, Paris, muzikaŭtoro de
la himno Espero, redaktinto de „La Revuo“ kaj
de la Tutmonda Jarlibro (Hachette), 28. 3. 30

Duarte, Joaquim, MA 34466, Lisboa, 18. 5. 30

Dybowski, Benedykt, prof., pola scienc., Lwów, 2. 30

Figueira, Julio, Funchal, 5. 8. 30

Fišer, Andreo, Dro, Dumviva ano kaj D en Tiflis, 74-jara, Petrograd, verkinto kaj tradukinto de multaj publikigaĵoj, 27. 5. 30

Fochr, Karl, Dro, Ano 31672, eks-Volapük-ano, Freiberg i. S., Germanujo, 21. 4. 30

Freitas, W. Pedro, Funchal, 16. 10. 30

Friedrichova, Emma, edzino de D de UEA en Košice, Ĉeĥoslovakujo, 17. 10. 30

Gábor, Janos, D en Mercurea-Ciuc, Csikszereda, Rumanujo, 29. 5. 30

Gardiner, F. J., Ano 17216, Wisbech, Brit., 7. 2. 30

Geusch, Arthur, Ano 27681, Falkenstein i. V., Germanujo, 10. 11. 30

Giles, M. Evelyn, Anino 13127, Letchworth, 5. 1. 30

Gilmoux, Robert, MA 13462, Glasgow, Skotl., 6. 3. 30

Grogan, A. G., Anino 20574, London

Hollert, ano de UEA, florkulturisto, Boulogne-sur-Mer, 5. 30

Ireland, B. Elizabeth, DM de UEA, D en Hove, dumviva fratulo de B. E. A., aŭtorino de lernolibro, sub la nomo Stella, London, 18. 3. 30

Irwin, Mary, Anino 28764, S. Peterburg, Florida, USA

Jakob-Notz, edzino de UEA-direktoro, kunlaborintino en la Centra Oficejo (1920—23), post trijara kruela malsano, Genève, 19. 6. 30

Jaroš, Vaclav, iama D en Mistek, Ĉeĥoslov., 12. 5. 30

Kis, Johano, rektoro de Budapeŝta universitato, 8. 3. 30

Kubašková, Marie, Plzeň, Ĉeĥoslovakujo

Laguy, Anino 11456, Abingdon, Britujo, 28. 11. 30

Lambert, Daniel Henry, kunfondinto de B. E. A. 1907, tradukinto de „Makbeto“, „Julio Cezaro“, Worthing, Britujo, 11. 11. 30

Lerner, Mario, Ano 31117, Znaim, Ĉeĥosl., 7. 30

Lévêque, Alphonse, Ano 31482, Paris, 7. 2. 30

Mierop, Lodewijk van, Bussum, Nederlando, 13. 6. 30

Minibek, Arnold, Dro, prezidinto de 16-a Kongreso, Wien, 17. 7. 30

Moreau, Daniel, Ano 14662, D en Romorantin, Loiret-Cher, 28. 1. 30

Nisivaki, Hiromiti, MA 34072, Nagoya, 22. 10. 30

Peri, Antonio, komandanto, D en La Spezia, 17. 5. 30

Picarra, Ladislau, Dro, senatano, Lisboa, 5. 9. 30

Pingrivaux, Alfred, pioniro en Limoges, 19. 2. 30

Pyke, G. James, MA 4701, Melbourne, 15. 10. 30

Schlechta, policestro, Praha, subten. de Int. Pol. Ligo

Sebert, Hippolyte, Artileria Generalo, ano de Franca Scienca Akademio, fondinto de la Esperantista Centra Oficejo (1905) kaj de Scienca Bibliografio en Esperanto, Paris, 24. 1. 30

Sheil, A. John, Ano 3846 kaj D en Washington, USA

Sianozecki, Grzegorz, kuracisto, MA 28052 en Katowice, Polujo, 10. 8. 30

Sörensen, Ida, Anino 18027, Delegitino, Port Richmond, USA, 28. 2. 30

Spaleck, Rudolf, Ano 15649, Bratislava, Ĉeĥoslovakujo

Stahuljak, Vladimir, MA 36190, Bjelovar, Jugoslavujo, 4. 12. 30

Steiner, Ida, nask. Zarboch, Praha, 17. 5. 30

Verburg, J. S., MA 35122, Rotterdam, 6. 30

Vojin, Auguste, advokato, D en Pau, Franc., 9. 30

Wandzioch, Jos., MA 33506 en Szopienice, Polujo, 2. 8. 30

Weigel, Lucien, VD en Nancy, Francujo, 26. 6. 30



Propagando en hoteloj

Por atentigi hoteliston pri esperantista kliento, vizitinta la hotelon UEA presigis malgrandajn kartetojn laŭ peto sendotajn senpage al la membroj de UEA, sed ne pli multe ol dek ekzemplerojn unufoje. Tiun karteton kun la malsupra teksto, oni transdonu okaze de forlaso de hotelo al la hotela oficejo post subskribo.

Esperanto.

La subskribinto, membro de Universala Esperanto-Asocio, Genève, estis kontenta pri via hotelo kaj rekomendos ĝin al siaj amikoj.

(Subskribo)

Membro de Universala Esperanto-Asocio

English.

The undersigned, member of the Universal Esperanto-Association, Geneva, was satisfied with your hotel and will recommend it to his friends.

Français.

Le soussigné, membre de l'Association Espérantiste Universelle, Genève a été satisfait de votre hôtel et le recommandera à ses amis.

Deutsch.

Der Unterzeichnete, Mitglied des Esperanto-Welt-Bundes, Genf, war mit Ihrem Hotel zufrieden und wird es seinen Bekannten empfehlen.

Italiano.

Il sottoscritto, membro dell'Associazione Universale Esperanto a Ginevra è stato soddisfatto del vostro albergo e lo raccomanderà ai suoi amici.

Česky.

Podepsaný, člen Universala Esperanto-Asocio Ženevě, byl s Vaším hotelem spokojen a doporučí jej svým přátelům.

☆

Presis:
Esperanto-Presejo Paul Göring
Schmidtstr. 1, Magdeburg-N. (Germ.)

☆

5 000 000 Kvin milionoj 5 000 000
da ekzempleroj de jena juvelo de faka libro-
arto jam vendiĝis en itala lingvo

La Verda Gvidlibro

Unua Serio

Unua Volumo

Touring Club Italiano

Milano kaj Lagoj de Lombardio

(kun 9 landkartoj kaj 6 planoj)

Luksa tolbindita eldono, enhavanta du vortaretojn, vastan informaron por turisto intencanta viziti aŭ ekkoni Italion, prononcelementojn de itala lingvo, liston de ĉefaj artistoj kun koncernaj indikoj, praktikajn kaj kulturajn sciigojn preparitajn de specialistoj. — Pli ampleksa kaj se eble eĉ pli zorgita ol la tre famaj „Guides Bleus“, „Baedeker“, ktp.

La libro utiliga

La libro eleganta

La libro laŭte laŭdita de la eminentuloj de nia movado

Prezo^o: 15.— italajn lirojn

Mendu ĉe

Touring Club Italiano, Corso Italia 10, Milano

aŭ ĉe Universala Esperanto-Asocio,

• Turisma Servo, 1, Tour de l'Île, Genève

aŭ ĉe Esperanto-Centro-Italia,

Galleria Vittorio Emanuele 92, Milano

Se vi mendos kaj disvastigos la libron, vi gajnos al Esperanto definitive, per plena kaj rapida sukceso de la prova eldono, la potencegan Touring Club Italiano, kun siaj 400 000 membroj kaj sia senkompara influo morala en ĉiu medio: vi certigos la sukceson de Esperanto en klera kaj granda turismo.



RAPIDU

se vi deziras ricevi **SENPAGAN** libropremion!

Polujo estas nunjare

la kongreslando de la tutmonda Esperantistaro!

Ni montru al niaj eksterlandaj geamikoj, ke **POLUJO** posedas multnombran, organizitan Esperantistaron.

Ĉiu Esperantisto en Polujo aliĝu tial al U. E. A.!

Universala Esperanto-Asocio estas la **mezurilo de la vera forto** de nia kara lingvo.

Ĝi ekzistas por **servi** al la Esperantistaro.

Neniu restu malantaŭe! Ĉiu rapidu eniri la vicajn de nia granda paca armeo!

Memoru, ke U. E. A. ebligas al vi jam nun—ne atendente la finan planan venkon de Esperanto—**la tujan uzadon de nia lingvo por praktikaj celoj**. Preskaŭ 2.000 Delegitoj en plej diversaj lokoj de la tuta mondo estas ĉiam al dispono de la membroj de UEA por ĉiuspecaj servoj.

La **ampleksa Jarlibro de UEA**, kiun ricevas **senpage** ĉiu membro, ne nur **plene valoras la pagatan kotizon**, sed estas samtempe la **plej bona propagandilo** kaj konvinkigilo pri disvastiĝo kaj uzebleco de Esperanto.

Ne hezitu tial plu kaj

aligu tuj al U. E. A.!

Ĉiu membro, kies aliĝo atingos la Teritorian Oficejon de U. E. A. en Bialystok **plej malfrue la 31.1. 1931**, rajtas ricevi **senpage** unu el la jenaj premioj laŭ sia elekto:

1. Dro E. Privat. Esprimo de sentoj en Esperanto.
2. Dro Ad. Ferriere. Estonta eduko.
3. Bonsels: Ŝolandro.
4. Julio Baghy. Pilgrimo (poemaro).
5. Julio Baghy: Dancu, Marionetoj! Novelaro.
6. C. Walter: Gajaj horoj por Esperantistoj. Unu insigno de U. E. A.
7. Raymond Szwartz. Verdkata Testamento.
8. Mauro Jokai. La edzino de falinto.
9. Arnold Bennet. Ok noveloj.
10. Margaret Catty Alegorioj el la Naturo.
11. Dro L. L. Zamenhof. Fundamento de Esperanto.
12. Dro L. L. Zamenhof. Lingvaj Respondoj.

Profitu la bonan okazon por ricevi **senpage** BELAN LIBROPREMION kaj transdonu TĴJ ĉi-suban aliĝilon kun via kotizo al Delegito en via loko aŭ — se ne estas — sendu ĝin rekte al

Adreso de loka Delegito:

J. SAPIRO, ĈEFDELEGITO de UEA

BIALYSTOK, Lipowa 33.

Poŝtĉekkonto: P. K. O. Nr. 60.047.



LEONARD HODDGEWASSA